


JOSÉ ENRIQUE RODÓ

ARIEL

EL HISPANA LINGVO
TRADUKIS
MANUEL FERNÁNDEZ MENÉNDEZ



ELDONO DE URUGVAJA ESPERANTO-SOCIETO
OKAZE DE LA 50-JARA JUBILEO DE "ARIEL"
M O N T E V I D E O — 1 9 5 0



6

Por la Biblioteca de
Madrida Esperanto-Klubo

Fernandez Menendez

Ofendentes, 20/marto/1956



EN MEMORO PRI
JOSÉ ENRIQUE RODÓ
OMAGO DE LA
URUGVAJAJ ESPERANTISTOJ




81LE

ESPERANTO-ELDONO KUN PERMESO DE LA
URUGVAJA MINISTERIO DE PUBLIKA INSTRUADO

KOPIRAJTOJ APARTENAS AL LA TRADUKINTO



A R I E L



A L E G O R I O D E A R I E L
C E L A M O N U M E N T O D E R O D Ó
E N M O N T E V I D E O
V E R K O D E E M I N E N T A U R U G V A J A S K U L P T I S T O
J O S É B E L L O N I

JOSÉ ENRIQUE RODÓ

ARIEL

EL HISPANA LINGVO
TRADUKIS
MANUEL FERNÁNDEZ MENÉNDEZ

☆☆☆

ANTAŬPAROLO ● BIOGRAFIA
NOTO PRI LA AŬTORO ● KAJ
ALDONO DE LA TRADUKINTO



ELDONO DE URUGVAJA ESPERANTO-SOCIETO
OKAZE DE LA 50-JARA JUBILEO DE "ARIEL"
M O N T E V I D E O — 1 9 5 0

R E V I Z I I T A
DE Ing. J. R. G. ISBRUCKER
PREZIDANTO DE LA
AKADEMIO DE ESPERANTO

ANTAŬPAROLO DE LA TRADUKINTO

DE antaŭlonge mi sentis mordeti mian spiriton de la deziro traduki en Esperanton, iun el la multaj juveloj de l' urugvaja literaturo. Sed tiu deziro estis sufokata de la penso pri mia absoluta nekapableco por entrepreni tiel malfacilan taskon. Kaj ĉiam mi diris: Tiun tradukon devas fari literaturisto, kaj ja tia mi tute ne estas. Mi atendu, ke urugvajaj verkistoj lernu Esperanton, kaj tiam tiuj literaturaj juveloj estos tre bone tradukataj kaj transdonataj al la tutmonda esperantistaro per plej bona kaj fidela stilo.

Sed la malpacienco ĉiam maltrankviligis min, kiam... En la jaro 1945-a, telegramo anoncis, ke la urugvaja ministro en Sovetunio, D-ro Emilio Frugoni, kiu ankaŭ estas rimarkinda literaturisto kaj poeto, faris paroladon pri José Enrique Rodó, en la Centra Biblioteko de Fremda Literaturo, en Moskvo. Dum tiu parolado, kiu poste estis publikigata de la "Revista Nacional" (Montevideo, januaro 1946), D-ro Frugoni, interalie, espri-

mis sian miron kaj ĉagrenon pro tio, ke li ne trovis en la ĉefaj rusaj bibliotekoj eĉ unu verkon de l' eminenta urugvaja verkisto, kaj li pensis: "kiel relativa estas la senmorteco de l' verkistoj kaj kiel limigita estas ilia gloro! Milionoj da legantoj, da kulturaj personeoj kaj eĉ da erudiciaj intelektuloj en la U.R.S.S., kaj sendube en ĉiuj landoj de slavaj lingvoj, ne scias, ke Rodó ekzistis!"

Efektive, la famo de l' aŭtoroj povas iri ankoraŭ, nuntempe, nur tien, kie iliaj respektivaj lingvoj estas parolataj. Nur bonaj tradukistoj povas pli ampleksigi tiujn lingvajn limojn konigante al alilingvanoj la literaturajn trezorojn; sed tiuj bonaj tradukistoj mankas plej ofte, kaj multaj literaturaj majstroverkoj restas nekonataj de la alilingvaj popoloj aŭ ili estas fuŝe tradukataj de nelertaj tradukistoj.

Alimaniere okazos, kiam ekzistos, krom la naciaj lingvoj, ankaŭ unu universala idiomu parolata de ĉiuj popoloj. Tiam ĉiuj literaturaj trezoroj de la pasinteco kaj ĉiuj literaturaj juveloj de la naciaj vivantaj lingvoj, estos tradukataj en la lingvon internacian, kaj ili povos esti diskonigataj al la tuta mondo.

Revenante al la vortoj de ministro Frugoni, mi aldonas, ke ili efikis sur mian volon kvazaŭ stimula vipfrapo, kaj mi diris al mi:

“Se mi povus Esperanten traduki iujn verkojn de Rodó, tiu ĉi granda verkisto komencus esti diskonigata en ĉiuj landoj. Tiu ĉi fakto, sendube, povos influi ankaŭ la disvastigon de Esperanto en Urugvajo kaj eĉ en Sud-Ameriko... Eble la intelektulaj centroj interesiĝos... Kial ne fari provon?”

Kaj mi provis.

Jen estimataj legantoj, la ĉefaj kaŭzoj de mia kulpo en tiu ĉi delikto, ĉar tia estas ja tuŝi majstroverkon per ne lertaj manoj. Sed min konsolas kaj kontentigas la penso, ke laboro farita kun bonvolo, amo kaj superema spirito, ofte kompensas la mankon de talento aŭ de aliaj brilaj kvalitoj.

Cetere, dank' al la Prezidanto de la Esperanto-Akademio, Inĝeniero S-ro. J. R. G. Isbrucker, tiu ĉi traduko estas bone reviziita, kaj tio ĉi devas esti ankaŭ motivo de kontentiĝo, tiel por la legantoj, kiel por la tradukinto. Al tiu eminenta samideano mi esprimas mian profundan kaj sinceran dankemon.



Tiu ĉi verko estas la unua, kiu vere famigis la nomon de José Enrique Rodó en ĉiuj hispanlingvaj landoj. Ĝi aperis en momento, kiam la juna usona potenco triumfis super Hispanujo, tiam regata de monarkia reĝimo. Kaj sekve de tiu triumfo, Usono prezentigis

kiel imitinda modelo, laŭ la vido de multaj politikistoj kaj intelektuloj el hispanamerikaj landoj.

Rodó reakciis kontraŭ tiu — laŭ li — troa admiro kaj imitemo, kaj li rimarkigis, ke ne ĉio, kio estis usona, estis admirinda nek imitinda (1). Tiu sintenado de Rodó multe vekis la atenton de la hispanamerika publiko pri lia verko *Ariel*.

Sed, krom tiu okaza intereso, kiu troviĝas en kelkaj paragrafoj de la libro, okaza intereso, kiu kompreneble jam forpasis, *Ariel* prezentas valorojn noblajn, superajn kaj, sekve, eternajn por la homa spirito. Estas pro tiuj eternaj valoroj, ke tiu ĉi verko konservas ĉiam neestingeblan intereson por ĉiuj pensantaj homoj en ĉiuj popoloj.

Aliflanke, oni povas konsideri *Ariel*, kiel prozan kanton idealistan. Ĉi estas konstanta laŭdego al la noblaj spiritaj potencoj de P' homo, kies enkarniĝon Ariel reprezentas, kontraŭ la brutaj instinktoj de Kaliban', enkarniĝantaj en la amaso de la homoj mallertaj, tro materialistaj kaj tro egoistaj, kiuj minacas la fundamenton de nia civilizacio.

Tradukante la belajn vortojn de Rodó:

(1) Vidu ĉe la fino de P' verko, "Aldonon de la Tradukinto".

“Ariel reprezentas la noblan kaj flugilhavan parton de la spirito. Ariel estas la superrego de l’ racio kaj de l’ sentimento super la malnoblaj stimuloj de la senracieco: ĝi estas la malavara entuziasmo, la supera kaj sindonema motivo en la agado, la spiriteco en la kulturo, la vigleco kaj la gracio de l’ inteligento, la ideala limo, kien suprencelas la homa selekto, korektante en la supera homo, per la persista ĉizilo de l’ vivo, la obstinajn postsignojn de Kaliban’, simbolo de voluptemo kaj mallerteco”.

Tiu ĉi verko de Rodó estas la unua urugvaja libro tradukita en Esperanton. Fakte tre honora kaj signifa por mi, kiel tradukinto. Tiamaniere, la penso de l’ plej idealista el la urugvajaj prozistoj estas la unua esprimita per la bela lingvo kreita de alia granda idealisto: Ludoviko Lazaro Zamenhof. Kaj nun, “per flugiloj de facila vento”, la alta penso de Rodó estu rapide disvastigata tra la tuta mondo, pere de tiu idealista publiko formanta grandan amason el la universala esperantistaro. Neniu alia publiko povus kompreni pli bone la noblan spiriton de José Enrique Rodó. Tiu koncepto stimulis min ankaŭ en mia traduka laboro.

La apero de tiu ĉi Esperanta traduko koincidas kun la soleno de la 50-jara jubileo


de *Ariel*. Tiu ĉi feliĉa okazo permesas al ni, urugvajaj esperantistoj, aliĝi ne nur kore, sed ankaŭ per efektiva maniero, al tiu grava soleno.

Fine, mi esperas, ke *Ariel* multe plaĉos ankaŭ ekster la hispanparolantaj landoj. Se tiu ĉi espero estus trafa, aliaj belaj verkoj de Rodó, per Esperanto, daŭrigos dissendi al ĉiuj mondopartoj la ondojn de sana idealismo kaj de homarama optimismo, kiujn la popoloj bezonas por kontraŭstari sian nunan tro prozan kaj materialan ekzistadon kaj por fortikigi sian konfidon pri la altaj moralaj valoroj de la homa spirito.

Manuel Fernández Menéndez

Montevideo, 1950.

BIOGRAFIA NOTO PRI
JOSÉ ENRIQUE RODÓ



**BUSTO SKULPTITA DE JOSÉ BELLONI
(CENTRA PARTO DE LA MONUMENTO)**

BIOGRAFIA NOTO PRI JOSÉ ENRIQUE RODÓ

JOSÉ Enrique Rodó estas konsiderata, kiel unu el la plej belstilaj hispanligvaj prozistoj. Kiel Rubén Darío en poezio, same famiĝis Rodó inter la verkistoj en prozo el Hispan-Ameriko.

De urugvaja patrino kaj hispana patro, li naskiĝis en Montevideo, en la jaro 1871-a, kaj, ankoraŭ juna, li mortis en Palermo, Sicilio (Italujo), en la jaro 1917-a.

Li estis edukata, kiel infano de ekonomie bonranga familio, kaj tre frue li montris sian emon al verkado. Dekunujara lerneano, li estis redaktoro de infana lerneja gazeto. Dum siaj liceaj studoj li plene montriĝis kiel literaturamanto, kaj li atingis la plej altajn kvalifikojn en siaj ekzamenoj pri literaturo.

Dum sia juneco, Rodó publikigis diversajn artikolojn kaj poeziaĵojn. En la jaroj 1895-1897^a li estis direktoro de la *Revista Nacional de Literatura y Ciencias Sociales* (*Nacia Revuo pri Literaturo kaj Sociaj Sciencoj*), kiu atingis altan prestiĝon en la tuta Ameriko. Liaj trafikaj artikoloj en tiu revuo

pri hispana kaj amerika literaturoj montris lin, kiel grandan kaj seriozan kritikiston.

En tiu tempo Rodó publikigis *El que vendrá (La Venonto)*, verko kiu estis tre favore akceptata de la kritiko, same kiel alia titolita *La Novela Nueva (La Nova Romano)* kaj la tre interesa studo pri la granda poeto hispanamerika Rubén Darío.

Poste aperis ARIEL, verko kiu famigis la nomon de Rodó ne nur en la hispanamerikaj landoj, sed ankaŭ en Hispanujo, Brazilo, Portugalujo kaj eĉ en Francujo.

Dum tri jaroj (1899–1901) Rodó estis profesoro de Literaturo ĉe la Universitato de Montevideo, kaj dum kelkaj monatoj, direktoro de la Nacia Biblioteko.

Modere liberala, li estis altirata de la politiko dum kelka tempo, kaj en la jaro 1902–a li estis elektata deputito. Ĉe la Urugvajja Parlamento, Rodó havis la okazon eldiri kelkajn profundajn kaj belstilajn paroladojn. Reelektita en 1905–a, li rezignis tiun postenon kaj forlasis la politikan aktivecon por sin dediĉi plene al verkado.

Tuj li publikigis *Liberalismo y Jacobinismo*, kolekto da polemikaj artikoloj pri religia toleremeco. Poste (1909–a) aperis *Motivos de Proteo*, ĉarma verko konsistanta el belegaj paraboloj kaj artikoloj pri filozofiaj

BIOGRAFIA NOTO

kaj moralaj temoj, kun ĝustaj historiaj referencoj, grupigitaj sub la sentenco "reformarse es vivir" (reformiĝi estas vivi).

En 1913-a Rodó publikigis *El Mirador de Próspero (La Elrigardejo de Prospero)*, kiu, laŭ liaj biografoj, estas la libro plej bone montranta liajn superajn kvalitojn de kritikisto kaj liajn plej rimarkindajn karakterojn de beletristo: sereneco, ĝusteco, harmonio, idealismo. Tre laŭdindaj estas liaj monografioj pri Juan María Gutiérrez, eminenta verkisto kaj politikisto argentina, pri Simón Bolívar, la granda sudamerika heroo, kaj pri Juan Montalvo, fama Ekvatora verkisto.

Akceptinte proponon de grava revuo *Caras y Caretas (Vizaĝoj kaj Maskoj)*, el Buenos Aires, por efektiviĝi vojaĝon tra Eŭropo, kiel ties korespondanto, en julio de 1916-a, la fama verkisto urugvaja forveturis el sia patrujo. Elŝipiĝinte en Lisabono, li trairis senhalte Hispanujon, vizitis Barcelonon dum kelkaj tagoj kaj li daŭrigis sian vojaĝon al Italujo, kie, dum ok monatoj, li vizitis Pisa, Firenze, Bologna, Torino, Roma, Tivoli, Milano, Napoli, Sorrento, Capri kaj Palermo, en kies urboj li verkis belajn artikolojn rakontante siajn vojaĝajn impresojn, kiuj poste estis kolektataj en libro sub la titolo *El Camino de Paros (La Vojo al Paros)*.

Al la nomitaj verkoj oni devas aldoni la libron *Nuevos Motivos de Proteo*, aperinta post lia morto.

En Palermo, tute neatendite, Rodó estis ekvojaĝonta al la eterneco. Dum lia restado en tiu itala urbo, li subite malsaniĝis en la hotelo, kaj post kelkaj horoj li mortis, tute kiel nekonatulo, la 1-an de majo de 1917-a.


La urugvaja registaro sendis ambasadon al Palermo, por enportigi en la patrujon la mortajn restaĵojn de Rodó, kaj je ilia alveno en Montevideo, registaro kaj popolo manifestis publikan funebbron per imponaj apoteozaj ceremonioj.

Nuntempe la memoro de Rodó estas tre honorata ne nur en Urugvajo, sed ankaŭ en la ceteraj amerikaj landoj. Diversaj lernejoj, liceoj kaj kulturaj institucioj portas la nomon de Rodó. En Montevideo, bela parko estas nomata kiel la eminenta verkisto, kaj en ĝia plej supra altaĵo, inter pinoj, eŭkaliptoj kaj graciaj palmoj, staras granda kaj belega monumento el granito kaj bronzo, kiu eterne memorigos al la estontaj generacioj la noblan idealistan spiriton de José Enrique Rodó.

M. F. M.

A L L A
JUNULARO DE AMERIKO

José Enrique Rodó



"ARIEL KONDUKANTA LA AMERIKAN JUNULARON"
GRUPO SKULPTITA DE JOSÉ BELLONI

A R I E L

TIUN vesperon, la maljuna kaj respek-
tegata majstro, kiun oni kutimis nomi Pros-
pero, kiel aludo al la saĝa mago de *La Tem-
pesto* Ŝekspira, adiaŭis siajn junajn disĉi-
plojn, post unujara laborado, kunigante ilin
pluan fojon ĉirkaŭ si.

Jam ili estis alvenintaj al la vasta studo-
ĉambro, kie delikata kaj severa gusto klopodis ĉie honoro la noblan ĉeeston de la libroj, fidelaj kamaradoj de Prospero. Superstaris en la salono — kiel inspiro de ĝia serena medio — belega bronza statuo figuranta Ariel de *La Tempesto*. Apud tiu ĉi statuo kutime sidis la majstro, kaj pro tio oni nomis lin per la nomo de la mago, al kiu servas kaj favoras en tiu dramo la fantazia personaĵo, kiu estis modlita de la skulptisto. Eble en lia instruado kaj en lia karaktero estis, por lia nomo, pli profundaj pravo kaj senco.

Ariel, aera genio, reprezentas, ĉe la simbolismo de l' verko de Ŝekspiro (Shakespeare), la noblan kaj flugilhavan parton de la

spirito. Ariel estas la superrego de l' racio kaj de l' sentimento super la malnoblaj stimuloj de la senracieco: ĝi estas la malavara entuziasmo, la supera kaj sindonema motivo en la agado, la spiriteco en la kulturo, la vigleco kaj la gracio de l' inteligento, la idealimo, kien suprencelas la homa selekto, korektante en la supera homo, per la persista ĉizilo de l' vivo, la obstinajn postsignojn de Kaliban, simbolo de voluptemo kaj de mallerteco.

La statuo, vere arta verko, reprezentis la aeran genion en la momento, kiam, liberigita per la magio de Prospero, li estas ekflugonta en la aeron por disiĝi en fulmobrilo. Etenditaj la flugiloj; malligita kaj ŝvebanta la malpeza vestaĵo, kiun la kareso de la lumo sur la bronzo damaskigis el oro; leviĝinta la granda frunto; duonmalfermitaj la lipoj per serena rideto, ĉio en la sintenado de Ariel mirinde montris la gracian ekflugon; kaj per trafa inspiro, la arto, doninte skulptan firmecon al lia figuro, estis sukcesinta konservi en ĝi, samtempe, la anĝelan ŝajnon kaj la idealan sengravitecon.

Prospero karesis, meditante, la fronton de la statuo; li lokigis poste la junularan grupon ĉirkaŭ si, kaj per sia firma voĉo, — *majstra* voĉo, kiu havis, por fiksi la ideon kaj eniĝi en la spiritajn profundaĵojn, jen la heligan pene-

tradon de l' lumradio, jen la tranĉan frapon de l' ĉizilo sur la marmoro, jen la ŝmiran tuŝon de l' peniko sur la tolaĵo aŭ de l' ondo sur la sablo, — li komencis diri, antaŭ aminklina atento:

APUD la statuo, kiun vi vidis prezidi ĉiuvespere niajn amikajn interparoladetojn, el kies instruo mi klopodis forigi ĉian malagrablan severecon, mi parolos al vi denove, por ke nia adiaŭo estu kiel la sigelo stampita sur interkonsento de sentimentoj kaj de ideoj.

Mi alvokas Ariel'on, kiel mian genion. Mi volus nun por mia parolo la plej mildan kaj persvadan sencon, kiun ĝi neniam estus haviginta. Mi pensas, ke paroli al la junularo pri noblaj kaj superaj motivoj, kiaj ajn ili estu, estas speco de sankta oratora arto. Mi pensas ankaŭ, ke la junulara spirito estas malavara grundo, kie la semo de ĝustatempa parolo povas doni, en mallonga tempo, la fruktojn de senmorta vegetaĵo.

Mi deziregas kunlabori pri programa paĝo, kiun vi formulos, sendube, en via spirita intimeco, kiam vi vin preparos por spiri la liberan aeron de l' agado, por alĝustigi al ĝi vian moralan personecon kaj vian klopodon. Tiu ĉi propra programo, — kiun kelkfoje oni formulas kaj skribas; kiun aliffoje oni rezervas por esti prezentata dum la tempopaso de l' agado, — neniam mankas en la spirito de la homgrupiĝoj kaj de la popoloj, kiuj estas io pli ol homamasoj. Se rilate al la skolo de l' individua volo, Goethe povis diri profunde, ke nur tiu estas inda je la libereco kaj je la vivo, kiu kapablas ilin konkeri por si ĉiutage, tiom pli prave oni povus diri, ke la honoro de ĉiu homa generacio trudas, ke ĝi konkeru al si, per la persista aktiveco de sia penso, per la propra klopodo, sian fidon pri difinita manifestiĝo de la idealo kaj ĝian postenon ĉe la evoluo de la ideoj.

Je la konkero de la viaj, vi devas komenci rekonante unuan fidan celon en vi men. La juneco, kiun vi vivas, estas forto, por kies apliko vi estas la laboristoj, kaj ĝi estas trezoro pri kies elspezo vi estas respondaj. Amu tiun trezoron kaj tiun forton; klopodu por ke la fiera sentimento pri ĝia posedo restu en vi arda kaj efika. Mi diras al vi kun Renan: "La juneco estas la malkovro de gran-

dega horizonto, kiu estas la Vivo". La malkovro, kiu sciigas pri nekonataj teroj, bezonas kompletigi per la vira klopodo ilin subiganta. Kaj neniu alian spektaklon oni povas imagi pli taŭga por altiri samtempe la intereson de l' pensulo kaj la entuziasmon de l' artisto, ol tiun, kiun prezentas homa generacio iranta al la renkonto de l' estonteco, vibranta pro la senpacienco de l' agado, kun la frunto alta, ĉe la rideto, fiera malestimo al disreviĝo; kun la animo plena je dolĉaj kaj malproksimaj vidaĵoj en ĝi disversantaj misterajn stimulojn, kiel la vizioj de Cipango kaj El Dorado en la heroaj kronikoj de la konkerintoj (1).

El la renaskiĝo de l' homaj esperoj; el la promesoj eterne fidantaj por la estonto je la realeco de l' plejbono, akiras sian belecon la animo sin malfermetiganta al la blovo de l' vivo; dolĉa kaj pervorte neesprimebla beleco, komponita, kiel estis tiu de la tagiĝo por la poeto de *Les Contemplations* (*La Meditadoj*), "el postsigno de sonĝo kaj el komenco de penso".

La homaro, renovigante, generacio post generacio, sian aktivan esperon kaj sian avidan kredon pri idealo, tra la severa sperto

(1) La aŭtoro rilatas al la hispanaj konkerintoj de Ameriko. — R. de la Tr.

de l' jarcentoj, pensigis Guyau pri la fiksa-ideo de tiu malfeliĉa frenezulino, kies stranga kaj kortuŝa frenezo kredigis ŝin pri la konstante alvenanta tago de ŝia edziniĝo. — Ludilo de sia enreviĝo, ŝi ĉirkaŭmetis ĉiumatene, sur sian palan frunton, la edziniĝan kronon, kaj ŝi pendigis de sia kapo la edziniĝan vualon. Dolĉe ridetante ŝi pretiĝis poste per akcepti la iluzian fianĉon, ĝis kiam, post senutila atendado, la vesperaj ombroj alportis la senrevigon al ŝia animo. Tiam ŝia frenezo alprenis melankolian nuancon. Sed, je la sekvanta aŭroro, ŝia naŭva fido reaperis; kaj jam sen la memoro de l' pasinta eltrompiĝo, murmurante: "estas hodiaŭ, kiam li venos", ŝi denove ĉirkaŭmetis la kronon kaj la vualon sur sian kapon, kaj denove ŝi ridetis je la espero de l' amato.

Tiel estas, kiam apenaŭ la efiko de idealo estas mortinta, ke la homaro surmetas alifojе siajn edziĝajn belvestojn, por esperi la realiĝon de la revata idealo kun nova kredo, kun persista kaj kortuŝa frenezo. Provoki tiun renoviĝon, ne ŝanĝebla kiel ritmo de la Naturo, estas en ĉiuj tempoj funkcio kaj agado de la junularo. El la animoj de ĉiuj homaj printempoj estas teksita tiu edziniĝa vestaĵo. Kiam oni intencas sufoki tiun ĉi altegan obstinecon de la espero, kiu elŝprucas flugilhava el la sino de la senrevigo, ĉiuj

pesimismoj estas vanaj. Same tiujn, kiuj havas la pravon kiel bazon, kiel tiujn, kiuj baziĝas sur la sperto, oni devas ilin konsideri senutilaj por kontraŭstari la fieran *ne gravas*, kiu elfluas el la profundo de la Vivo. Estas fojoj, kiam, pro ŝajna aliĝo de la triumfa ritmo, trairas la homan historion generacioj, kies destino estas personigi, de ĝia lulilo, la ŝanceliĝon kaj la senkuraĝiĝon. Sed ili pasas, — eble havinte sian idealon, kiel la aliaj, en nea formo kaj kun senkonscia amo; — kaj denove lumiĝas en la homara spirito la espero pri la deziregata Edzo; kies bildo, dolĉa kaj radiant, kiel ĉe la eburaj versoj de la mistikuloj, sufiĉas por subteni la viglecon kaj la kontenton en la vivo, eĉ se neniam ĝi enkarniĝos en la realaĵon.

La juneco, kiu tiel signifas en la animo de la individuoj kaj en tiu de la generacioj, lumon, amon, energion, ekzistas kaj same signifas tion ankaŭ ĉe la proceso evolua de la socioj. De la popoloj, kiuj sentas kaj konsideras la vivon kiel vi, estos ĉiam la fekundeco, la forto, la superrego de la estonteco. — Estis fojo, kiam la atributoj de la homa juneco fariĝis, pli ol en iu alia epoko, la atributoj de popolo, la karakteroj de civilizacio, kaj kiam blovo de ĉarma juneco pasis tuŝetante la serenon frunton de raso. Kiam Grekujo naskiĝis, la dioj donacis al ĝi la

sekreton de neestingebla juneco. Grekujo estas la juna animo. "Kiu en Delfos rigardadas la kompaktan popolamason de la jonioj — diras unu el la Homeraj himnoj —, tiu imagas, ke ili neniam maljuniĝos". Grekujo faris grandajn aferojn, ĉar ĝi havis, el la juneco, la ĝojon, kiu estas la agada medio, kaj la entuziasmon, kiu estas la ĉiopova levilo. La egipta pastro, kun kiu Solono parolis en la templo de Sais, diris al la atena leĝisto kompatante la grekojn pro ilia bruema ŝanĝemo: "Vi estas nur infanoj". Kaj Michelet komparis la aktivecon de la helena animo kun festa ludo, en kies ĉirkaŭo grupiĝas kaj ridetas ĉiuj nacioj de la mondo. Sed el tiu dia infanludado sur la plaĝoj de Arkipelago kaj sub la ombro de la joniaj olivarboj, naskiĝis la arto, la filozofio, la libera penso, la scivolemo por la esplorado, la konscienco pri la homa digneco, ĉiuj tiuj stimuloj de Dio, kiuj estas ankoraŭ nia inspiro kaj nia fiereco. Miregita en sia pastra severeco, la lando de la sacerdoto reprezentadis, dume, la maljunecon, kiu meditkoncentriĝas por provi la eternan ripozon, kaj ĝi forigas, per malestima mano, ĉian frivolan revon. La gracio, la malkvieteco, estas forigitaj el la animaj sinteniĝoj, kiel la vivo el la gesto de ĝiaj figuroj. Kaj kiam la posteularo turnas la rigardojn al la pastra lando, ĝi nur trovas senfruktan koncepton pri

la ordo prezidantan la disvolviĝon de civilizacio vivinta por teksti al si mortotukon kaj por konstrui siajn tombojn: nur la ombbron de cirkelo etendiĝantan sur la sabla senfekundeco.

La kvalitoj de la juna spirito, — la entuziasmo kaj la espero, — estas kompareblaj, en la harmonioj de la historio kaj la naturo, kun la movado kaj la lumo. Kien ajn vi turnos la okulojn, vi ilin trovos, kiel la medion naturan de ĉiuj fortaj kaj belaj estaĵoj. Levu vian rigardon al la plej alta ekzemplo: la kristana ideo, sur kiu ankoraŭ oni pezigas la akuzon, ke ĝi estas malgajiginta la teron foriginte la paganisman ĝojon, estas esence junula inspiro dum ĝi ne malproksimiĝas de sia lulilo. La naskiĝanta kristanismo, ĉe la interpreto de Renan, — kiun mi kredas depli vera, ju pli poezia ĝi estas, — estas kardo de nevelkebla juneco. De anima juneco, aŭ, kio estas sama, de viva revo, de gracio, de purnaiveco, estas komponita la dia aromo, kiu ŝvebas sur la malrapidaj vojiroj de la Majstro tra la kampoj en Galileo; sur liaj predikoj, kiuj disvolviĝas for de ĉia pentofara severeco; apud ĉielblua lago; en la valoj plenegaj de fruktoj; aŭskultataj de “la birdoj ĉielaj” kaj de “la kampaj lilioj”, per kiuj ornamiĝas la paraboloj; disvastigante la ĝojon de la “regno de Dio” sur dolĉan rideton

de la Naturo. De tiu ĉi feliĉa kadro forestas la asketoj, kiuj akompanis en la soleco la pentofarojn de Baptisto. Kiam Jesuo parolas pri tiuj, kiuj lin sekvas, li komparas ilin kun la baptopatroj en la sekvantaro de edziĝofesto. — Kaj estas la impresoj de tiu dia kontento, kiun aliĝantan al la esenco de la nova fido, oni sentas persisti tra la Odiseo de la evangeliistoj; kiu disverŝas en la spiriton de la unuaj kristanaj komunumoj ilian purnai-van feliĉon, ilian simplaniman vivĝojon; kaj kiu, alveninte al Romo kun la nekonataj kristanoj de Transtevere, malfermas al ili facilan pason en la korojn; ĉar ili triumfis oponante la ĉarmon de sia interna juneco — tiu de sia animo balzamigita per la trinko de la nova vino — kontraŭ la severeco de la stoukuloj kaj la kadukeco de la mondumuloj.

Estu, do, konsciaj posedantoj de la benita forto, kiun vi portas interne de vi mem. Ne kredu, tamen, ke ĝi estos sekura kontraŭ frapero aŭ malapero, kiel sencela impulso, en la realeco. De la Naturo estas la donaco de l' multevalora trezoro; sed dependas de la ideoj, ĉu ĝi estos fekunda, aŭ ĉu ĝi vane sin donos, aŭ frakciita kaj disigita en la personaj konsciencoj, ĉu ĝi manifestiĝos en la vivo de la homaj socioj, kiel bonfara forto. — Sagaca verkisto traserĉadis, antaŭ nelonge, en la paĝoj de nia nuntempa romano, — tiu gran-

dega surfaco spegula, kie reflektiĝas tutplene la bildo de la vivo en la lastaj kapturniĝaj cent jaroj, — la psikologion, la animstatojn de la junularo, tiaj, kiaj ili estis en la generacioj vivantaj de la tagoj de René ĝis tiuj, kiuj vidis pasi Des Esseintes. — Lia analizo konstatadis iompostioman malpliigon de *interna juneco* kaj de energio, en la serio de reprezentaj personaĵoj, komencata de la romantikaj herooj, malsanaj, sed ofte viraj kaj ĉiam intensaj je pasio, kaj finata de la malfortiĝintoj je la volo kaj la koro, ĉe kiuj reflektiĝas tiel senkonsolaj manifestiĝoj de niatempa spirito, kiel tiu de la protagonisto de *A rebours*, aŭ tiu de Robert Greslou ĉe *Le Disciple*. — Sed konstatadis la analizo ankaŭ plaĉan renaskiĝon de vicleco kaj de espero ĉe la junulara psikologio, pri kiu kutimas paroli al ni literaturo eble anoncanta pli profundajn transformiĝojn; renaskiĝo personigita de la novaj herooj de Lemaitre, de Wizewa, de Rod, kaj kies plej kompleta reprezentaĵo eble estus *David Grieve*, per kiu iu angla romanistino nuntempa resumis, per unu sola karaktero, ĉiujn malĝojojn kaj ĉiujn idealajn maltrankvilaĵojn de kelkaj generacioj, por ilin solvi per supera malligo de sereneco kaj de amo.

Ĉu tiu espero maturiĝos en la realeco? — Vi, kiuj estas pasontaj, sub la portiko de la

nova jarcento, kiel la laboristo, kiu iras al la laborejoj lin atendantaj, ĉu vi reflektos eble sur la arton, kiu vin studos, bildojn pli lumajn kaj triumfajn ol tiujn restintajn de ni? Se la diaj tempoj, en kiuj la junaj animoj donadis modelojn por la radiantaj dialogistoj de Platono, nur estis eblaj dum nedaŭra printempo de la mondo; se estas necese "ne pensi pri la dioj", kiel konsilas Forquias en la dua akto de *Faŭsto* al la koruso de kaptitinoj; ĉu ni ne estos rajtaj almenaŭ, revii pri la naskiĝo de homaj generacioj, kiuj redonos al la vivo idealan sencon, grandan entuziasmon, en kiuj la sentimento estos potenco; en kiuj fortika reviviĝo de la volaj energioj forkurigos, per heroa kriadado, el la profundo de l' animoj, ĉiujn moralajn malkuraĝojn sin nutrantajn el la mamoj de la senreviĝo kaj de la dubo? Ĉu estos denove la juneco realaĵo de la kolektiva vivo, kiel ĝi estas de la individua vivo?

Tia estas la demando min malkvietiganta, kiam mi rigardas vin. — Viaj unuaj paĝoj, la konfesoj, kiujn vi faris al ni ĝis nun pri via intima mondo, ofte parolas pri hezito kaj pri mirego; neniam pri malfortiĝo, nek pri definitiva frakaso de la volo. Mi bone scias, ke la entuziasmo en vi estas viva elsprucanta fonto. Mi bone scias, ke la senkuraĝigaj kaj doloraj notoj, kiujn la absoluta sincereco de

penso — virto ankoraŭ pli granda ol la espero — povis elirigi el la torturoj de via meditado, dum la malgajaj kaj neeviteblaj alvokoj de la Dubo, ne estis signo de konstanta animstato, nek signifis iaokaze vian malkonfidon rilate al la eterna virtualeco de la Vivo. Kiam angora krio supreniris el la profundo de via koro, vi ne sufokis ĝin, antaŭ ol ĝi pasis tra viaj lipoj, per la severa kaj muta fiereco de stoikulo en la turmentejo, sed vi finigis ĝin per alvoko al la idealo *kiu venos*, kun noto de mesia espero.

Cetere, kiam mi parolas al vi pri la entuziasmo kaj la espero, kiel pri altaj kaj fekundaj virtoj, ne estas mia deziro lernigi vin fari la netransireblan linion, kiu apartigos la skeptikismon de la fido, la senreviĝon de la ĝojo. Nenio estas pli malproksima de mia volo ol la ideo konfuzi kun la naturaj atributoj de la junularo, kun la gracia spontaneeco de ĝia animo, tiun malvigleman frivolecon de la penso, kiu, estante kapabla vidi la aktivecon nur kiel motivon de ludo, aĉetas la amon kaj la vivkontenton je la prezo de sia senkomunikiĝo kun ĉio, kio povos detenigi la paŝon antaŭ la mistera kaj serioza vizaĝo de l' aferoj. — Ne estas tio la nobla signifo de la individua juneco, nek tio ankaŭ tiu de la juneco de l' popoloj. — Mi konsideris ĉiam vana la celon de tiuj, kiuj fari-

ĝinte observemaj viglistoj de la destino de Ameriko, gardistoj de ĝia trankvileco, volus sufoki, per timiga suspektemo, antaŭ ĝia alveno al ni, iun ajn resonadon de la homa doloro, iun ajn elion venintan de fremdaj literaturoj, kiuj, pro ĝia malgajeco aŭ malsano, metus en danĝeron sian optimisman malfortecon. — Nenian firman edukadon de la inteligento oni povas fondi sur la izoleco naiva aŭ sur la vola nescio. Ĉia problemo prezentita de la Dubo al la homa penso, ĉiu sincera akuzo aljetota pri Dio aŭ pri la Naturo, de l' senkuraĝiga kaj dolora sino, havas la rajton esti permesataj alveni al nia konscienco kaj ricevi nian priokupon. Nia komforto devas esti provata akceptante la defion de la Sfinkso, kaj ne evitante ĝian gravegan demandon. Ne forgesu, plie, ke en iaĵ amaraĵoj de la penso, kiel en siaĵ ĝojoj, estas la ebleco trovi deirpunkton por la agado, estas ofte fekundaj sugestoj. Kiam la doloro malfortigas, kiam la doloro estas la nekontraŭstarebla deklivo kondukanta al marasmo aŭ la perfida konsilanto iriganta al la abdikado de la volo, la filozofio ĝin portanta en siaĵ internaĵoj estas afero malinda je junaj animoj. Povas tiam la poeto kvalifiki ĝin kiel "neviglan soldaton militantan sub la standardo de la morto". Sed, kiam tio naskiĝanta el la sino de l' doloro estas la vira luktode-

zirego por konkeri aŭ rehavi la bonon de ĝi al ni rifuzatan, tiam ĝi estas ŝtala ŝprono de la evoluado, ĝi estas la plej potenca impulso de la vivo; ne alimaniere ol kiel la tedeco, por Helvecio, fariĝas la doloro la plej granda kaj plej valora el ĉiuj homaj prerogativoj, de la momento, kiam, malebligante la malfortigon de nia sentemeco con la endormiĝadoj de l' senokupeco, ĝi fariĝas la vigla stimulo por la agado.

Tiasence, oni bone diris ke estas pesimismoj havantaj la signifon de *paradoksa optimismo*. Ne nur ili ne reprezentas la rezignon kaj la kondamnon de la vivo, sed kontraŭe, ili disvastigas, per sia malkontento pri la nuntempo, la neceson renovigi ĝin. Kio gravas por la homaro savi kontraŭ ĉia pesimista neado, ne estas tiagrade la ideo pri la relativa boneco de la nuntempo, sed la ideo pri la ebleco alveni al pli bona celo per la disvolviĝo de l' vivo, akcelata kaj orientata per la klopodo de l' homoj. La fido pri la estonteco, la fido pri la efiko de l' homa klopodo, estas la necesa antaŭaĵo por ĉia energia agado kaj por ĉia fekunda celado. Estas pro tia motivo, ke mi volis komenci varme rekomendante al vi la senmortan bonegecon de tiu fido, kiu, estante instinkto en la junularo, ne bezonas esti trudata al vi de ia instruado,

ĉar vi ĝin trovos nepre lasante agadi en la fundo de via estaĵo la dian sugeston de la Naturo.

Animitaj de tiu sentimento, eniru, do, en la vivon; kiu malfermas al vi siajn profundajn horizontojn, kun la nobla ambicio sentiĝi vian ĉeeston en ĝi, de la momento kiam vi ĝin pltenos kun la fiera rigardo de la konkero. — Al la juneca spirito koncernas la aŭdaca iniciato, la ennoviga genieco. — Hodiaŭ, eble universale, la agado kaj la influo de la junularo en la irado de la homaj socioj, estas malpli efektivaj kaj intensaj ol ili devus esti. Gaston Deschamps rimarkigis tion en Francujo, antaŭ nelonge, komentariante la malfruan eniron de l' junaj generacioj en la publikan vivon kaj en la kulturon de tiu popolo, kaj la malmultan originalecon, per kiu ili kontribuas al la formado de l' superregantaj ideoj. Miaj impresoj pri la estanteco de Ameriko, en tio, kion ili povas havi de ĝenerala karaktero, malgraŭ la dolora izoliteco, en kiu vivas la popoloj ĝin komponantaj, pravigu eble similan rimarkon. — Kaj tamen, mi kredas vidi esprimita ĉie la neceson pri aktiva elmontriĝo de novaj fortoj; mi kredas, ke Ameriko bezonas multe sian junularon. — Jen, kial mi parolas al vi. Jen, kial min interesas eksterordinare la morala orientado de via spirito. La energio de via

parolo kaj via ekzemplo povas atingi la aldonon de la vivaj fortoj de l' pasinteco al la agado de l' estonteco. Mi pensas, kiel Michelet, ke la vera koncepto pri la edukado ne entenas nur la spiritkulturon de l' gefiloj per la sperto de l' gepatroj, sed ankaŭ, kaj multe pli ofte, la spiritkulturon de l' gepatroj per la ennoviga inspiro de l' gefiloj.

Ni parolu, do, pri la maniero, kiel vi konsideros la vivon, kiu atendas vin.

LA diverĝo de la personaj inklinoj donos diversajn sencojn al via aktiveco, kaj ĝi igos econ, difinitan kapablon, superregi en la spirito de vi ĉiuj. — Unuj el vi estos sciencistoj; aliaj estos artistoj; la ceteraj estos agadhomoj. — Sed, super la inklinoj ligontaj vin individue al la malsamaj aplikoj kaj al la diversaj vivmanieroj, devas maldormi, intime en via animo, la konscio pri la fundamenta unueco de via natureco, kiu trudas, ke ĉiu homa individuo estu, antaŭ ĉio kaj super ĉio, nekripligita specimeno de la homaro, en kiu nenia nobla fakulto de la spirito restu nuligita kaj nenia alta intereso por ĉiuj per-

du sian komunikeman virton. Super la profesiaj kaj kulturaj modifoj, estas la plenumo de P' komuna destino de la raciaj estuloj. "Ekzistas universala profesio; ĝi estas tiu de *homo*", admirinde diris Guyau. Kaj rilate al la malekvilibraj kaj partaj civilizacioj, memorante, ke la celo de la homa kreito ne povas esti ekskluzive scii, senti kaj imagi, sed esti reale kaj plene *humana*, Renan difinas la idealon de perfektigo, al kiu ĝi devas envojigi siajn energiojn, kiel la eblecon prezenti, en individua tipo, malgrandigitan kadron de la speco.

Aspiru, do, disvolvi kiel eble plej, ne unu solan econ, sed la tutplenon de via estaĵo. Ne levu la ŝultrojn antaŭ ia nobla kaj fekunda manifestigo de la homa naturo, — sub preteksto, ke via individua organizo ligas vin prefere al malsamaj manifestadoj. Estu atentaj rigardantoj tie, kie vi ne povos esti agantoj. — Kiam ia falsega kaj vulgarigita koncepto pri la edukado, kiu imagas ĝin dediĉita ekskluzive al la utilisma celo, klopodas kripligi per tiu utilismo kaj per tro frua fakistigado, la naturan tutplenecon de la spiritoj, kaj ĝi deziregas forigi el la instruado ĉian sindoneman kaj idealan elementon, ĝi ne prizorgas sufiĉe pri la danĝero prepari por la estonteco mallarĝajn spiritojn, kiuj, kapablaj por konsideri nur la unikan aspekton de la

realo kun kiu ili apude kontaktas, vivos per glaciigintaj dezertoj apartigitaj de la spiritoj, kiuj, interne de la sama socio, estos aliĝintaj al aliaj manifestadoj de la vivo.

La neceso, en ĉiu el ni, de aparta plendediĉo, de nia agado al difinita laboro, al sola kulturmaniero, certe ne esceptas la emon realigi, por la intima spiritharmonio, la komunan destinon de l' raciaj estuloj. Tiu aktiveco, tiu kulturo estos nur la fundamenta noto de l' harmonio. — La fama verso, per kiu la sklavo de l' antikva sceno diris, ke, ĉar li estas homo, nenio homa estas por li fremda, estas parto de la krioj, kiuj, per sia neelĉerpebla senco, resonos eterne en la konscienco de l' homaro. Nia kapablo por kompreni nur devas esti limigata de la neebleco kompreni la mallarĝajn spiritojn. Esti nekapabla vidi pli ol unu solan aspekton de la Naturo, pli ol unu solan el la homaj ideoj kaj interesoj, estas same kiel vivi ĉirkaŭita de ombro traborata de unu sola sunradio. La netoleremo, la ekskluzivismo, kiuj povas meriti pravigon kaj eĉ simpatian, kiam ili naskiĝas el la tirana altrudo de granda entuziasmo aŭ el la debordiĝo de sindonema ideala celo, fariĝas la plej abomeninda el la malsuperaĵoj, kiam, ĉe la rondo de l' vulgara vivo, ili elmontras la limigon de cerbo nekapabla reflekti pli ol unu partan eksterajon de la aferoj.

Malfeliĉe, estas en la epokoj kaj ĉe la civilizacioj, kiuj atingis kompletan kaj rafinitan kulturon, kie la danĝero de tiu spirita limigado havas pli realan gravecon kaj kie ĝi kondukas al pli timigaj rezultatoj. Efektive, volas la evolua leĝo, manifestiganta ĉe la socio, kiel ĉe la Naturo, per kreskanta tendenco al la heterogeneco, laŭgrade antaŭeniras la ĝenerala kulturo de la socioj, ke oni limigu korelative la ampleksojn de l' individuaj kapabloj, kaj oni enzonigu la agadkampojn de ĉiu persono interne de specialeco pli reduktita. Tiu disvolviĝo de la fakista spirito, krom reprezenti necesan kondiĉon de progreso, alportas kun si videblajn malavantaĝojn, kiuj ne limigas sin al mallarĝigo de la horizonto de ĉiu inteligento, falsigante necese sian koncepton pri la mondo, sed pro la disigo de la aminklinoj kaj la individuaj kutimoj, tuŝas kaj malutilas la solidarecan sentimenton. — Aŭgusto Comte bone montris tiun ĉi danĝeron de la progresintaj civilizacioj. Alta stato de socia perfektigiĝo havas, laŭ li, gravan malkonvenaĵon pro la facileco, kiel ĝi kaŭzas la aperon de deformitaj kaj mallarĝaj spiritoj; spiritoj "tre kapablaj laŭ unu maniero, kaj monstre senkapablaj por ĉiuj aliaj". La malgrandigo de homa cerbo per la kontinua interŝanĝo de unu sola speco de ideoj, per la senlima ekzercado de unu sola

modo de aktiveco, estas, laŭ Comte, rezultato komparebla kun la mizera sorto de laboristo, al kiu la labordivido en la laborejo devigas konsumi, per la neŝanĝebla procedo de mekanika detalo, ĉiujn energiojn de sia vivo. En unu kazo kaj en alia, la morala efeko estas inspiri malfeliĉegan indiferentecon por la ĝenerala vidpunto pri la interesoj de l' homaro. "Kaj kvankam tiu ĉi speco de homa aŭtomateco — aldonas la pozitivistan pensulo, — feliĉe nur kaŭzas la ekstreman disigan influon de la specialistiga principo, ĝia realeco, jam tre ofta, trudas, ke oni atribuu al ĝia taksestimado veran gravecon" (1).

Ne malpli ol la fortikecon, tiu disiga influo malutilas al la *estetiko* de la socia strukturo. — La nekomparebla beleco de Ateno, la nepereigebla modelo lasita kiel heredaĵo de ĝiaj diinaj manoj al la admiro kaj raviĝo de l' homaro, naskiĝas el tio, ke tiu urbo de miregindaĵoj fundamentis sian komprenon pri la vivo sur la koncerto de ĉiuj homaj fakultoj en la libera kaj akordiĝanta ekspansio de ĉiuj energioj kapablaj kontribui al la gloro kaj al la povo de l' homoj. Ateno scipovis pligrandigi samtempe la sencon de idealeco kaj la sencon de realeco,

(1) A. Comte: *Cours de philosophie positive*, 4a volumo, paĝo 430, 2a eldono.

la racion kaj la instinkton, la fortojn de l' spirito kaj tiujn de la korpo. Ĝi ĉizis la kvar fakultojn de la animo. Ĉiu libera atenano, por enteni sian agadon, desegnas ĉirkaŭ si perfektan cirklon, en kiu neniu malordigita impulso pasos la gracian proporcion de la linio. Li estas atleto kaj vivanta skulptaĵo en la gimnazio, civitano en la Pnikso, polemikisto kaj pensulo en la portikoj. Li ekzercas sian volon en ĉia vira agado kaj sian penson en ĉia fruktodona priokupo. Tial diras Macaulay, ke unu tago de publika vivo en Atiko estas lerneja programo pli brila ol tiuj, kiujn ni faras por niaj modernaj instruaj centroj. --- Kaj el tiu libera kaj unika florado de la pleneco de nia naturo elsprucis la *greka miraklo*, — neimitbla kaj ĉarma miksaĵo de vigliĝo kaj sereneco, printempo de la homa spirito, rideto de la historio.

En niaj tempoj, la kreskanta komplekseco de nia civilizacio, forigus ĉian seriozecon de la ideo pri rekonstruo de tiu harmonio, nur ebla inter la elementoj de gracia simpleco. Sed interne de la komplekseco mem de nia kulturo, interne de la progresiga diferencigo de karakteroj, de kapabloj, de meritoj, kiu estas la neevitebla sekvo de la progreso en la socia disvolviĝo, estas eble savi pravigan partoprenon de ĉiuj en certaj fundamentaj

ideoj kaj sentimentoj, kiuj subtenu la unuecon kaj la akordiĝon de l' vivo, — en iaj *interesoj de l' animo*, antaŭ kiuj la digno de la racia estulo ne permesas la indiferecon de iu el ni.

Kiam la senco de la materia utileco kaj de la bonvivo, superregas la karakteron de la homaj socioj, tiel energie, kiel numtempe, la rezultatoj de la mallargâ spirito kaj la unuflanka kulturo estas speciale péreigaj por la disvastigo de tiaj priokupoj pure idealaj, kiaj estas amataj de tiuj al ili plendediĉantaj la plej noblajn kaj persistajn energiojn el sia vivo, dum tiaj idealaj priokupoj fariĝas malproksima kaj eble ne suspektata regiono por grandega parto el la aliuloj. — Ĉia speco de meditado sindonema, de ideala rigardado, de intima interpaco, en kiu la ĉiutagaj penoj por la utileco cedos nedaŭre sian superregon al nobla kaj serena rigardo etendiĝanta de la racialteco sur la aferoj, restadas ignorita, en la nuna stato de la homaj socioj, por milionoj da civilizitaj kaj kulturaj animoj, al kiuj la eduka influo aŭ la kutimo kondukas al aŭtomatismo de aktiveco, definitive, materia. — Nu: tiu ĉi speco de servutado devas esti konsiderata, kiel la plej bedaŭrinda kaj malhonora el ĉiuj moralaj punoj. Mi petas vin, ke vi vin defendu, en la lukto de l' vivo,

kontraŭ la kripligo de via spirito per la tiraneco de unika kaj profitiga celo. — Ne liveru al la utileco aŭ al la pasio pli ol unu parton de vi. Eĉ en la sklaveco materia estas la ebleco savi internan liberecon: tiun de la racio kaj la sentimento. Ne pretendu, do, pravigi, per la absorbo de la laboro aŭ la luktado, la sklavecon de via spirito.

Mi trovas la simbolon de tio, kio devas esti nia animo, en rakonto, kiun mi elvokas el polvoplena angulo de mia memoro. — Estis patriarka reĝo, en la nedifinita kaj naiva Oriento, kie ŝatas fari neston la gaja kunfluganta birdaro de l' rakontoj. Lia regno vivadis la naivan infanecon de la tendoj de Ismaelo kaj la palacoj de Pilos'. La tradicio nomis lin poste, en la hommemoro, la gastama reĝo. Grandega estis la reĝa pieco. Al ĝi celis, laŭ sia propra pezo, por en ĝi malaperi, ĉia malfeliĉo. Al lia gastemo alkuris por blanka pano la mizerulo, same kiel la ĉagremita animo, por la balzamo de la karesanta parolo. Lia koro reflektadis, kiel sentbla sonora tabuleto, la ritmon de la aliaj. Lia palaco estis la domo de l' popolo. — Ĉio estis libereco kaj vigliĝo en la interno de tiu ĉi majesta konstruaĵo, kies eniro neniam estis malpermesata de gardistoj. En la malfermitaj portikoj faris rondojn la paŝtistoj, kiam ili

dediĉis sian senokupecon al kamparaj koncertoj; la maljunuloj paroladetiĝis je la vesperigo; kaj freŝaj grupoj de virinoj aranĝadis, sur plektitaj junkoj, la florojn kaj la vinberojn donitajn kiel unikan reĝan imposton. Komercistoj de Ofir', kolportistoj de Damasko, trairadis je ĉiu horo la larĝajn pordojn, kaj ili montradis konkure, antaŭ la rigardoj de la reĝo, la tolaĵojn, la juvelojn, la parfumojn. Apud lia trono ripozadis la premataj pilgrimantoj. La birdoj alflugadis tagmeze por rikolti la panpecetojn de lia manĝotablo; kaj je la sunleviĝo, la infanoj alvenis ope formante bruetemajn bandojn ĉe la litaĵo, kie dormis la reĝo de arĝenta barbo, kaj ili anoncis al li la sunleviĝon. — Same al la malfeliĉaj estuloj, kiel al la senanimaj objektoj, atingis lia senfina disdonemo. La Naturo sentis ankaŭ la altiron de lia sindonema alvoko; ventoj, birdoj kaj plantaĵoj ŝajnis serĉi — kiel en la mito de Orfeo kaj en la legendo de Sankta Francisko de Asis', — la homan amikecon en tiu oazo de gastamo. El la ĝermo hazarde falinta burĝonis kaj floradis, ĉe la interfendetoj de la pavimoj kaj muroj, la levkojoj de l' ruinoj, sen tio, ke kruĉla mano ilin elŝirus, nek malbonfara piedo ilin surpremus. Tra la malfermitaj fenestroj etendiĝis al la interno de l' reĝaj ĉambroj la kuraĝaj kaj scivolemaj lianoj. La laciĝantaj ven-

toj ellasis longe sur la reĝan palacon sian ŝarĝon el aromoj kaj harmonioj. Levigante de la najbara maro, kvazaŭ ili volus zoni ĝin per ĉirkaŭbrako, la ondoj disĝutigis ĝin per sia ŝaŭmo. Kaj paradiza libereco, grandega reciprokeco de konfidoj, subtenadis ie ajn la viklecon de neestingebla festo...

Sed interne, tre interne, izolita el la bruanta palaco per kovritaj kanaloj, kaŝita al la vulgara rigardo — kiel la “perdiĝinta preĝejo” de Uhland en la arbara internaĵo, — ĉe la fino de ignoritaj vojetoj, etendigis mistera ĉambro, kien laŭleĝe neniu povis enmeti la plandon, krom la reĝo mem, kies gastamo sangiĝis, sur ĝia sojlo, je la eksteraĵo de asketa egoismo. Dikaj muroj ĝin ĉirkaŭis. Nek unu elfo de l’ ekstera bruado, nek unu sono foriranta el la koncerto de l’ Naturo, nek unu vorto elparolita de homaj lipoj, povis trapasi la dikecon de l’ ŝtonaj muroj kaj formi aerondon en la malpermesata restadejo. Religia silento en ĝi zorgis pri la ĉasteco de l’ dormanta aero. La lumo, kiun kribris emajlitaj vitraĵoj, alvenis malfortigita, ĝia paso mezurita per neŝanĝebla egaleco, kaj dissolvigis, kiel neĝa floketo falinta sur malvarmetan neston, en la kvieteco de ĉiela medio. Neniam regis tiel profunda paco, nek en oceana kaverno, nek en arbara soleco.

— Kelkafoje, — kiam la nokto estis diafana kaj trankvila, — malfermiĝante, kiel du perlomotaj valvoj, la ornamita plafono — permesis, anstataŭ ĝi, traeniri la belegecon de la serenaj ombroj. En la aero ŝvebis kiel nedisigebla ondo la ĉasta esenco de l' nufaro, la parfumo sugestanta la penseman dormetadon kaj la propran en si mem rigardadon. Seriozaj kariatidoj gardis la eburajn pordojn kun silentiga sintenado. Ĉe la fronto, skulptitaj figurajoj parolis pri idealeco, pri meditado, pri ripozo... — Kaj la maljuna reĝo certigis, ke, kvankam al neniu estus permesata akompani lin ĝis tie, lia gastamo daŭrigis, dum li estis en la mistera rifuĝejo, tiel malavara kaj granda kiel ĉiam, sed tiuj, kiujn li kunigis interne de ĝiaj diskretaj muroj, estis nepalpeblaj invititoj kaj subtilaj gastoj. En ĝi li revis, en ĝi la legenda reĝo liberigis sin de la realeco; en ĝi liaj rigardoj direktiĝis internen, kaj liaj pensoj poluriĝis en meditado, kiel la ŝtonetoj lavitaj de la ŝaŭmo; en ĝi malfaldiĝis sur lia nobla frunto la blankaj flugiloj de Psiko... Kaj poste, kiam la morto venis lin rememorigi, ke li estis nur unu plia gasto en sia palaco, la nepenetrebla ĉambro restis fermita kaj muta por ĉiam; por ĉiam enabismiĝinta en sia senfina ripozo; neniu iam ĝin profanis, ĉar neniu estus kuraĝinta meti la malrespektan piedon tien,

kie la maljuna reĝo volis esti sola kun siaj revoj kaj izolita en la lasta Thule (1) de sia animo.

Mi donas al mia rakonto la scenejon de via interna regno. Malfermita kun saniga liberaleco, kiel la domo de l' fidema reĝo, al ĉiuj mondaj fluoj, ekzistu en ĝi, samtempe, la kaŝita kaj mistera ĉambreto, kiu ne estu konata de la fremdaj gastoj kaj kiu al neniu, krom la serena racio, apartenu. Nur kiam vi eniros ĉe la neprofanchlan rifuĝejon, vi povos, reale, vin nomi liberaj homoj. Ne estas tiaj, kiuj, transigante malsaĝe sian memregadon je favoro de la nekontrolita pasio aŭ la utilisma intereso, forgesas, ke, laŭ la saĝa principo de Montaigne, nia spirito povas esti objekto por prunto, sed ne por cedo. — Pense, revo, admiro: jen la nomoj de la subtilaj vizitantoj de mia ĉelo. La antikvuloj klasigis ilin interne de sia nobla inteligento de l' *senokupeco*, kiun ili havis, kiel la plej altan uzadon de vere racia ekzistado, identigante ĝin kun la penslibereco emancipita el ĉiu malnobla jugo. La nobla senokupeco estis por ili la tempuzado, kiun ili oponis, kiel elmontron de vivo supera, al la ekonomia aktiveco. Ligante ekskluzive al tiu alta kaj aristokrata

(1) Nomo donita de la romanoj al norda insulo de Eŭropo, eble unu el la insuloj Shetland. — R. de la Tr.

ideo de l' ripozo sian concepton pri la indeco de l' vivo, la klasika spirito trovas sian korekton kaj komplementon en nia moderna kredo pri la indeco de l' utila laboro; kaj ambaŭ priatentoj de la animo povas kune komponi, en la individua ekzistado, ritmon, pri kies necesa subtenado neniam estos malĝustatempe insisti. — La stoika skolo, kiu lumigis la vesperiĝon de l' antikva epoko, kiel antaŭigita brilo de la kristanismo, postlasis al ni simplan kaj kortuŝan bildon pri la savo de l' interna libereco, eĉ dum la servutaj rigoroj, per la bela figuro de Kleanto, de tiu Kleanto, kiu devigate uzi la forton de siaj atletaj brakoj por subakvigi la sitelon ĉe fonto kaj por movadi la ŝtonegon de muebilo, dediĉis al meditado la intertempojn de sia mizera laboro, kaj li skribis per sia kala mano, sur ŝtonoj de l' vojo, la maksimumojn aŭditajn de li el lipoj de Zenono. Ĉia racia edukado, ĉiu perfekta kulturado de nia natureco, alprenos, kiel deirpunkton, la eblecon stimuli en ĉiu el ni la duoblan aktivecon, kies simbolo estas Kleanto.

Pliafoje: la fundamenta principo de via disvolviĝo, via devizo en la vivo, devas esti subteni la tutecon de via homa naturo. Nenia aparta funkcio devas iam superi tiun altegan celon. Neniu izolita forto povas plenumi la raciajn celojn de l' individua ekzistado, same

kiel ĝi ne povas naski la ordigitan koncerton de la kolektiva vivado. Kiel la malbelformiĝo kaj la malgrandiĝo estas, ĉe la animo de l' individuoj, la rezultato de ekskluziva celo imponita al la agado kaj unu sola kulturmaniero, tiel la falseco de tio, kio estas artifika, igas efemera la gloron de l' socioj, kiuj oferis la liberan disvolviĝon de sia sentemo kaj sia penso, ĉu al la komerca aktiveco, kiel Fenicio, ĉu al la milito, kiel en Sparto; ĉu al mistikismo, kiel en la miljara teroro; ĉu al la socia vivo kaj al la vivo de salono, kiel en Francujo dum la XVIII^a jarcento. — Kaj antaŭzorgante kontraŭ ĉia kripligo el via morala natureco; aspirante al la harmonia ekspansio de via estaĵo en ĉiu nobla senco; pensu samtempe pri tio, ke la plej facila kaj ofta el la kripligoj, en la nuntempa karaktero de la homaj socioj, estas tiu, kiu devigas la animon senigi sin el tiu speco de *interna vivo*, kie havas sian propran medion ĉiuj delikataj kaj noblaj objektoj, kiujn, en la malŝirmo de l' realeco, bruligas la spiro de l' malpura pasio, kaj kiujn la utilisma intereso forigas: la vivo, kies parto estas la sindona meditado, la ideala pensemo, la antikva *senokupeco*, la nepenetrebla ĉambro de mia rakonto!

KIEL la unua impulso de l' profanado estos sin direkto al tio plej sankta de la sanktejo, tiel la vulgariga reiro, kontraŭ kiu mi avertas vin, komencos oferante tion plej delikatan el la spirito. — El ĉiuj superaj elementoj de racia ekzistado, la belecosento, la klara vido el la beleco de l' objektoj, estas kion plej facile velkigas la senfrukteco de l' vivado limigita je la nevariebla reirado sur la vulgara cirklo, farante ĝin la atributo de malplimulto, kiu gardas ĝin, interne de ĉiu homa socio, kiel la demetaĵon de belega forlaso. La emocio de la beleco estas por la ideal sento, kiel la emajlo por la ringo. La efekto de l' bruta kontakto per ĝi komenciĝas fatale, kaj estas sur ĝi, kiel la unua agas pli sekure. Absoluta indiferenteco estiĝas, tiel, la normala karaktero rilate al tio, kio devus esti universala amo de la animoj. Ne estas pli intensa la mirego de l' sovaĝa homo antaŭ la instrumentoj kaj la materiaj formoj de la civilizacio, ol tiu, kiun sentas relative granda nombro de kulturaj homoj antaŭ la faroj, en kiuj elmontriĝas la intenco kaj la kutimo havigi seriozan realecon al la bela rilato de l' vivo.

La argumento de la perfida apostolo antaŭ la glaso da liliaca ŝmiraĵo senutile diverŝita sur la kapon de l' Majstro, estas, ankoraŭ, unu el la formuloj de l' komuna senco. La superflueco de l' arto ne valoras por la anonima amaso la tricenton da dinaroj. Se hazarde ĝi estas respektata, estas kiel sekreta kulto. Kaj tamen, inter ĉiuj elementoj de homa edukado, kiuj povas kontribui al la formado de granda kaj nobla koncepto pri la vivo, neniu pravigas, pli ol la arto, universalan intereson, ĉar, neniu enhavas, — laŭ la tezo disvolvita en elokventaj paĝoj de Schiller, — la virtualecon de kulturo pli vasta kaj kompleta, en la senco, ke ĝi kunportas akorditan stimulon al ĉiuj fakultoj de la animo.

Kvankam la amo kaj la admiro al la beleco ne reprezentus noblan spontaneecon de la racia estulo, kaj ili ne havus, pro tio, sufiĉan valoron por esti kulturataj per si mem, supera motivo de moraleco estus la kialo, kiu permesus proponi la kulturon de la estetikaj sentoj, kiel alta intereso de ĉiuj. — Se al neniu estas permesate forlasi la edukadon de l' morala sentimento, tiu ĉi devo havas en si mem la devigon prepari la animon por la klara vidadado de l' beleco. Konsideru la edukitan senton de l' belo, kiel la plej efikan kunlaboranton en la formado de delikata

instinkto de justeco. La dignigo, la interna nobligo, neniam havos pli adekvatan artmetiiston. Neniam la homa estulo aliĝos pli sekure al devoplenuo, ol kiam, krom la devosento, li sentos ĝin estetike, kiel harmonion. Neniam la homo estos pli plene bona, ol kiam li scios, en la formoj, per kiuj aktive manifestiĝos lia virto, respekti en la aliuloj la belecosenton.

Certe estas, ke la sankteco de l' bono igas puraj kaj altaj ĉiujn maldelikatajn eksteraĵojn. Ĝi povas sendube realigi sian agadon sen doni al tiu ĉi la eksteran prestiĝon de l' beleco. La karitata amo povas atingi la superbelecon per nedelikataj, malagrablaj kaj vulgaraj rimedoj. Sed, ne nur pli bela, eĉ pli granda estas la karitato, kiu aspiras transdoni sin per delikataj kaj selektaj formoj; ĉar ĝi aldonas al siaj donoj plian bonon, dolĉan kaj neesprimeblan kareson, kiun nenio anstataŭas kaj kiu beligas la faratan bonon, kiel tuŝo de lumo.

Sentigi la belon estas kompatema ago. Kiu trudus, ke la bono kaj la vero elmontriĝu nevarieble per malafablaj kaj severaj formoj, tiuj ŝajnis al mi ĉiam perfidaj amikoj de la bono kaj la vero. La virto estas ankaŭ speco de arto, dia arto; ĝi ridetas patrine al la Gracioj. — La instruo, kiu pretendos fiksi en la spiritoj la ideon de l' devo, kiel tiun

de la plej serioza realaĵo, devas celi komprenigi ĝin samtempe, kiel la plej altan poezion. — Guyau, kiu estas reĝo en la belaj komparoj, utiligas unu neanstataŭeblan, por esprimi tiun ĉi duoblan celon de la morala kulturo. Memoras la pensulo la skulptitajn scĝodorsojn de la fiorejo de gotika preĝejo, en kiuj la ligno laborita sub la inspiro de l' kredo, prezentas en unu flanko scenojn pri vivo de sanktulo, kaj en la alia flanko, ornamajn cirklojn de floroj. Tiamaniere, al ĉiu gesto de la sanktulo, signifa pri lia pieco aŭ lia martirusufero, al ĉiu trajto de lia fizionomio aŭ de lia sintenado, respondas en la alia flanko unu korolo aŭ unu petalo. Por akompani la simbolan reprezentadon de l' bono, staras ĉu lilio, ĉu rozo. Guyau pensas, ke ne alimaniere devas esti skulptita nia animo; kaj li mem, la dolĉa majstro, ĉu ne estas, pro la evangelia beleco de lia apostola genio, ekzemplo de tiu viva harmonio?

Mi kredas nedubeble, ke tiu, kiu ellernis distingi delikaton de vulgare, malbelaĵon de belaĵo, troviĝas en duonvojo por distingi la malbonon de la bono. Ne estas, certe, la bongusto, kiel volus ia malĉasta *diletantismo* morala, la sola kriterio por taksi la laŭleĝecon de la homaj agoj; sed malpli devas esti konsiderata, per la kriterio de mallarĝa asketismo, kiel tento de la eraro kaj kiel trompa

subakva sablaĵo. Ni ne montros ĝin, kiel la vojon mem de la bono; sed kiel paralelan vojon proksiman, kiu estigas en ĝia apudeco la paŝon kaj la rigardon de l' vojaĝanto. Laŭ grade ke la homaro irados antaŭen, oni komprenos pli klare la moralan leĝon, kiel estetikon de la konduto. Oni evitos la malbonon kaj la eraron, kiel malbelsonon; oni serĉos la bonon, kiel la plezuron de harmonio. Kiam la estoika severeco de Kant inspiras, simbollante la spiriton de lia etiko, la severajn vortojn: "Mi dormis, kaj mi sonĝis, ke la vivo estas beleco; mi vekigis, kaj mi vidis, ke ĝi estas devo", li ne scias, ke, se la devo estas la supera realaĵo, en ĝi povas trovi realon la objekto de lia revo, ĉar la konscienco de l' devo donos al li, kun la klara vidado de l' bono, la komplezon de la belo.

En la animo de l' savanto, de l' misiisto, de l' filantropo, oni devas ankaŭ altrudi *komprenon de beleco*; estas necese, ke kunlaboru iaj elementoj de la artista genio. Estas grandega la parto, kiu apartenas al la kapablo eltrovi kaj malkaŝi la intiman belecon de la ideoj, en la efiko de l' grandaj moralaj revolucioj. Parolante pri la plej alta el ĉiuj, povis diri Renan profunde, ke "la poezio de la regulo, kiu igas lin ami, estas pli signifa ol la regulo mem, alprenita kiel abstrakta vero". La originaleco de l' agado de Jesuo ne

estas, efektive, en la laŭlitera signifo de lia doktrino, — tial ke ĝi povas rekonstruiĝi tute plene sen eliri el la moralo de l' Sinagogo, serĉante ĝin de *Deuteronomio* ĝis *Talmud*, — sed en tio, ke ĝi faris sentehla per lia prediko la poezion de la regulo, tio estas, ĝian intiman belecon.

Pala gloro estos tiu de la epokoj kaj la kredoj, kiuj malestimos tiun estetikan rilaton de sia vivo aŭ de sia propagando. La kristana asketismo, kiu ne sciis prizorgi pli ol unu solan flankon el la idealo, eligis el sia koncepto pri la perfektigo ĉion, kio faras aminda, delikata kaj bela la vivon; kaj ĝia mallarĝa spirito servis por ke la nedresebla instinkto de la libereco, returnante en unu el tiuj furiozaj reakcioj de la homa spirito, nasku, en la Renesanca Italujo, civilizacian tipon, kiu konsideris vanta la moralan bonon, kaj nur kredis je la virto de la forta kaj gracia eksteraĵo. La puritanismo, kiu persekutis ĉian belecon kaj ĉian intelektan selekton; kiu vualis indigninte la ĉastan nudecon de la statuoj; kiu praktikis la afektadon de la malbeleco, en la manieroj, en la vestaĵo, en la paroladoj; la malgaja sekto, kiu trudante sian spiriton de la angla parlamentejo, ordonis estingi la festojn, kiuj elmontrus ĝojon kaj fortranĉi la arbojn, kiuj donus florojn, — etendis apud la virto, pro ĝia apartigo de

la belecosento, ombron de morto, kiun ankoraŭ Anglujo ne forigis tute, kaj kiu daŭras en la malpli amindaj elmontradoj de ĝia religieco kaj ĝiaj kutimoj. — Macaulay deklaras preferi la senartan "plumban keston", en kiu puritanoj gardas la trezoron de la libereco, ol la belegan skulptitan kofron, en kiu la korteganaro de Karolo II^o faris kolekton de siaj rafinaĵoj. Sed, tial ke la libereco kaj la virto ne bezonas esti gardataj en plumba kesto, multe pli ol ĉiuj severaĵoj de asketoj kaj de puritanoj, valoros ĉiam, por la edukado de l' homaro, la gracio de l' antikva idealo, la harmonia moralo de Platono, la pura kaj eleganta movo, per kiu la mano de Ateno prenis, por ĝin porti al la lipoj, la pokalon de l' vivo.

La perfektigo de la homa moraleco konsistis el enfiltrado de la karitata spirito en la muldilojn de la greka eleganteco. Kaj tiu ĉi milda harmonio havis en la mondo nedaŭran realiĝon. Kiam la parolo de la naskiĝanta kristanismo alvenis kun Sankta Paŭlo al la interno de l' grekaj kolonioj de Macedonio, al Tesaloniko kaj Filipos, kaj la Evangelio, ankoraŭ pura, disvastiĝis en la animo de tiuj delikataj kaj spiritaj socioj, en kiuj la sigelo de la helena kulturo subtenis ĉarman spontanecon de distingo, oni povis kredi, ke la du idealoj plej altaj el la historio estis

plektiĝontaj por ĉiam. Ĉe la epistola stilo de Sankta Paŭlo restas la postsigno de tiu momento, kiam la karitato heleniĝas. Tiu ĉi dolĉa kunuleco daŭris mallonge. La harmonio kaj sereneco el la pagana koncepto de la vivo apartiĝis ĉiufoje pli de la nova ideo, kiu tiam iradis al la konkero de l' mondo. Sed por imagi la manieron, kiel oni povus montri en la morala perfektigado de la homaro unu paŝon antaŭen, estus necese revii, ke la kristana idealo reamikiĝas denove kun la serena kaj lumiga ĝojo de la antikveco; imagi al si, ke la Evangelio disvastiĝas ali-foje en Tesaloniko kaj Filipos.

Kulturi la bonguston ne signifas nur perfektigi eksteran formon de la kulturo, disvolvi artistan kapablon, prizorgi, per superflua ĉarmo, elegantecon de la civilizacio. La bongusto estas "firma brido de la kriterio". Martha povis atribui al ĝi ekzakte la signifon de dua konscienco, kiu orientas nin kaj redonas nin al la lumo, kiam la unua mal-lumiĝas kaj ŝanceliĝas. La delikata sento de la beleco estas, laŭ Bagehot, kunligito de la sekura saĝo en la vivo kaj de la digneco en la kutimoj. "La edukado de la bongusto — diras la saĝa pensulo — celas favori la ekzercadon de la bonsenco, kiu estas nia ĉefa apogpunkto en la komplekso de la civilizita vivo". Se kelkafoje vi vidas, en la spirito de la in-

dividuoj kaj la socioj, tiun ĉi edukon kuni-
gitan kun la perdo de l' sento aŭ la
moraleco, estas pro tio, ke en tiaj kazoj ĝi
estas kulturita kiel izolita kaj ekskluziva
forto, dum malebliĝas tiamaniere la efiko pri
morala perfektigo, kiun ĝi povas efektivigi
ĉe kulturordo, en kiu neniu spirita fakulto
estos disvolvata apartigante sian rilaton kun
la aliaj. — En la animo, kiu ricevis harmo-
nian kaj perfektan stimolon, la intima gracia
kaj la delikateco de la belecosento estos sama
afero kun la forto kaj la justeco de la ra-
cio. Ne alimaniere rimarkas Taine, ke, en la
grandaj konstruaĵoj de la antikva arkitek-
turo, la beleco estas sentiga elmonro de la
solideco, la eleganteco identiĝas kun la forto-
ŝajno: “la samaj linioj de Partenono, kiuj
plaĉas al la rigardo per harmoniaj propor-
cioj, kontentigas la inteligenton per prome-
soj de eterneco”.

Estas organika rilato, natura kaj intima
simpatio, kiu ligas la renversojn de la senti-
mento kaj de la volo kun la falsaj kaj la
perfortoj de l' malbongusto. Se estus al ni
permesate penetri en la misteran laborato-
rion de l' animoj, kaj se oni rekonstruus la
intiman historion el tiuj de la pasinteco, por
eltrovi la formulon de ĝiaj definitivaj mora-
laj karakteroj, estus interesa studobjekto de-
termini la parton, kiu apartenas, inter la

kaŭzoj de la rafinita perverso de Nero, al la ĝermo de monstra histrionismo ellasita de la afekta retoriko de Seneko en la animon de tiu sangavida aktoraĉo. Kiam oni elvokas la oratormanieron de la Konvencio, kaj oni vidas aperi ĉie, kiel la kata felo de l' jakobinismo, la kutimo de abomeninda retorika perversiĝo, estas neeble ne rilatigi, kiel la radiojn elirantajn el sama centro, kiel la akcidentojn de sama frenezeco, la perdon de l' bongusto, la kapturiniĝon de l' morala senco kaj la fanatikan limiĝadon de la racio.

Nedubeble, inter la rezultatoj de la estetiko, neniu estas pli efektiva ol tiu, kiu lernigas nin distingi, en relativa sfero, la bonon kaj la veron, de la belo, kaj akcepti la eblecon de beleco de l' malbono kaj de l' eraro. Sed ne estas necese ne koni tiun ĉi veron, *definitive* veran, por kredi pri la simpatia enkateniĝo el ĉiuj tiuj altaj celoj de l' animo, kaj konsideri ĉiun el ili kiel deirpunkton, ne unikan, sed pli certan, de kie estu eble sin direkti al renkonto de la aliaj.

La ideo pri supera akordiĝo inter la bongusto kaj la morala senco estas, do, ekzakta, same ĉe la spirito de l' individuoj, kiel ĉe la spirito de l' socioj. Rilate ĉi tiujn lastajn, tiu akordiĝo povus havi sian simbolon, laŭ aserto de Rosenkranz, en tiu, kiu ekzistas unuflanke inter la libereco kaj la morala

ordo, kaj aliflanke, inter la beleco de l' homaj formoj, kiel rezultato de l' disvolviĝo el la rasoj en la tempo. Tiu tipa beleco reflektas, laŭ la Hegelana pensulo, la ennobligan efekton de la libereco; la sklaveco malbeligas kaj malnobligas samtempe; la konscio pri ilia harmonia disolviĝo donas al la liberaj rasoj la eksteran distingilon de ilia beleco.

En la karaktero de l' popoloj, la kvalitoj devenintaj de delikata gusto, la majstreco de la graciaj formoj, la delikata kapablo interresigi, la fakulto fari amindaj la ideojn, identiĝas, plie, kun la "propaganda genio", — tio estas, kun la pova kvalito de l' universaleco. Oni bone scias, ke, grandparte, al la posedo el tiuj selektaj atributoj, oni devas atribui la *homan* signifon, kiun la franca spirito trafe komunikas al ĉio, kion ĝi elektas kaj aplikas. — La ideoj akiras potencajn kaj rapidajn flugilojn, ne en la glaciita internaĵo de l' abstrakteco, sed en la luma kaj varma medio de la formo. Ĝia disvastiga superceco, ĝia superapliko, kelkafoje, dependas de tio, ke la Gracioj estu banintaj ilin per sia lumo. Tiaj estas, en la evoluoj de l' vivo, tiuj ĉarmaj eksteraĵoj de la Naturo, kiuj ŝajnas reprezenti, ekskluzive, la donaĵon de kaprica superflueco, — la muziko, la pentrita plumaro de la birdoj, kaj, kiel reklamo por la insekto disvastiganta la fekundan polenon,

la nuanco de la floroj, ĝia parfumo, — ili estas plenumintaj, inter la elementoj el la vitala konkurenco, realegan funkcion; pro tio, ke, signifante superecon de motivoj, preferigan kaŭzon por la amaj altiroj, ili estas supervivigintaj, ĉe ĉiu speco, la estulojn pli bone dotitajn pri beleco super la malpli avantaĝe dotitaj.

En spirito, en kiu ekzistas la instinkta amo al la belo, estas, sendube, ia genro de turmentigo en la rezignacio ĝin defendi per serio da argumentoj, kiuj sin bazas sur alia pravo, sur alia principo, ol la mem senresponda kaj sindona amo al la beleco, en kiu trovas sian kontentiĝon unu el la fundamentaj impulsoj de la racia ekzistado. Bedaŭrinde, tiu ĉi supera motivo perdas sian majstrecon sur grandega nombro da homoj, al kiuj estas necese lernigi la respekton devigatan al tiu amo de ili nepartoprenata, montrante al ili la rilatojn, kiuj ligas ĝin al aliaj specoj de homaj interesoj. — Por tio, oni devos lukti tre ofte kontraŭ la vulgara koncepto pri tiuj ĉi rilatoj. Efektive: ĉio, kio celos mildigi la konturojn de l' socia karaktero kaj la kutimojn; kio celos akriigi la belecosenton; kio celos fari el la gusto delikatan impresblecon de l' spirito, kaj de la gracio universalan formon de l' aktiveco, egalvaloras, por la kriterio de multaj fervo-

ruloj de la severeco kaj de l' utileco, unue, malpliigi la viran kaj heroan karakteron de la socioj, kaj due, ĝian utilan kaj pozitivan kapablecon. — Mi legis en *La Laboristoj de la Maro* (1), ke, kiam vaporŝipo sulkgis unuafoje la ondojn de la Manĉa Markanalo, la kamparanoj de Jersey malbenis ĝin je nomo de populara tradicio, kiu konsideris la akvon kaj la fajron kiel neakordiĝeblajn elementojn, kaj antaŭmalbondire destinitaj al la malpacigo. — La komuna kriterio abunde kredas pri similaj malamikaĵoj. — Se vi celas vulgariĝi la respekton al la belo, komencu komprenigi la eblecon pri harmonia koncerto de ĉiuj laŭleĝaj homaj aktivajoj, kaj tiu ĉi tasko estos pli facila ol la laboro ŝanĝi rekte la amon al la belco, per si mem, en atributon de la homamaso. Por ke la plej multo el la homoj ne sentu sin inkлина *forpeli la hirundojn el la domo*, sekvante la konsilon de Pitagoro, estas necese argumenti al ili, ne per la monaĥa gracio de la birdo, nek per ĝia virta legendo, sed per tio, ke la restado de ĝiaj nestoj estas neniel kontraŭaj al la sekureco de l' tegmentoj!

(1) *Les Travailleurs de la mer*, romano de Victor Hugo. — R. de la Tr.

KONTRAŬ la koncepto de la racia vivo, kies fundamento estas la libera kaj harmonia disvolviĝo de nia natureco, kaj kiu, tial, enhavas inter siaj esencaj celoj, tiu, kiu kontentiĝas per la sentata rigardado al la belo, staras — kiel regulo de la homa konduto — la utilisma koncepto, laŭ kiu, nia aktiveco, tute kompleta, sin orientas en rilato al la tuja celo de l' intereso.

La kulpigo pri mallarĝa utilismo, kiun oni kutimas direkti al la spirito de nia jarcento, je nomo de la idealo, kaj kun anatemaj rigoroj, baziĝas parte sur la nescio, ke la titanaj klopodoj por la subigo de l' naturaj fortoj al la homa volo kaj por la disvastiĝo de la materia bonstato, estas laboro necesa, kiu preparos, kiel la laboran riĉiĝon de elĉerpita tero, la floradon de estontaj idealismoj. La nedaŭra superreĝo de tiu utileca funkcio, kiu absorbis, el la maltrankvila kaj febra vivo de ĉi tiuj cent jaroj, ĝiajn plej potencajn energiojn, klarigas, tamen, — se ne pravigas ilin, — multajn dolorajn nostalgiojn, multajn malkontentecojn kaj ofendojn kontraŭ la inteligento, kiuj havas sian espri-

mon, ĉu per melankolia kaj laŭdega idealigo de la pasinteco, ĉu per kruela malespero pri la estonteco. Ekzistas, pro tio, fekundega, kaj bonega penso, en la celo de iu grupo da pensuloj el la lastaj generacioj, — inter kiuj mi nur volas citi pliafoje la noblan figuron de Guyau, — kiuj intencis sigeli la definitivan akordiĝon de la progresoj de nia jarcento kun la renovigo de multaj malnovaj homaj fervoroj, kaj kiuj eluzis en tiu benita agado tiom da antrezoroj, kiom da genio.

Ofte, certe vi aŭdis atribui al du fundamentaj kaŭzoj la troigon de l' utilisma spirito, kiu karakterizas la moralan fizionomion de l' nuna jarcento, kun malpliigo pri la *estetika* kaj sindona konsiderado al la vivo. Unu estas la eltrovoj de la naturscienco — kiu, laŭ komentariistoj, ĉu kontraŭaj, ĉu favoraj al ili, konverĝas al detruo de ĉiu idealco en ĝia bazo; — la alia estas la universala disvastiĝo kaj la triumfo de l' demokratiaj ideoj. Mi celas paroli al vi ekskluzive pri tiu ĉi lasta kaŭzo; ĉar mi fidus je tio, ke via unua inicio pri la eltrovoj de l' scienco estas direktita en la senco antaŭeviti al vi la danĝeron de vulgara kompreno. — Sur la demokratio pezas la kulpigo, ke ĝi gvidas la homaron, vulgarigante ĝin, al Sankta Imperio de l' utilismo. La akuzo reflektiĝas kun vibranta intenseco en la paĝoj —

laŭ mi, ĉiam plenaj je sugestiga ĉarmo — de la plej aminda inter la majstroj de la moderna spirito: en la allogaj paĝoj de Renan, al kies aŭtoritato jam vi aŭdis min kelkafoje aludi, kaj pri kiu mi pensas paroli al vi ofte. — Legu Renan tiuj el vi, kiuj lin ignoras ankoraŭ, kaj vi lin amos kiel mi. — Neniu, kiel li, inter la modernaj verkistoj, ŝajnas al mi majstro de tia arto “lernigi gracie”, kiun Anatole France konsideris dia. Neniu trafis, kiel li, la akordigon de la ironio kun la pieco. Eĉ en la analiza rigoro, li scias meti la respekton de la sacerdoto. Kvankam li lernigas dubi, lia rava mildeco etendas balzaman ondon sur la dubon. Liaj pensoj kutime grandiĝas, interne de nia animo, per efioj tiel neesprimeblaj kaj tiel nebulaj, ke ili pensigas pri religia muziko de ideoj. Pro lia senfina ideala komprenebleco, la kritikaj klasikoj kutimas karakterizi en li la gajan skeptikismon de la diletantoj, kiuj faras maskan vestaĵon el mantelo de filozofo; sed, se iajfoje vi intimiĝas en lia spirito, vi vidos, ke la vulgara toleremo de la skeptikuloj distingiĝas de lia toleremo, kiel la ĝentila gaste-meco de salono, de la vera karitata sentimento.

Pensas, do, la majstro, ke alta priokupo pri la *idealaj interesoj* de la homspeco estas tute kontraŭa al la spirito de l' demokratio.

Li pensas, ke la koncepto pri la vivo, en socio kie regos tiu spirito, alĝustigōs progrese al la ekskluziva celado al la materia bonstato, kiel bono disvastigebla inter la plej granda nombro da personoj. Laŭ li, ĉar la demokratio estas la entroniĝo de Kaliban, Ariel devos esti la venkito en tiu triumfo. — Ekzistas abundaj asertoj similaj al ĉi tiuj de Renan, en la parolo de multaj el la plej karakterizaj reprezentantoj, kiujn la interesoj de la estetika kulturo kaj la spirita selekto havas en la nuntempa penso. Tiel, Bourget estas inklina kredi, ke la universala triumfo de l' demokrataj institucioj igos perdi al la civilizacio en profundeco tion, kion ĝi gajnos en vasteco. Li vidas ĝian perfortan finon ĉe la superrego de vulgara individuismo. "Kiu diras demokration — aldonas la sagaca aŭtoro de *Andreo Cornelis* — diras progresan disvolviĝon de l' individuaj tendencoj kaj malpliĝon de la kulturo". En la problemo, kiun prezentas tiuj ĉi severaj juĝoj, estas vivega intereso por ni, kiuj amas — samtempe — pro konvinko, la agadon de la Revolucio, kiu en nia Ameriko kunligiĝas, plie, kun la gloroj de ĝia Genezo, kaj pro instinkto, la eblecon atingi noblan kaj selektan spiritan vivon, kies majesta sercneco neniel estu oferata al la kapricoj de l' homamaso. — Por alfronti la problemon estas necese komence

rekonu, ke, kiam la demokratio ne plialtigas sian spiriton per la influo de forta ideala priokupo dividanta sian superregon kun la priokupoj de l' materiaj interesoj, ĝi kondukas fatale favori la vulgarecon, kaj al ĝi mankas, pli ol al iu alia reĝimo, efikaj baroj por sekurigi, ĉe adekvata medio, la neprofaneblecon de l' alta kulturo. Forlasita al si mem, — sen la konstanta rektifikado de aktiva morala aŭtoritato puriganta kaj direktanta ĝiajn tendencojn en la sencon de la dignigado de l' vivo, — la demokratio estingos laŭgrade ĉian ideon de supereco ne celanta al pli granda kaj pli kuraĝa kapablo por la luktoj pro la profito, kiuj estos tiam la plej malnobla formo de la brutajoj de l' forto. — La spirita selekto, la plialtigo de l' vivo per la ĉesto de malprofitemaj stimuloj, la gusto, la arto, la mildeco en la kutimoj, la admirsento por ĉiu persista ideala celado, kaj la respektosento por ĉiu nobla supereco, estos kiel sendefendaj malfortaĵoj tie, kie la socia egaleco, kiu detruis la imperativajn kaj senfundamentajn hierarkiojn, ne anstataŭos ilin per aliaj, kiuj havos en la morala influo sian unikan manieron de superrego, kaj sian principon en racia klasigo.

Ĉia egaleco de kondiĉoj en la socia ordo, kiel ĉia homogeneco en la ordo de la Naturo, estas nefiksa ekvilibro. De la momento,

kiam la demokratio estos realiginta sian nean agadon per la ebenigado de ĉiuj maljustaj superaĵoj, la konkerita egaleco povas por ĝi nur signifi deirpunkton. Mankas la jesa agado. Kaj tiu ĉi, en la demokratio, kaj ĝia gloro konsistos naskigi, per efikaj stimuloj, en ĝia sino, la elmontriĝon kaj superregon de la *veraj* homaj superaĵoj.

Rilate al la vivokondiĉoj en Ameriko, tiu ĉi bezono precizigi la veran koncepton de nia socia reĝimo, fariĝas duoble imperativa. La rapida kreskado de niaj demokratioj per la senĉesa alveno de granda kosmopolita homamaso, per la enmigrada alfluo — kiu aliĝas al socia nukleo ankoraŭ malforta por realigi aktivan asimilan laboron kaj envojiĝi la homan alflulon per la rimedoj, kiujn prezentas la centjara solideco de la socia strukturo, la sekura politikordo kaj la elementoj de kulturo intime enradikiĝinta, — riskos nin es-tonte en la danĝerojn de l' demokratia degenerado, kiu sufokas sub la blinda forto de l' amaso ĉian kvalitan ideon; kaj kiu, fidante al la hazarda mallerteco por sia hierarkia ordigado, perforte kondukas al la triumfo de la plej malpravigaj kaj malnoblaj super-recoj.

Sendube, nia egoista intereso devus konduki nin — se virto mankus, — al gastamo. De antaŭlonge la supera neceso plenigi la

moralan malplenon de l' dezerto, igie diri al eminenta verkisto, ke, en Ameriko, *regadi estas homplenigi*. — Sed tiu ĉi fama formulo enhavas veron, kontraŭ kies mallarĝa kompreno estas necese gardi sin, ĉar ĝi igus nin atribui senkondiĉan civilizigan efikon al kvanta valoro de la homamaso. — Regadi estas homplenigi, asimilante, unue; edukante kaj selektante, poste. — Se la apero kaj florado, en la asocio, de la plej altaj homaj aktivecoj, el tiuj kiuj kondukas al la alta kulturo, bezonas, kiel neevitebla kondiĉo, la ekziston de multnombra kaj densa loĝantaro, estas, precize, ĉar tiu kvanta graveco de la loĝantaro, kaŭzante la plej kompleksan labordividon, ebligas la formadon de fortaj direktistaj elementoj, kiuj efektivigos la regadon de la *kvalito* super la *kvanto*. La homomulto, la anonima homamaso, estas nenio per si mem. La homamaso estos instrumento de barbareco aŭ de civilizacio, laŭ tio, ĉu al ĝi mankos aŭ ne la koeficiento de alta morala direktado. Estas profunda vero en la fundo de Emerson-paradokso, kiu trudas, ke ĉiu lando de la terglobo estu juĝata laŭ la malplimulto kaj ne laŭ la plimulto el siaj loĝantoj. La civilizacio de popolo akiras sian karakteron, ne per la elmontoj de sia prospero aŭ de sia materia grandeco, sed per la superaj manieroj de pensado kaj sentado

eblaj en tiaj elmontroj; kaj jam Comte observis, por montri, kiel en aferoj de intelekto, de moralo, de sentimento, estus sensece pretendi, ke la kvalito povos esti anstataŭata, en neniu kazo, de la kvanto, ke la akumulado de multaj vulgaraj spiritoj neniam havigos la egalvaloron de genia cerbo, nek la akumulado de multaj virtoj mezgravaj, la egalvaloron de abnegacia aŭ heroa ago. — Se nia demokratio starigus la universalecon kaj la egalecon pri la rajtoj, ĝi estigus, do, la malnoblan superregon de la kvanto, se ĝi ne prizorgus alte subteni la koncepton pri la aŭtentikaj homaj superecoj, kaj fari el la aŭtoritato ligita al la popola voĉdono, ne la esprimon de l' sofismo pri la absoluta egaleco, sed, laŭ la vortoj, kiujn mi memoras el franca verkisto, “la efektivigon de la hierarkio emananta el la libereco”.

La kontraŭstaro inter la demokrata reĝimo kaj la alta vivo de l' spirito fariĝas fatala realaĵo, kiam tiu reĝimo signifas la neigadon de la propraj malegalaĵoj kaj la anstataŭigon de l' kredo pri la *heroismo* — en la senco de Carlyle — per melianika koncepto pri regado. — Ĉio, kio en la civilizacio estas io pli ol elemento de materia supereco kaj de ekonomia prospero, formas relieŝon, kiu baldaŭ estas ebenigata, kiam la morala aŭtoritato apartenas al mezgrada spirito. — Dum

foresto de la invada barbareco, kiu puŝas siajn hordojn sur la lumigajn lumturojn de la civilizacio, per heroa kaj kelkafoje regeneriga grandeco, la alta kulturo de la socioj devas sin antaŭzorgi kontraŭ la trankvila kaj disiga agado de tiuj aliaj pacaj hordoj, eble poluritaj, la neeviteblaj hordoj de la vulgareco, — kies Atilo povus personiĝi en Mr. Homais, kies heroismo estas la ruzeco je la servo de instinkta malŝateco al ĉia grandeco; kies atributo estas la ilo ebeniga. — Estante la ne malkvietigebla indiferenteco kaj la kvanta supereco, la normalaj elmontroj de ĝia forto, estas pro tio kapablaj alveni al la epopea kolero kaj cedi al la impulsoj de la atakemo. Charles Morice nomas ilin tiam “falangoj el kruelaj Prudhommes, kiuj havas kiel devizon la vorton *mezgrade* kaj ili marŝas animataj de la malamo al ĉio eksterordinara”.

Altigintaj, tiuj Prudhommes faros el sia triumfanta volo ĉasorganizon kontraŭ ĉio, kio elprovas flugokuraĝon kaj flugokapablon. Ilia socia formulo estos demokratio, kiu kondukos al konsekrado de pontifiko “Iu-ajn”, al la kronado de reĝo “Unu-el-tiomaj”. Ili malamos, en la merito, ribelon. En iliaj teritorioj ĉia nobla supereco troviĝos en la samaj kondiĉoj kiel la marmora statuo starigita ĉe la bordo de ŝlima vojo, de kie la ĉaro pa-

santa vipebatas ĝin per koto. Ili nomos la dogmatismen de la vulgara senco, scio; la mizeran sekecon de la koro, seriozeco; la perfektan alkutimigon al mezgradeco, sana kriterio; kaj la malbonan guston, vira senzorgo. — Ilia koncepto pri la justeco igus ilin anstataŭigi, en la historio, la senmortecon de la supera homo, ĉu per la egaleco de ĉiuj en la komuna forgeso, ĉu per la egaliga memoro de Mitridato, pri kiu oni rakontas, ke li konservadis en sia memoro la nomojn de ĉiuj siaj soldatoj. Ilia respublikana maniero kontentiĝus donante decidan aŭtoritaton al la prova procedo de Fox, kiu kutimis eksperimenti siajn projektojn per la kriterio de T' deputito al li ŝajnanta la plej perfekta personigo de la *country-gentleman*, pro la limigo de liaj kapabloj kaj la maldelikateco de liaj gustoj. Kun ili oni estos en la limoj de la *zookratio*, pri kiu parolis unufoje Baudelaire. La Titanio de Shakespeare, donanta kison al la azena kapo, povus esti la simbolo de la Libereco donanta sian amon al la mezgraduloj. Neniam, per plej fekunda konkero, oni povos alveni al plej fatala rezultato!

Ebriigu al la ripetanto de la mezgradecaj senriverencoj, kiun vi vidas pasi apud vi; tentu lin montriĝi kiel heroo; ŝanĝu lian buroklatan kvietecon en aginklinon de savonto, — kaj tiam vi havos la malamikeman kaj

senindulgan malamon kontraŭ ĉia beleco, kontraŭ ĉia digneco, kontraŭ ĉia delikateco de la homa spirito; malamo, kiu estas tre malŝata, pli ol la barbara sangoversado, en la jakobena tiraneco, kiu, antaŭ sia juĝistaro, ŝanĝas en kulpojn la scion de Lavoisier, la genion de Chénier, la dignecon de Malesherbes; kiu, inter la kutimaj krioj en la Konvencio, aŭdigas la vortojn: *Malkonfidu tiun homon, kiu faris libron!*; kaj kiu, rilatante la idealon de l' demokrata simpleco al primitiva *natura stato* el Rousseau, povus elekti la simbolon de l' malakordo de ĝi starigata inter la demokratio kaj la kulturo, en la vinjeto, kun kiu igis akompani tiu genia sofisto la unuan eldonon de sia fama mallaŭdego kontraŭ la artoj kaj la sciencoj, je nomo de la moralo en la kutimoj: senprudenta eaturuso, kiu pretendante ĉirkaŭpreni, lumavida, la torĉon mane portatan de Prometeo, aŭdas al la titanfilantropo diri, ke lia fajro estas mortiga al tiu, kiu ĝin tuŝas!

La egaliga krueleco ne elmontris siajn perfortojn en la demokrata disvolviĝo de nia jarcento, nek ĝi kontraŭstaris per brutaj manieroj la serenecon kaj sendependecon de la intelekta kulturo. Sed, laŭ maniero de kruela besto, en kies domigitaj posteuloj estus sangiginta la atakemo per perfida kaj malnobla dolĉanimeco, la egalismo, en la milda formo

de la *tendenco al la utileco kaj al la vulgareco*, povas esti reala kaŭzo por akuzo kontraŭ la demokratio de la XIX^a jarcento. Ne haltis antaŭ ĝi iu delikata kaj sagaca spirito, kiun kelkaj el ĝiaj rezultatoj angore ne pensigis pri la socia kaj la politika problemoj. Forpelante indignenergion, el la homa spirito, tiun falsan koncepton pri la egaleco, kiu sugestis la deliraĵojn de la Revolucio, la alta nuntempa penso subtenis, samtempe, pri la realeco kaj pri la teorio de la demokratio, severan ekzamenon, kiu permesos al vi, la kunlaborantoj en la estonta agado, fiksi vian deirpunkton, certe ne por detrui, sed por eduki la spiriton de l' reĝimo, kiun vi trovas starantan.

De kiam nia jarcento akiris personecon kaj sendependecon ĉe la evoluo de l' ideoj, dum la germana idealismo korektis la egaligan utopion de la filozofio de l' XVIII^a jarcento, kaj ĝi laŭdegis, kvankam kun kutima cezarama tendenco, la rolon rezervitan en la historio al la individua supereco, la pozitivismo de Comte, ne rekonante al la demokrata egaleco alian karakteron ol tiun de "nedaŭra solvilo por la antikvaj malegalaĵoj", kaj neante samkonvinke la definitivan efikon de la popola suvereneco, serĉis en la principoj de l' naturaj klasifikoj la fundamenton de la sociala klasigo, kiu devus ansta-

taŭi la ĵus detruitajn hierarkiojn. — La kritiko de la demokrata realaĵo fariĝas formosevera dum la generacio de Taine kaj de Renan. Vi scias, ke al tiu ĉi delikata kaj bonanima atenano nur kontentigis la egaleco de tiu socia reĝimo, se ĝi estis, kiel en Ateno, “egaleco de duondioj”. Rilate al Taine, estas li, kiu skribis la *Originoj de la nuntempa Francujo*; kaj se, unuflanke, lia koncepto pri la socio kiel organismo, kondukas lin logike al forpuŝo de ĉia ideo pri unuformeco kontraŭstaranta la principon de la organaj dependoj kaj subregoj, aliparte, lia delikata instinkto pri intelekta selekto igas lin abomeni la invadon de la popolamaso en la suprojn. La grava voĉo de Carlyle jam estis predikinta, kontraŭ ĉia egaliga malrespekto, la respekton al *heroismo*, komprenante kiel tian, la kulton al iu ajn nobla supereco. Emerson reflektas tiun voĉon en la internaĵo de la plej pozitivema el la demokratioj. La nova scienco parolas pri selekto, kiel neceso de ĉia progreso. Interne de l’ arto, kie la selektosenco havas sian plej naturan adaptiĝon, vibras kun profunda resonado la notoj eligantaj la spiritan senton *de strangaĵo*, kiel ni povus ĝin nomi, meze de la modernaj vivkondiĉoj. Por ilin aŭskulti ne estas necese alproksimiĝi al parnasanismo de delikata kaj malsana praularo, kiun aristokrata malestimo

al la estanteco kondukis al enfermiĝo en la pasinteco. Inter la konstantaj inspiroj de Flaubert — de kiu oni kutimas devenigi rekte la plej demokratigitan el ĉiuj literaturaj skoloj, — nenia pli intensa ol la malamo de la mezgradeco kuraĝigita de l' egaligo kaj de la senresponda tiraneco de l' nombro. — Interne de tiu nuntempa literaturo de la Nordo, kie tiel viva estas la priokupo pri la altaj socialaj aferoj, montriĝas ofte la esprimo de l' sama ideo, de l' sama sentimento; Ibsen disvolvas la malhumilan admonon de sia "Stóckmann" ĉirkaŭ la aserto, ke "la kompaktaĵoj plimulto estas la danĝero plej danĝera por la libereco kaj la vero"; kaj la grandega Nietzsche prezentas kontraŭ la idealo de mezgradigita homaro, la apoteozon de l' animoj, kiuj elstariĝas super la homara nivelo, kiel viva marfluo. — La vivega deziro pri korekto de l' socia spirito, kiu sekurigu al la vivo de l' *heroeco* kaj de la pensado pli puran medion el digneco kaj justeco, vibras hodiaŭ tra ĉiuj lokoj, kaj oni povus diri ke ĝi faras unu el la fundamentaj akordoj, kiujn tiu ĉi jarcenta ekfino proponas por la harmonioj komponotaj de la estonta jarcento.

Kaj tamen, la spirito de la demokratio estas, esence, por nia civilizacio, principo de vivo, kontraŭ kiu estus senutile ribeli. La

malkontentaĵoj sugestitaj de l' malperfektaĵoj de ĝia *historia* aktuala formo, estas kondukinta ofte al la maljusteco por tio, kion tiu reĝimo havas kiel definitiva kaj fekunda. Tiel, la saĝa aristokratismo de Renan formulas la plej eksplikajn kondamnon de la fundamenta principo de l' demokratio: la egaleco de rajtoj; li opinias tiun ĉi principon nepre eksigita el ĉiu ebla superrego de la intelekta supereco; kaj li eĉ montras en ĝi, per energia imago, "*la antipodojn de la vojoj de Dio*, — pro tio, ke Dio ne volis, ke ĉiuj vivadu samgrade la spiritan vivon". — Tiuj ĉi maljustaj paradoksoj de la majstro, kompletigitaj de lia fama idealo pri ĉiopova oligarkio el saĝaj homoj, estas kompareblaj al la troigita kaj aliformigita ripetigo, en sono, el reala kaj fekunda penso, kiu priokupis nin dum la maldormo. — Ne rekoni la agadon de la demokratio, en tio, kio estas esenca, ĉar, ankoraŭ ne finita, ĝi ne atingis kunakordigi definitive sian egaligan celon kun forta socia garantio pri selekto, egalvaloras ne rekoni la agadon, paralelan kaj kunakordan, de la scienco, ĉar interpretita per la mallarĝa kriterio de skolo, ĝi povis malutili kelkafoje la religian spiriton aŭ la poezian spiriton. — La demokratio kaj la scienco estas, efektive, la du neanstataŭeblaj piedestaloj, sur kiuj ripozas nia civilizacio; aŭ, espri-

mante tion per frazo de Bourget, la du "laboristoj" de niaj estontaj destinoj. "En ili ni estas, ni vivas, ni nin movas". Ĉar estas, do, malsaĝe pensi, kiel Renan, atingi konsekron pli pozitivan por ĉiuj moralaj superecoj, la realaĵon pri rezonita hierarkio, la efikan superregon de la altaj kvalitoj de l' inteligento kaj de l' volo, per la *detruo* de la demokrata egaleco, nur oni povas pensi pri la *edukado* de la demokratio kaj pri ĝia reformo. Oni povas pensi, ke iom post iom enradikiĝos, en la sentimentoj de l' popolo kaj en ĝiaj kutimoj, la ideo pri la necesaj subigoj, la kono de l' veraj superecoj, la konscia kaj spontanca kulto por ĉio, kio, laŭprave, multiplikas la ciferon de l' homa valoro.

La popola edukado, konsiderata rilate al tia agado, kiel ĉiam, kiam oni ĝin rigardas per la estonteca penso, akiras superegan intereson (1). Estas en la lernejo, tra kies manoj ni klopodas, ke pasu la malmola argilo de l' popolamasoj, kie troviĝas la unua kaj

(1) "Ju pli la instruado disvastiĝas, des pli ĝi devas doni sian parton al la ĝeneralaj kaj malvaraj ideoj. Oni kredas ke la popola instruado devas esti nealta kaj mallarĝa. La kontraŭo estas la vero". — Fouillée: *L'idée moderne du droit*, lib. 5-o, IV. — R. de la A. (La aŭtoro publikigas tiun ĉi citaĵon laŭ la libro de Fouillée en franca lingvo).

plej malavara elmonro pri la socia natura justeco, kiu starigas por ĉiuj la aliron en la scipovon kaj en la plej efikajn rimedojn de supereco. Ĝi devas kompletigi tiel noblan taskon celante prefere kaj zorge la edukadon de l' orda senco, de l' ideo kaj la volo pri la justeco, de l' sento pri la veraj moralaj aŭtoritatoj.

Nenia distingo pli facile kunmiksiĝas kaj nuliĝas en la popola spirito, ol tiu, kiu instruas, ke la demokrata egaleco povas signifi egalan *eblecon*, sed neniam egalan *realecon*, pri influo kaj prestiĝo, inter la membroj de organizita socio. En ili ĉiuj ekzistas identa rajto por aspiri al la moralaj superecoj, kiuj devas pravigi kaj fundamenti la efektivajn superaĵojn; sed nur al tiuj, kiuj atingis reale la posedon de l' unuaj, devas esti havigata la premio de la lastaj. La vera, la digna koncepto pri la egaleco, ripozas sur la penso, ke ĉiuj raciaj estuloj estas dotitaj de la Naturo per fakultoj kapablaj por nobla disvolviĝo. La devo de la Ŝtato konsistas en tio, ke ĝi estigas ĉiujn membrojn de la socio en nemalsamajn kondiĉojn por celi al sia perfektigo. La devo de la Ŝtato konsistas en la antaŭdispono pri la adekvataj rimedoj por instigi, egalkondiĉe, la elmontriĝon de l' homaj superecoj, kie ajn ili ekzistos. Tiamaniere, post tiu ĉi dekomenca egaleco, ĉia mal-

egalaĵo estos pravigata pro tio, ke ĝi estos la sankcio de la misteraj elektoj de l' Naturo aŭ de l' merita klopodo de la volo. — Kiam oni ĝin imagas tiel, la demokrata egaleco ne nur ne kontraŭstaras la selekton de l' kutimoj kaj de l' ideoj, sed ĝi estas la plej efika instrumento de spirita selekto, ĝi estas la *providenca* medio de la kulturo. Ĝin favoros ĉio, kio favoros la superregon de la inteligenta energio. Ne alisence povus aserti Tocqueville, ke la poezio, la elokvento, la spiritaĵoj, la radilumoj de l' imago, la pensa profundeco, “ĉiuj tiuj animaj donaĵoj, disdonitaj hazarde de la ĉielo”, estis kunlaborantoj en la agado de l' demokratio, kaj ili ĝin servis, kvankam ili troviĝis en la kampo de ĝiaj kontraŭuloj, ĉar ĉiuj konverĝis elmontri la naturan, la nehereditan grandecon, por kiu nia spirito estas kapabla. — La superemo, kiu estas la plej potenca stimulo inter ĉiuj, kiuj povas superinstigi same la vigecon de l' penso, kiel tiun de l' ceteraj homaj aktivecoj, bezonas samtempe la egalecon en la deirpunkto, por ekzisti, kaj la malegalecon, kiu donos avantaĝojn al la plej kapablaj kaj plej bonaj, kiel fina celo. Nur demokrata reĝimo povas kunakordi en sia sino tiujn du kondiĉojn por la superemo, kiam ĝi ne degeneras en niveligan egalismon kaj ĝi sin limigas konsideri, kiel belan idealon de perfek-

tigbleco, estontan ekvivalenton de la homoj per ilia supreniro al la sama kulturgrado.

Racie komprenita, la demokratio akceptas ĉiam nepreskripteblan aristokratan elementon, kiu konsistas en la starigo de l' supereco de la plejbonuloj, asekurigante ĝin per la libera konsento de la asocioj. Ĝi konsekras, kiel la aristokratioj, la kvalitecan distingon; sed ĝi solvas ilin favore al la reale superaj kvalitoj, — tiuj de la virto, de la karaktero kaj de la spirito, — kaj sen pretendi ilin senmovigi en klasojn estigitajn aparte de la aliaj, kiuj subtenus favore al si la abomenindan kastan privilegion, ĝi renovigas senĉese sian gvidantan aristokrataron en la vivaj fontoj de l' popolo, kaj ĝi igas ĝin akcepti per la justeco kaj la amo. Rekonante tiamaniere, en la selekto kaj en la superrego de l' plej kapablaj, neceson por ĉiu progreso, ĝi forigas de tiu universala leĝo de la vivo, per ĝia sankcio en la socia ordo, la humiligan kaj doloran efekton, kiu, en la konkurencoj de l' Naturo kaj en tiuj de la aliaj sociaj organizoj, estas la kruela sekvo de l' venkito. "La granda leĝo de la natura selekto — lumige diris Fouillée — daŭrigos realiĝante en la sino de l' homaj socioj, sed ĝi nur realiĝos pli kaj pli tra vojo de libereco". La malaminda karaktero de l' tradiciaj aristokratarioj devenis de tio, ke ili estis maljustaj, pro sia

fundamento, kaj subpremantaj, ĉar ĝia aŭtoritateco estis impono. Hodiaŭ ni scias, ke ne ekzistas alia laŭleĝa limo por la homa egaleco, ol tiu, kiu konsistas en la superrego de l' inteligento kaj de l' virto, konsentite de ĉies libereco. Sed ni scias ankaŭ, ke estas necesa la reala ekzisto de tiu ĉi limo. — Aliparte, nia kristana koncepto pri la vivo instruas nin, ke la moralaj superecoj, kiuj estas motivo por rajtoj, estas precipe motivo por devoj, kaj ke ĉiu supera spirito estas devigata por la aliaj en egala proporcio, kiel ĝi preterpasas ilin per la kapablo realigi la bonon. La kontraŭegalismo de Nietzsche — kiu tiel profundan sulkon montras en tio, kion ni povus nomi nia moderna *literaturo de ideoj*, — portis al sia pova rehavo de la rajtoj, kiujn li konsideras eniĝintaj en la homajn superecojn, abomenindan, reakcian spiriton; ĉar, neante ĉian fratecon, ĉian kompaton, metas en la koron de la *superhomo*, kiun li diigas, satanan malestimon por la malriĉuloj kaj por la malfortuloj; li laŭleĝigas en la privilegiuloj de l' volo kaj de l' forto la funkcion de l'ekzekutisto; kaj per logika decido li, finfine, eĉ asertas, ke "la socio ne ekzistas por si, sed por siaj elektitoj". — Certe, ne estas tia monstra koncepto, kian oni povas kontraŭmeti, kiel standardon, kontraŭ la falsa egalismo aspiranta al la niveligado de ĉiuj

per la komuna vulgareco. Bonŝance, dum ekzistos en la mondo laobleco aranĝi du lignopecojn laŭkruce, — tio estas: ĉiam, — la homaro daŭrigos kredante, ke la amo estas la fundamento de ĉiu firma ordo, kaj ke la hierarkia supereco en la ordo nur devas esti supera kapablo por ami!

Fonto de neelĉerpeblaj moralaj inspiroj, la nova scienco sugestas nin, klarigante la leĝojn de l' vivo, la manieron, laŭ kiu la demokrata principo povas kunakordiĝi, en la organizado de l' homaj socioj, kun *aristarkio* de la moralo kaj de la kulturo. — Unuflanke, — kiel rimarkigis, plurfoje, en simpatia libro, Henri Bérenger, — la asertoj de la scienco kontribuas por sankcii kaj fortikigi en la socio la demokratan spiriton, elmontrante kiel granda estas la natura valoro de l' kolektiva klopodo; kia estas la grandeco de la agada parto rezervita al la anonima kaj senbrila kunlaboranto en ia ajn elmontro el la universala disvolvigo. Ne malpli ol la kristana revelacio, plialtigas la dignecon de l' humiluloj tiu ĉi nova revelacio, kiu atribuas, en la Naturo, al la agado de l' senfine malgrandaj etuloj, al la laboro de l' nummulito kaj de l' briozoo en la malluma profundo de l' abismo, la konstruadon de l' geologiaj fundamentoj; kiu elŝprucigas el la vibrado de senforma kaj primitiva ĉelo la tutan leviĝan-

tan impulson de l' organikaj formoj; kiu manifestas la potencan rolon, kiun, en nia psika vivo, estas necese atribui al la fenomenoj pli sensajnaj kaj malprecizaj, cê al la nedaŭraj perceptoj, pri kiuj ni ne havas konscion; kaj kiu, cnirante en la sociologion kaj en la historion, redonas al la heroismo, ofte abnegacia, de l' popolamasoj, la parton neitan de l' silento en la gloro de l' individua heroo, kaj evidentigas la malrapidan amasiĝon de la esploroj, kiuj tra l' jarcentoj, en la ombro, en la laborejo, aŭ en la laboratorio de forgesitaj laboristoj, preparas la eltrovojn de l' genio.

Sed, samtempe, kiam la scienco manifestas tiel la senmortan efikon de l' kolektiva klopodo, kaj dignigas la partoprenon de l' ignorataj kunlaborintoj en la universala agado, ĝi montras, kiel, en la grandega socio de l' objektoj kaj de l' estuloj, estas necesa kondiĉo por ĉiu progreso la hierarkia ordo; estas principo de l' vivo la interrilatoj de dependo kaj subiĝo inter la individuaj membroj de tiu socio kaj inter la elementoj de l' individua organizo; kaj fine, estas neceso nedisigebla de la universala leĝo de *imitado*, se oni rilatas ĝin kun la perfektigo de l' homaj socioj, la ekzisto, en ili, de vivaj kaj influaj modeloj, kiuj plialtigu ilin per la iompostioma ĝeneraliĝo de ĝia supereco.

Por montri nun, kiel ambaŭ universalaj instruoj de la scienco povas fariĝi faktoj, kunakordiĝantaj en la organizo kaj en la spirito de l' socio, sufiĉas insisti pri la koncepto de nobla, justa demokratio; de demokratio gvidata per la kono kaj la sentimento de l' veraj homaj superecoj; de demokratio, en kiu la superrego de l' inteligento kaj de l' virto, — unikaj limoj por la primerita ekvivalento de la homoj, — ricevu sian aŭtoritaton kaj sian prestiĝon de la libereco, kaj ĝi malsupreniru sur la homamasojn en la bonfara elverŝo de l' amo.

Samtempe, kiam ĝi kunakordigos tiujn du rezultatojn de la naturorda observado, efektiviĝos interne de simila socio — kiel tion rimarkigas Bérenger, en la sama libro, pri kiu mi parolis al vi, — la harmonio de la du historiaj impulsoj, kiuj transdonis al nia civilizacio ĝiajn esencajn karakterojn, la principojn reguligajn de ĝia vivo. — El la kristanisma spirito, naskiĝas, efektive, la sento de egaleco, falsigita per ia asketika malŝato al la spirita selekto kaj al la kulturo. El la heredo de l' klasikaj civilizacioj naskiĝas la senco de l' ordo, de la hierarkio, kaj la religia respekto al la genio, falsigitaj per ia aristokrata malestimo al la humiluloj kaj al la malfortuloj. La estonteco sintezos, per senmorta formulo, ambaŭ sugestojn de la es-

tinteco. La demokratio, tiam, estos triumfinta definitive. Kaj ĝi, kiu pravigas la kolerajn protestojn kaj la amarajn melankoliojn de tiuj, kiuj kredis oferitaj de ĝia triumfo ĉian intelektan distingon, ĉian revon artan, ĉian delikatecon de la vivo, kiam ĝi minacas per la malnobla, niveliga egaligilo, ĝi havas, ankoraŭ pli ol la malnovaj aristokrataroj, neprofaneblajn sekurojn por la kulturado de l' animaj floroj, kiuj velkas kaj pereas en la vulgareca medio kaj inter la brutajoj de l' tumulto!

LA utilisma koncepto, kiel ideo de la homa destino, kaj la egaleco en la mezgrado, kiel normo de la socia proporcio, komponas, intime interrilatante, la formulon de tio, kion oni kutimis nomi, en Eŭropo, la spiriton de *amerikanismo*. — Estas neeble mediti pri ambaŭ inspiroj de la konduto kaj de la sociemo, kaj kompari ilin kun tiuj, kiuj ilin kontraŭstaras, sen tio, ke la asocio insiste alportu al la menso la imagon de tiu grandega kaj fekunda demokratio, kiu, tie en la Nordo, montras la manifestajojn de sia

prospero kaj sia povo, kiel miregigan pruvon, kiu favore bonkreditigas la efikon de ĝiaj institucioj kaj de la direkto de ĝiaj ideoj. — Se oni povis diri pri la utilismo, ke ĝi estas la verbo de la angla spirito, Usono povas esti konsiderata, kiel la enkorpiĝo de la utilisma verbo. Kaj la Evangelio de tiu ĉi verbo disvastiĝas ĉien pere de la materiaj mirakloj de la triumfo. Hispan-Ameriko jam ne estas tute kvalifikebla, rilate al ĝi, kiel tero de paganoj. La potenca federacio estas realiganta inter ni ian moralan konkeron. La admiro al ĝia grandeco kaj al ĝia forto estas sentimento grandapaŝe antaŭeniranta en la spiriton de niaj gvidantaj homoj, kaj ĉble ankoraŭ pli en tiun de la homamasoj, ensorĉeblaj de la triumfa impresoj. — Kaj de la admiro oni pasas, per facilega transigo, al la imito. La admiro kaj la kredo estas ja, por la psikologo, pasivaj manieroj de imito. “La imitema tendenco de nia morala naturo — diris Bagehot — havas sian sidejon en tiu parto de l’ animo, kie ekzistas la kredebleco”. — La vulgaraj senco kaj spertado estus sufiĉaj por estigi per si solaj tiun simplan rilaton. Oni imitas tiun, pri kies supereco aŭ pri kies prestiĝo oni kredas. — Estas tiel, kiel la imagaĵo de Ameriko *mallatinigita* propravole, sen la konkera perforto, kaj regenerita poste laŭ bildo kaj simileco de la

norda ĉeftipo, ŝvebas jam super la revoj de multaj ŝinceraj interesatoj pri nia estonteco, ĝi inspiras la ĝuon kun kiu ili faras ofte la plej sugestajn paralelojn, kaj ĝi montriĝas per konstantaj celadoj al ennovigo kaj reformo. Ni havas nian *nordomanion*. Estas necese kontraŭmeti al ĝi la limojn kunakorde montratajn de la prudento kaj de la sentimento.

Mi ne donas al tiaj limoj la sencon de absoluta neo. — Mi komprenas bone, ke oni akiru inspirojn, lumojn, instruojn, en la ekzemplo de l' fortuloj; kaj mi ne ignoras, ke inteligenta atento fiksita al ekstero, por reflekti de ĉie la bildon de l' bonfaro kaj de l' utileco, estas rimarkinde fekunda, kiam ĝi rilatas al popoloj, kiuj ankoraŭ formas kaj modelas sian nacian esencon.

Mi bone komprenas, ke oni aspiru korekti, per la persista edukado, tiujn karakterajn trajtojn de l' homa socio, kiuj bezonas kunakordiĝi kun novaj altrudiĝoj de la civilizacio kaj kun novaj oportunaĵoj de la vivo, ekvilibrante tiel, per ennoviga influo, la heredajn kaj la kutimajn fortojn. — Sed mi ne vidas la gloron, nek en la intenco aliformigi la karakteron de l' popoloj, — ilian *personan* genion, — por imponi al ili la identiĝon kun fremda modelo, al kiu ili oferus la neanstaŭteblan originalecon de sia spirito; nek en

la kredo naiva, ke oni povos tion atingi iam per artifikaj kaj improvizitaj procedoj de imitado. Tiu senpripensa transigo de tio, kio estas natura kaj spontanea en iu socio, al la sino de alia ne havanta radikojn, nek en la naturo, nek en la historio, egalvaloras, laŭ Michelet, al la prov-ago aligi, per simpla aldono, mortintajon al viva organismo. En societemo, kiel en literaturo, kiel en arto, la senkonsidera imitado neniam faros alion, ol aliformigi la modelajn liniojn. La trompiĝo de tiuj, kiuj pensas esti reproduktintaj esence la karakteron de homa socio, ĝiajn vivajn spiritajn fortojn, kaj kun ili, la sekreton de ĝiaj triumfoj kaj de ĝia prospero, kopiante ekzakte la mekanismon de ĝiaj institucioj kaj la eksterajn formojn de ĝiaj kutimoj, pensigas pri la iluzio de l' purnaivaj komentantoj, kiuj imagas esti alproprigitaj al si la genion de l' majstro, kiam ili kopiis la formojn de lia stilo aŭ liajn komponajn procedojn.

En tiu vana klopodo estas, plie, mi ne scias kia malnobla afero. Speco de politika snobismo oni povus nomi la klopodan imiton de tio, kion faras la superregantoj kaj la fortuloj, la venkintoj kaj la bonsortuloj; genro de servuta abdiko, kiel en tiu, kiu en kelkaj el la snoboj por ĉiam enkatendigataj al la satira turmento per la libro de Thacke-

ray, faras triste konsumiĝi la kuraĝajn energiojn ne helpitajn de l' Naturo aŭ de la fortuna, en la senpotenca imitado de l' kapricoj kaj ŝanĝemaĵoj de la sociaj eminentuloj. — La prizorgado pri la *interna* nedependeco, — tiu de l' personeco, tiu de l' kriterio, — estas precipega formo de la propra respekto. En la etikaj traktatoj, oni kutimas komenti moralan principon de Cicerono, laŭ kiu estas parto de la homaj devoj, ke ĉiu zorgu kaj ŝaluze subtenu la originalecon de sia persona karaktero, tion en ĝi enhavatan, kio ĝin diferencigos kaj determinos, respektante, en ĉio, kio ne estos neadekvata por la bono, la primitivan impulson de l' Naturo, kiu estas bazinta sur la diversa distribuado de siaj donaĵoj, la ordon kaj la koncerton de l' mondo. — Kaj ankoraŭ ŝajnus al mi pli granda la superrego de l' regulo, se oni ĝin aplikus kolektive al la karaktero de l' homaj socioj. — Eble vi aŭdos diri, ke ne ekzistas propra kaj difinita sigelo, pro kies restado, pro kies pureco oni devus batali, en la aktuala organizado de niaj popoloj. Eble mankas, en nia kolektiva karaktero, la certa konturo de la "personeco". Sed en foresto de tiu morala kondiĉo perfekte diferencigita kaj aŭtonoma, ni — latinamerikanoj — havas rasherdaĵon, grandan etnologian tradicion por konservi, sanktan ligilon, kiu kunigas nin

al senmortaj paĝoj de la historio, konfidante al nia honoro ĝian continuadon de la estonteco. La kosmopolitismo, kiun ni devas akcepti kiel ne kontraŭstareblan neceson de nia formado, ne forigas, nek tiun fidelecan sentimenton por la pasinteco, nek la direktigan kaj formigan forton, kun kiuj la rasgenio devas imponi sin en la refandiĝo de l' elementoj kunestigontaj la definitivan amerikanon de l' estonteco.

Oni rimarkis pli ol unufoje, ke la grandaj historiaj evoluoj, la grandaj epokoj, la plej lumaj kaj fekundaj periodoj en la homara disvolviĝo, estas preskaŭ ĉiam la rezultato de du malsamaj kaj samtempaj fortoj, kiuj subtenas, per la koncertiĝintaj impulsoj de sia kontraŭstaro, la intereson kaj la stimulon de l' vivo, kiuj malaperus, pleneĉerpitaj, en la kvieteco de absoluta unucco. — Tiel, sur la du polusoj de Ateno kaj Lakemonio sin apogas la akso en kies ĉirkaŭo turniĝas la karaktero de l' plej genia kaj civiliziga el la rasoj. — Ameriko bezonas subteni en la estanteco la originalan ducon de sia formado, kiu ŝanĝas en realaĵon de sia historio la miton klasikan de la du agloj samtempe ellasitaj de unu kaj alia monda poluso, por ke ili samtempe alvenu al la limo de siaj superregoj. Tiu ĉi genia kaj stimula diferenco ne forigas, sed ĝi toleras kaj

eĉ favoras, en multegaj aspektoj, la solidaran konkordon. Kaj se supera konkordo povus esti ekvidata, de niaj tagoj, kiel la formulo de malproksima estonteco, ĝi ne estus ŝuldata al la *unuflanka imitado* — kiel dirus Tarde — de unu raso al la alia, sed al la reciprokeco de iliaj influoj kaj al la trafa koncertado de l' atributoj, sur kiuj la gloro de la du fundamentiĝas.

Aliflanke, en la senpasia studo de tiu civilizacio, kiun kelkaj proponas al ni, kiel unikan kaj absolutan modelon, ekzistas motivoj ne malpli konvinkaj ol tiuj, kiuj baziĝas sur la maldigneco kaj la malkonveneco rezigni ĉian celadon al originaleco, por moderigi la entuziasmojn de tiuj, kiuj trudas al ni sian idolan konsekron. Kaj mi alvenas, nun, al la rilato, kiun rekte havas, kun la ĝenerala senco de tiu ĉi parolado mia, la komentario pri tia spirito de imitado.

Ĉiu severa juĝo farota pri la nordaj amerikanoj (1) devas komenci oferante, kiel oni farus kun eminentaj kontraŭuloj, la kavaleran formalecon de saluto. — Mia spirito sen-

(1) Por bone kompreni la sintenadon de Rodó kaj liajn juĝojn rilate al Usono, la leganto ne forgesu, ke tiu ĉi libro estis verkita antaŭ kvindek jaroj. — Vidu en la fino la Aldonon de la Tradukinto, dediĉita al la sekvantaj paragrafoj pri la nord-amerikanoj. — R. de la Tr.

tas sin facile preta por ĝia plenumo. — Ne rekoni iliajn difektojn ne ŝajnus al mi tiel senseca, kiel nei iliajn kvalitojn. Naskiĝintaj — uzante la paradokson uzitan de Baudelaire alirilite — kun la *denaska sperto* de la libereco, ili tenadis sin fidelaj al sia origina leĝo, kaj ili disvolvis, laŭ la precizeco kaj certeco de matematika progresio, la fundamentajn principojn de sia organizado, donante al sia historio konsekvenca unuecon, kiu, kvankam ĝi forigis la akirojn de malsamaj kapabloj kaj meritoj, havas la intelektan belecon de la logiko. — La postsigno de iliaj paŝoj neniam malaperos el la historio de la homrajto, ĉar ili estis la unuaj, kiuj aperigis nian modernan koncepton pri la libereco, el la provaj necertecoj kaj el la utopiaj imagaĵoj, por ĝin ŝanĝi en neperean bronzon kaj en vivantan realaĵon; ĉar ili elmontris per sia ekzemplo la eblecon etendi tra grandega nacia organismo la firman aŭtoritaton de respubliko; ĉar, per sia federacia organizo, ili evidentigis — laŭ la trafa esprimo de Tocqueville — la manieron, kiel oni povas akordigi kun la brilo kaj la povo de grandaj ŝtatoj, la feliĉon kaj la pacon de la malgrandaj. — Al ili apartenas kelkaj el la plej aŭdacaj faroj, per kiuj reliefe distingigos, en la tempa perspektivo, la agado de tiu ĉi jarcento. Al ili apartenas la gloro esti

plenmontrinta — akcentante la plej firman noton de morala beleco de nia civilizacio — la grandecon kaj la povon de l' laboro: tiu ĉi benita forto, kiun la antikva epoko forlasis al la sklava malnobleco, kaj kiun hodiaŭ ni identigas kun la plej alta esprimo de la homa digneco, bazita sur la konscio kaj la aktiveco de l' propra merito. Fortaj, persistaj, konsiderante la senokupon, kiel malhonoron, ili metis en manon de la *mechanic* (mekanikisto) el siaj laborejoj kaj de la *farmer* (farmisto) el siaj kampoj, la mitan Heraklean bastonegon, kaj ili donis al la homa genio novan kaj neatenditan belecon, almetante ĉirkaŭ lia korpo la felan antaŭtukon de l' forĝisto. Ĉiu el ili antaŭeniras al la vivokonkero, kiel iradis antaŭen en la konkeron de l' dezerto la unuaj puritanoj. Persistemaj fervoruloj de tiu kulto al la individua energio, kiu faras el ĉiu homo la krcanton de sia destino, ili modelis sian sociemecon en imagan aron de Robinsonaj ekzempleroj, kiuj, post kiam ili estos krude fortigintaj sian personecon per la praktiko de l' propra helpo, iros formi la filamentojn de firmega teksaĵo. — El la asocia spirito, ne oferante al ĝi tiun suverenan koncepton pri la individuo, ili sciis fari samtempe, la plej mirindan instrumenton por sia grandeco kaj por sia superrego; kaj ili atingis el la sumo

de la homfortoj, subigita al la celoj de l' esplorado, de la filantropio, de la industrio, rezultatojn des pli admirindaj, pro tio, ke ili estas atingataj konservante la plej absolutan tutecon de la persona aŭtonomio. — Ekzistas en ili veka kaj nekontentigebla instinkto de sciemo, senpacienca avideco de ĉia lumo; kaj praktikante fiksidee, kvazaŭ glora kaj fekunda monomanio, la amon por la popola instruado, ili faris el la lernejo la plej certan fundamenton de sia prospero, kaj el la infana animo la plej zorgatan inter la delikataj kaj belegaj estaĵoj. — Ilia kulturo, kiu estas malproksime de rafineco kaj de spiriteco, havas mirindan efikon ĉiam, kiam ĝi pretendas praktike realigi tujan celon. Ili ne aldonis al la sciencaj akiroj unu solan ĝeneralan leĝon, unu solan principon; sed ili igis magia la sciencon, pro siaj mirindaj aplikajoj, ili gigantigis ĝin en la utileca sfero, kaj ili donis al la mondo, per la vaporkaldronego kaj per la elektrodinamo, bilionojn da nevideblaj sklavoĵoj, kiuj centobligas, por servi la homan Aladinon, la povon de l' mirakla lampo. — La kreskado de ilia grado de ilia forto estos motivo de longedaŭraj miradoj en la estonteco. Ili inventis, per sia eksterordinara improviza kapablo, incitilon por la tempo; kaj je la ensorĉo de sia potenca volo, elsprucas, en unu tago, el

la sino de l' absoluta soleco, la sumo de kulturo akumulebla per la agado de l' jarcentoj. — La puritana libereco, kiu sendas al ilia lumo de la pasinteco, aldonis al tiu ĉi lumo la varmon de ankoraŭ daŭranta pieco. Apud la fabriko kaj la lernejo, iliaj fortaj manoj starigis ankaŭ la templojn, de kie levas siajn preĝojn multaj milionoj da liberaj konsciencoj. Ili scipovis savi, en la malsukceso de ĉiuj idealajtoj, la plej altan idealcon, gardante viva la tradicion de religiasento, kiu, se ĝi ne levas siajn flugadojn per flugiloj el delikata kaj profunda spiriteco, subtenas, parte, inter la malglataĵoj de l' utilisma tumulto, la firman bridon de l' moralasenco. — Ili scipovis, ankaŭ, gardi, meze de la rafinaĵoj de l' civilizita vivado, la sigelon de ia fortika primitiveco. Ili havas la paganan kulton de l' sano, de la lerteco, de l' forto; ili hardas kaj agordas per la muskolo la multvaloran instrumenton de la volo; kaj de sia nesatigebla aspiro al superrego devigataj kulturi la energion de ĉiaj homaj aktivecoj, ili modelas la atletan torson por la liberhoma koro. — Kaj el la koncerto de ilia civilizacio, el la akordita movado de ilia kulturo, eliĝas plej rimarkebla noto de optimismo, de konfido, de fido, kiu grandigas la korojn impulsante ilin al la estonteco, sub la sugesto de persistema kaj aroganta

espero: la noto de *Excelsior* kaj *Salmo de la Vivo*, per kiuj iliaj poetoj montris la certan balzamon kontraŭ ĉia amareco en la filozofio pri la klopodo kaj la agado.

Ilia titana grandeco imponas tiel, eĉ al la plej avertitaj per la grandegaj diferencoj de ilia karaktero aŭ per la ĵusokazintaj perfortoj el ilia historio (1). Kaj miaflanke, vi jam vidas, ke, kvankam mi ilin ne amas, mi admiras ilin. Mi ilin admiras, unue, pro ilia grandega kapablo *voli*, kaj mi klinas min antaŭ “la lernejo de volo kaj de laboro”, kiun — kiel diris Philarète-Chasles pri siaj naciaj praavoj — ili estas fondintaj.

En la komenco la agado estis. Per ĉi tiuj famaj vortoj de “Faŭsto” povus komenci estonta historiisto de la potenca respubliko, la Genezon, ankoraŭ ne finitan, de ĝia nacia ekzistado. Ĝian genion oni povus difini, kiel la universon de l’ dinamistoj, *la forton movigantan*. Ĝi havas, antaŭ ĉio kaj super ĉio, la kapablecon, la entuziasmon, la feliĉigan inklinton al la agado. La volo estas la ĉizilo, kiu skulptis tiun popolon en malmola ŝtono. Ĝiaj karakteraj reliefoj estas du manifestiĝoj de ĝia volpovo: la originaleco kaj la aŭdaco. Ĝia historio estas, tute, la ekfuriozo de vira

(1) La aŭtoro rilatas al la jaro 1898-a. — R. de la Tr.

aktiveco. Ĝia reprezenta personaĵo sin nomas *Mi volas*, kiel la “superhomo” de Nietzsche. — Se io ĝin savas kolektive de la vulgareco, estas tiu eksterordinara elmonro de energio, kiun ĝi portas ĉien, kaj per kiu ĝi donas ian karakteron de batalgrandeco, eĉ al la luktoj pro la intereso kaj pro la materia vivo. Tiel, pri la spekulaciistoj el Ĉikago kaj el Mineapolis, diris Paul Bourget, ke ili estas kvazaŭ heroaj batalantoj, kies kapablo por la atako kaj la defendo estas komparebla al tiu de *grogard* de la granda Imperiestro. — Kaj tiun ĉi superegan energion, per kiu la nordamerika genio ŝajnas atingi — aŭdaca hipnotigisto — la dormigadon kaj la sugestadon de la feoj, ofte oni trovas eĉ en la cirkonstancoj, kiuj prezentigas al ni, kiel esceptaj kaj diverĝaj, el tiu civilizacio. Neniu neos, ke Edgard Poe estas nenormala kaj ribela individueco interne de sia popolo. Lia selekta animo reprezentas neasimileblan peceton el la nacia animo; do, ne vane ĝi sin agitis inter la aliaj kun la sensacio de senfina soleco. Kaj tamen, la fundamenta noto — kiun Baudelaire profunde rimarkigis — en la karaktero de l’ herooj de Poe, estas, ankoraŭ, la superhoma hardeco, la sendresa rezistado de l’ volo. Kiam li elpensis Ligeia’n, la plej misteran kaj adorindan el liaj kreitoj, Poe simboligis per la neestingebila lumo de

siaj okuloj, la triumfan himnon de l' Volo super la Morto.

Akirinte, per la sincera rekonado de ĉio, kio estas luma kaj granda en la genio de l' potenco nacio, la rajton kompletigi, rilate al ĝi, la formulon de l' justeco, interesplena afero petas esti esprimata. — Ĉu tiu socio realigas aŭ, almenaŭ, celas realigi la ideon pri la racia konduto, kiu decas al la laŭrajtaj postuloj de l' spirito, al la intelekta kaj morala digneco de nia civilizacio? — Ĉu estas en ĝi, kie ni devos montri la plej proksimuman bildon de nia "perfekta urbo"? — Tiu febriga malkvieteco, kiu ŝajnas centobligi en ĝia sino la movadon kaj la intensecon de l' vivo, ĉu ĝi havas meritindan celon kaj sufiĉpravigan stimulon?

Herbert Spencer, formulante kun nobla sincereco sian saluton al la demokratio de Ameriko, en bankedo okazinta en Novjorko, montris, kiel la fundamentan karakteron de l' nordamerika vivado, tiun saman elfluan moviĝemon, kiu sin manifestas per la senfina pasio por la laboro kaj la obstinado por ĉiuforma materia ekspansio. Kaj li observis poste, ke, en tiel ekskluziva superrego de la aktiveco subigita al la tujaj celoj de l' utileco, montriĝis koncepto pri la ekzistado, tolerebla sendube kiel provizora karaktero de civilizacio, kiel antaŭlaboro de kulturo, sed

kiu jam urĝe bezonis esti korektata, tial, ke ĝi emie fari el la utilisma laboro la celon kaj superegan objekton de la vivo, kiam ĝi neniel povas racie signifi ion alian, ol la akumuladon de l' propraj elementoj por ebligi la kompletan kaj harmonian disvolviĝon de nia estajo. — Spencer aldonis, ke estis necese prediki al la nordamerikanoj la Evangelion de l' ripozo aŭ de l' amuzo; kaj identigante la plej noblan signifon de tiuj ĉi vortoj kun tiu de l' *senokupeco*, tiel, kiel ĝin dignigis la antikvaj moralistoj, ni klasifikos interne de tia Evangelio, en kia oni devas inici tiujn senripozajn laboristojn, ĉian sindoneman horuzadon, ĉian objekton de meditado elstarantan super la tuja celo de l' utileco.

La nordamerika vivado iras efektive laŭ tiu difektorezona cirklo, kiun Pascal montris en la dezireganta kursekvado al la bonstato, kiam ĝi ne havas sian celon for de si mem. Ĝia prospero estas tiel granda, kiel ĝia neebleco kontentigi mezgradan koncepton de la homa destino. Titana agado, pro la grandega vola streĉiĝo, kiun ĝi reprezentas, kaj pro ĝiaj neaŭditaj triumfoj en ĉiuj sferoj de la materia pligrandiĝo, estas nedubeble, ke tiu civilizacio kaŭzas, en sia tuteco, maloftan impreson de nesufiĉo kaj de malpleno. Kaj estas pro tio, ke se, rajtigite de tridekjara historia evoluo prezidita de la digneco

de l' klasika spirito kaj de l' kristana spirito, oni demandas, kiu estas en ĝi la direktanta principo, kiu estas ĝia ideala *substratum*, kiu estas ĝia celo post la tuja priokupo pri la pozitivaj interesoj ekstremitaj tiun grandegan amason, nur oni trovos, kiel formulon de definitiva idealo, la saman absolutan priokupon pri la materia triumfo. — Orfa de tre profundaj tradicioj, kiuj ĝin orientus, tiu popolo ne scipovis anstataŭigi la inspiran idealecon de l' pasinteco per alta kaj sindonema koncepto pri la estonteco. Ĝi vivas por la tuja realeco de l' estanteco, kaj pro tio ĝi subigas tutan sian aktivecon al la egoismo de la persona kaj kolektiva bonstato. — Pri la tuto de la elementoj el ĝia riĉeco kaj ĝia povo oni povus diri tion, kion la aŭtoro de *Mensonges* diris pri la inteligento de la markizo de Norbert, kiun li figuras en unu el siaj libroj: estas monto el lignaĵaro, por kiu oni ne trovis la manieron ekbruligi ĝin. Mankas la efikan fajreron por levi la flamon de viviga kaj malkvieta idealo super la abunda brullignaĵaro. — Nek eĉ la nacia egoismo, je manko de pli altaj impulsoj; nek eĉ la ekskluzivismo kaj la rasa fiereco, kiuj, en la antikva epoko, aliformigas kaj grandigas la prozan severecon de la Roma vivado, povas havi reflektajn de idealeco kaj de beleco ĉe popolo, kie la kosmopolita konfuzo kaj la

atomismo de malbone komprenata demokratio malpermesas la formadon de vera nacia konscienco.

Oni povus diri, ke la genia pozitivismo de la Metropolo, transigante en la emancipiĝintajn filojn amerikajn, suferis distiladon, kiu senigis ĝin el ĉiuj elementoj de idealeco, ĝin hardintaj, reduktante ĝin reale al la krudeco, kiun, en la pasiaj aŭ satiraj trograndigoj, oni povis atribui al la pozitivismo de Anglujo. — La angla spirito, sub la malglata ŝelo utilisma, sub la komerca indiferenteco, sub la puritana severeco, kaŝas, sendube, selektan poezian virtualecon kaj profundan fonton de sentebleco, kiu montras, laŭ sento de Taine, ke la primitiva fundo, la germana fundo de tiu raso, poste modifiĝinta de l' konkera premado kaj de l' komercaktiva kutimo, estis eksterordinara plialtigo de la sentimento. La amerikana spirito ne ricevis herede tiun praan poezian instinkton, kiu elŝprucas, kiel pura fonto, el la sino de l' brita roko, kiam tiu, kiu ĝin tuŝas, estas la Moseo de delikata arto. La angla popolo havas, en sia aristokrata institucio, — malgraŭ ĝia anakronismo kaj maljusteco laŭ la vidpunkto de la politika rajto, — altan kaj nevenkeblan fortikaĵon por kontraŭstari la komercospiritan medion kaj la invademan prozon; fortikaĵo tiel alta kaj nevenkebla, ke Taine mem certigas,

ke, de la tempo de l' grekaj urboj, ne prezentis la historio ekzemplon de vivkondiĉo pli adekvata por formi kaj plialtigi la sentimenton de homa nobleco. En la medio de l' amerika demokratio, la vulgareca spirito ne trovas antaŭ si reliefojn neatingeblajn por sia suprenira forto, kaj ĝi etendiĝas kaj disvastiĝas, kiel sur la ebenaĵo de senfina *pampo* (1).

Sentebleco, inteligento, kutimoj, — ĉio estas karakterizita, en la grandega popolo, de radikala senkapableco por selektado, kiu subtenas, apud la mekanika ordo de ĝia materia aktiveco kaj de ĝia politika vivo, profundan malordon en ĉio, kio apartenas al la sfero de l' idealaj kapabloj. — Estas facile sekvi la manifestojn de tiu senkapableco, komencante de la plej eksteraj kaj ŝajnaj, ĝis oni alvenas poste al aliaj pli esencaj kaj intimaj. — Donacema de siaj riĉaĵoj — ĉar en lia avideco ne eniĝas, kiel oni trafe diris, ia parto de Harpagono, — la nordamerikano sukcesis plenakiri per ili la kontentiĝon kaj la vantecon de l' luksa belegeco; sed li ne sukcesis akiri la elektitan noton de bongusto. La vera arto nur povis ekzisti en tia medio, kiel individua ribelaĵo. Emerson, Poe, estas tie,

(1) *Pampa*, nomo de la granda argentina ebenaĵo, herboriĉa kaj fekunda. — R. de la Tr.

kiel ekzempleroj de estuloj forpelitaj el sia propra medio per la rigoro de geologia katastrofo. — Parolas Bourget, en *Outre Mer*, pri la emfaza kaj solena akcento per kiu la vorto *arto* vibras en la lipoj de l' nordamerikanoj favoritaj de la fortuna; de tiuj fortikaj kaj purigitaj herooj de la *self-help*, kiuj aspiras kroni, per la asimilo de ĉiuj homaj rafinaĵoj, la agadon de sia perbatala eminentiĝo. Sed tiun dian aktivecon, kiun ili nomas emfaze, neniam ili povis imagi alie, ol kiel novan motivon por kontentigi sian invadan maltrankvilecon, kaj kiel venksignon de sia vanteco. Ili ĝin ignoras en tio, kion ĝi havas kiel sindonema kaj elektita; ili ĝin ignoras, malgraŭ la malavareco, per kiu la individua riĉaĵo kutime utiliĝas por stimuli la formadon de delikata belecosento; malgraŭ la brilriĉeco de la muzcoj kaj ekspozicioj, pri kiuj fieras iliaj urboj; malgraŭ la montoj el marmoro kaj el bronzo, kiujn ili skulptis por la statuoj de siaj publikaj placoj. Kaj se iam oni estus karakterizonta per ilia nomo ian artoguston, tiu nomo ne povus esti alia, ol tiu, kiu signifas la neon de l' arto mem: la bruteco de l' priserĉita efekto, la nekono de ĉia milda nuanco kaj de ĉia ĉarma maniero, la kulto de falsa grandeco, la *sensaciismo*, kiu eligas la noblan serenecon neakordigeblan kun la akcelo de febra vivado.

La idealeco de l' beleco ne pasiigas la idon de la severmoraj puritanoj. Ankaŭ ne pasiigas lin la idealeco de l' vero. Li males-
 timas ĉian pensan ekzercon, kiu ne celos tu-
 jan objekton, ĉar li ĝin konsideras vana kaj
 nefekunda. Al la scienco ne kondukas lin
 sindonema dezirego por la vero, nek mani-
 festiĝis iu kazo por ami ĝin pro ĝi mem. La
 esplorado estas por li nur la antaŭagado de
 utilisma aplikado. — Liaj gloraj klopodoj
 por disvastigi la popolan edukadon, estas
 inspiritaj en la nobla celo komuniki la fun-
 damentajn elementojn de la scio al plej gran-
 da nombro; sed tiuj klopodoj ne elmontras
 al ni, ke, samtempe kiel pri tiel vasta kres-
 kado de la edukado, li sin priokupas pri ĝiaj
 selektado kaj plialtigo, por helpi la klopo-
 don de la superuloj, kiuj ambicius elstariĝi
 super la ĝenerala mezgradeco. Tiel, la rezul-
 tato de ilia persista luktado kontraŭ la
 malscio, estis ĝenerala duonkulturo kaj pro-
 funda malfortikeco de la alta kulturo. — En
 sama proporcio kiel la radikala malscio, en
 la medio de tiu giganta demokratio malpli-
 iĝas la supera sciado kaj la genio. Jen, kial
 la historio de ilia pensa aktiveco estas pro-
 gresio malkreskanta rilate al ĝia brilo kaj
 originaleco. Dum en la sendependiĝa orga-
 niza periodo, por reprezenti same la penson
 kiel la volon de tiu popolo, aperas multaj glo-

raj homoj, post duonjarcento, Tocqueville povas observi rilate al ili, ke *la dioj foriras*. Kiam Tocqueville skribis sian majstroverkon, de Boston, la *puritana urbofortikaĵo*, la urbo de l' kleraj tradicioj, ankoraŭ radiis, tamen, glora plejado, kiu havas en la intelekta historio de tiu ĉi jarcento universalan grandecon. — Kiuj reprenis poste la heredaĵon de Channing, de Emerson, de Poe? — La mezo-krazia niveligo, akcelante sian ruinigan agadon, celas forigi la malmultan karakteron, kiu restis al tiu nefirma intelekto. La flugiloj de ĝiaj libroj delonge ne atingas la altecon, de kie estus eble ilin universale ekvidi. Kaj hodiaŭ, la plej karakteriza reprezentaĵo de l' nordamerika gusto, rilate al la literaturo, estas en la grizaj tolaĵoj de ĵurnalismo, kiu ne igas pensi pri tiu, kiu iam provizis la materialojn de *La Federalisto!*

Rilate al la moralaj sentimentoj, la mekanika impulso de l' utilismo trovis la moderigan risorton de forta religia tradicio. Sed ne pro tio oni devas kredi, ke ĝi cedis la direktadon de l' konduto al vera principo de neprofitemo. — La religieco de l' nordamerikanoj, kiel ekstrema devenaĵo de la angla, nur estas helpapoga forto de la punleĝaro, kiu forlasus sian lokon en la tago, kiam estus eble doni al la utilisma moralo la religian

aŭtoritaton, kiun Stuart Mill al ĝi ambiciis doni. — La plej alta kulmino de ĝia moralo estas la moralo de Franklin: filozofio de l' konduto, kiu trovas sian celon en la mezgrado de l' honesteco, en la utileco de l' saĝeco, el kies sino neniam eliros nek la sankteco, nek la heroismo; kaj kiu, estante nur taŭga por doni al la konscienco, en la normalaj vojoj de l' vivo, la apogon de l' pomuja bastono, kun kiu kutime iradis ĝia propagandisto, ne estas io alia ol facilrompa lignaĵo, kiam oni pretendas supreniri la altajn deklivojn. — Tia estas la supera kulmino; sed estas en la valoj, kie oni devas serĉi la realecon. Kvankam la morala kriterio ne estus ironta pli malsupren ol la honesta kaj modera utilismo de Franklin, la nepra finalveno — kiujn jam montris la sagaca observado de Tocqueville — de socio edukita en tia devolimigo, certe ne estus unu el tiaj belpompaj kaj luksegaj dekadencoj, kiuj igas taksi la satanan belecon de l' malbono en la diboĉdisiĝo de l' imperioj; sed ĝi estus ia pala kaj mezgrada materialismo, kaj en lasta rezultato, la sonĝo de senbrila malfortikiĝo, pro la silenta disiĝo de ĉiuj risortoj de l' morala vivo. — Tie, kie la regulo celas meti la altajn abnegaciajn kaj virtajn manifestiĝojn for de la superrego de l' devo, la realeco igos malantaŭeniri senfine la limon de l' devigo.

— Sed la skolo de l' materia prospero, kiu estos ĉiam malfacila provo por la respublika morsevereco, portis pli malproksimen la simplecon pri la koncepto de la racia konduto, kiu hodiaŭ konkeras la spiritojn. Post la Franklin'a kodo, sekvis aliaj pli sincertendencaj, kiel esprimo de la nacia klereco. Kaj ankoraŭ ne pasis kvin jaroj, kiam la publika voĉdono konsekris en ĉiuj nordamerikaj urboj, per la plej klaraj manifestiĝoj de l' populareco kaj de l' kritiko, la novan moralan leĝon per kiu, de la puritana Boston, la aŭtoro de ia klera libro titolita *Pushing to the front* (1), solene anoncis, ke la sukceso devas esti konsiderata, kiel la supera celo en la vivo. La deklaro havis eĉon eĉ en la sino de la kristanaj eklezioj, kaj okaze de tiu bonŝanca libro, iufoje oni citis la *Imitation* de Kempis, kiel termon de komparo.

La publika vivo, certe, ne eliĝas el la konsekvencoj de l' kreskado de la sama malorganiziga ĝermo, kiun tiu socio portas en siaj internaĵoj. Iu ajn mezvalora observanto de la politikaj kutimoj parolos al vi pri la maniero, kiel la obsedo de la utilisma intereso havas la tendencon iompostiome malfortigi kaj malgrandigi en la koroj la rajto-

(1) De M. Orisson Swett Marden. — Boston, 1895.

sentimenton. La civitana kuraĝo, la malnova virto de la familio Hamilton, estas ŝtala spado, ĉiutage pli oksidiĝanta, forgesita inter la araneoretoj de l' tradicioj. La subaĉetebleco, kiu komencas en la publika voĉdono, disvastiĝas tra ĉiuj instituciaj risortoj. La regado de l' mezgradeco igas vana la superemon, kiu plialtigas la karakterojn kaj la inteligentojn, kaj kiu hardas ilin per la perspektivo de ilia superrega efektiveco. La demokratio, al kiu oni ne sciis doni, kiel reguligilon, altan kaj edukon konon de la homaj superecoj, havis la tendencon ĉiam inter ili al tiu abomeninda bruteco de la nombro, kiu malestimas la plej bonajn moralajn avantaĝojn de la libereco kaj nuligas, ĉe la publika opinio, la respekton de l' aliula digneco. Hodiaŭ, plie, grandega forto leviĝas por kontraŭstari, kiel eble plej malbone, la absolutecon de l' nombro. La politika influo de plutokratato reprezentata de la ĉiopovaj trustaj kunligiĝintoj, monopoligantoj de l' produktado, kaj mastroj de la ekonomia vivo, estas, sendube, unu el la trajtoj plej multe meritantaj intereson, ĉe la nuna fizionomio de l' granda popolo. La formado de tiu ĉi plutokratato rememorigis, kun kredebla ĝustatempeco, la alvenon de l' riĉiĝinta kaj aroganta klaso, kiu, en la lastaj tempoj de la Roma respubliko, estis unu el la videblaj precedencoj

de l' liberecruino kaj de l' Cesartiraneco. Kaj la ekskluziva zorgo pri la materia engrandiĝo — inspiro de tiu civilizacio — altrudas tiel la logikon de siaj rezultatoj en la politika vivo, kiel en ĉiuj klasoj de aktiveco, donante la unuan rangon al la ruza kaj aŭdaca *struggle-for-life* (lukto por la vivo), fariĝinta, per la bruta efiko de sia penado, la supera personiĝo de l' nacia energio, — la pretendanto al ĝia Emerson'a *representado*, — la *reganta eminentulo* de Taine!

Al la impulso, kiu akcele faligas la spiritan vivon en la sencon de l' ideala senorientiĝo kaj de l' utilisma egoismo, korespondas, fizike, tiu alia impulso, kiu en la ekspansio de l' mirinda kreskado de tiu popolo, kondukas siajn homamasojn kaj siajn iniciatojn en direkton al la grandega okcidenta regiono, kiu, en la sendependiĝa tempo estis la mistero, vualita de l' arbaregoj apud rivero Missisipi. Efektive, estas en tiu improvizita Okcidento, kiu kreskas grandege, kontraŭ la malnovaj atlantikaj ŝtatoj, kaj ĝi reklamas, por proksima estonteco, la hegemonion, kie estas la plej fidela reprezentado de l' nord-amerika vivado en la nuna momento de ĝia evoluo. Estas tie, kie la definitivaj rezultatoj, la logikaj kaj naturaj fruktoj de l' spirito gvidinta, de sia origino, la potencan demokration, reliefe montriĝas al la rigardo de

l' observanto, kaj ili havigas al li deirpunkton por imagi la vizagon de l' granda popolo en plej proksima estonteco. La virginiano kaj la *yankee* (jankjo) estas anstataŭitaj, kiel reprezenta tipo, de tiu superreganto de la antaŭnelonge senhomaj herbejoj, rilate al kiu diris Michel Chevalier, antaŭ duonjarcento, ke "la lastaj iam estus la unuaj". La utilismo, malplena de ĉia ideala havaĵo, la kosmopolita senprecizeco, kaj la niveligo de l' bastarda demokratio, atingos kun li sian lastan triumfon. — Ĉiu nobla elemento de tiu civilizacio, ĉio, kio ligas ĝin al malvaraj rememoroj kaj fundamentas ĝian historian dignecon, — la heredajo postlasita de la ŝipanoj de *Flor de Mayo*, la memoraĵo de l' virginiaj patricioj kaj de l' kavaliroj de Nova Anglujo, la spirito de l' civitanoj kaj leĝdonantoj de l' emancipiĝo, — restos interne de la malnovaj ŝtatoj, kie Boston kaj Filadelfia subtenas ankoraŭ, kiel bonesprime oni diris, "la paladiumo (1) de la Washingtona tradicio". Ĉikago levigas por regi. Kaj ĝia konfido pri la superco, kiun ĝi havas super la iniciatinta atlantika marbordo, baziĝas sur tio, ke ĝi konsideras tiun ĉi lastan, kiel tro reaktan, tro eŭropan, tro tradician. La historio

(1) De Palladium, statuo de diino Pallas, kiel posedo asekuris la defendon de Trojo. — R. de la Tr.

ne donas titolojn, kiam la elekta procedo estas la aŭkcio de l' dignopurpuro!

Ĝiaŭ la mezuro kiel la utilismo genia de tiu civilizacio tiel alprenas karakterojn pli difinitajn, pli sincerajn, pli mallarĝajn, tiel per la ebriiĝo de la materia prospero pli grandigas la malpaciencon de ĝiaj gefiloj por propagandi ĝin kaj por atribui al ĝi la antaŭdestinon de Roma majstreco. Hodiaŭ ili aspiras manifeste al supergrado de l' universala kulturo, al la direktado de l' ideoj, kaj ili konsideras sin mem la forĝistoj de civilizacia tipo, sukcesonta. Tiu duonironia parolado, kiun Laboulaye igas diri al lerneĵano el sia amerikanigita Parizo, por signifi la preferon, kiujn ili dediĉis ĉiam, en la eduka celo, al ĉio, kio favoros la fierecon de l' nacia sentimento, havus tutan seriozecon de l' plej sincera kredo en lipoj de iu ajn vira amerikano de niaj tagoj. En la fundo de ilia deklarita spirito de konkurenco kun Eŭropo, estas nai-va malestimo, kaj estas la profunda konvinko pri tio, ke ili estas destinitaj senlumigi post nelonge, ĝian spiritan superecon kaj ĝian ĝloron, plenumigante, plian fojon, en la evoluoj de l' homa civilizacio, la kruela leĝo de l' antikvaj misteroj, en kiuj la inicito mortigis la incinton. Senutile estus pretendi konvinki ilin, ke kvankam la kontribuo, kiun ili alportis al la progresoj de l' libereco kaj de

l' utileco estis, sendube, grandega, kaj kvankam oni devus juste atribui al ĝi la signifon de universala agado, de *humana* agado, ĝi estas nesufiĉa por translokigi en la direkto al la nova Kapitolo la mondo-akson. Senutile estus pretendi ilin konvinki, ke la laboro realigita de la persista genio de l' eŭropa arjo, de kiam, antaŭ tri mil jaroj, la bordoj de l' Mediteranea Maro, civiliziga kaj glora, ĉirkaŭiĝis ĝojege per la girlando el la helenaĵ urboj; la agado, kiun ankoraŭ daŭrigas sian efektiviĝon, kaj el kies tradicioj kaj instruoj ni vivas, estas sumo kun kiu ne povas formi ekvacion la formulo *Washington plus Edison*. Ili aspirus revizii la Genezon por okupi tiun unuan paĝon! — Sed, krom la relativa nesufiĉo de la parto, kiun ili rajtas sin alproprigi en la homara edukado, ĝia karaktero mem neas al ili la eblecon de l' hegemonio. — Naturo ne donacis al ili la propagandan genion, nek la apostolan inklinon. Mankas al ili tiu supera kvalito de *afableco* — altasence — tiu eksterordinara simpatipovo, per kiu la rasoj dotitaj per providenca eduka rolo, scias fari el sia kulturo ion similan al la beleco de la klasika Heleno, sur kiu ĉiuj kredis rekoni iun propran trajton. — Tiu civilizacio povas abundi, aŭ abundas sendube, pri sugestoj kaj pri fekundaj ekzemploj; ĝi povas inspiri admiron, miregon, res-

pekton; sed, kiam la alilandano ekvidas de marmalproksimo ĝian gigantan simbolon: *La Liberecon* de Bartholdi, kiu elstarigas triumfe sian torĉon super la haveno de Novjorko, estas malfacile, ke vekigu en ties animo la profunda kaj religia emocio, kun kiu la antikva vojaĝanto estus vidonta ckaperi, dum la diafanaj noktoj de Atiko, la luman punkton, kiun la ora lanco de Ateneo de l' Akropolo ellasis videble je longa distanco en la pureco de serena aermedio.

Kaj, se, je la nomo de la spiritorajtoj, mi neas al la nordamerika utilismo tiun tiapan karakteron, per kiu ĝi volas sin trudi al ni, kiel sumon kaj modelon de civilizacio, rimarku, ke ne estas mia intenco aserti, ke la agado de ĝi realigita povus esti tute perdiĝinta rilate al tiuj interesoj, kiujn ni povus nomi *la interesoj de la animo*. — Sen la brako nivelanta kaj konstruanta, ne havus pacon la brako sur kiu sin apogas la nobla frunto pensanta. Sen la konkero de ia materia honestato estas neebla, en la homaj socioj, la regado de l' spirito. Tiel rekonas tion la mem aristokrata idealismo de Renan, kiam, de la vidpunkto de l' moralaj interesoj de l' homspeco kaj de ĝia estonta selektado spirita, li rimarkigas la signifon de l' utilisma agado tiuĉjarcenta. “Levi sin super la neceseco —

aldonas la majstro — estas liberigi sin”. — En la malproksimo de l’ estinteco, la efektoj de l’ proza kaj profitema aktiveco de l’ komercaĵisto, kiu unufoje interrilatigis unu popolon kun aliaj, havas nekalkuleblan idealigan rezulton; tial ke ili efike kontribuas por multipliki la instrumentojn de la inteligento, poluri kaj mildigi la kutimojn, kaj ebligis, eble, la regulojn de pli progresinta moralo. — La sama pozitiva forto aperas favoranta la plej grandajn idealaĵojn de la civilizacio. La oro amasigita de l’ komercistoj en la italaj respublikoj “pagis — laŭ Saint-Victor — la elspezojn de la Renesanco”. La ŝipoj revenintaj de la landoj de *La mil kaj unu noktoj*, superplenaj de spicoj kaj eburo, ebligis al Lorenzo de Medicis la renovigon de l’ platonaj bankedoj, en la vendistarejo de l’ florencanaj komercistoj. — La historio montras definitive reciprokan instigon inter la progresoj de l’ utilisma kaj la ideala aktivecoj. Kaj tiel, kiel la utileco ofte fariĝas forta ŝildo por la idealecoj, ĉi tiuj ofte provokas (kondiĉe de nereкта celado al ĝi), la rezultatojn de la utileco. Observas Bagehot, ekzemple, kiel la grandegaj pozitivaj profitoj de la navigacio ne ekzistus eble por la homaro, se en la primitivaj epokoj ne estus ekzistantaj revuloj kaj senokupuloj — certe, malbone komprenataj de siaj samtempuloj!

— al kiuj interesus la rigardadon de tio, kio okazadis en la ĉielaj sferoj. — Tiu ĉi leĝo de harmonio lernigas nin respekti la brakon, kiu plugas la malmolan grundon de la prozo. La agado de la nordamerika pozitivismo servos, fine, al la idealo de Ariel. Tion, kion estas rekte konkerinta tiu ciklopa popolo por la materia bonstato, per sia senco de la utileco kaj sia admirinda kapablo por la mekanika inventado, tion aliformigos aliaj popoloj, aŭ ĝi mem estonte, kiel efikajn elementojn de selektado. Tiel, la plej altvalora kaj fundamenta el la spiritaj akiroj, — la alfabeto, kiu donas al la parolo flugilojn de senmorteco, — naskiĝas en la sino de la faktorioj kananeaj, kaj ĝi estas la eltrovo de komerca civilizacio, kiu ĝin utiligante por ekskluzive mongajn celoj, ne sciis ke la genio de la superaj rasoj ĝin transformos estigante ĝin, kiel rimedon por disvastigi sian plej puran kaj lumigan esencon. La rilato inter la pozitivaj bonoj kaj la bonoj intelektaj kaj moralaj estas, do, laŭ la adekvata komparo de Fouillée, nova aspekto el la afero de la ekvivalento de l' fortoj, kiu, tiel, kiel ĝi permesas transformi la movadon en varmon, ĝi permesas ankaŭ atingi, el la materiaj avantaĝoj, elementojn de spirita supereco.

Sed la nordamerika vivo ne prezentas al ni ankoraŭ novan ekzemplon de tiu nedubebla interrilato, nek ĝi al ni tion anoncas, kiel gloron de ekvidata posteularo. — Nia konfido kaj niaj voĉoj devas inklini por ke, en estonta tempo, pli neatingebla al la interdependo, estu rezervata supera destino al tiu civilizacio. Malgraŭ ke, sub la ekscitilo de ĝia viglega aktiveco, la mallonga tempo, kiu ĝin apartigas de ĝia aŭroro estis sufiĉa por satigi la vivelspezon bezonitan de grandega evoluo, ĝia pasinteco kaj ĝia nuntempo nur povas esti eniga komenco rilate al la estonteco. — Ĉio elmontras, ke ĝi estas ankoraŭ tre malproksime de sia definitiva formulo. La asimila energio, kiu permesis al ĝi konservi ian unuecon kaj ian genian hardon, malgraŭ la grandegaj invadoj de rasaj elementoj kontraŭaj al tiuj, kiuj ĝis nun tondonis al ĝia karaktero, devos lukti en bataloj ĉiutage pli malfacilaj, kaj ĉe la utilismo foriganta ĉian idealecon, ĝi ne trovos sufiĉe povan inspiron por subteni la altiron de l' solidara sentimento. Eminentia pensulo, kiu komparis la sklavon el la antikvaj socioj kun eta parteto ne digestita de la socia organismo, povus eble havi similan komparon por karakterizi la situacion de tiu forta koloniano de germana deveno, kiu, stariĝinte en la ŝtatoj de l' centro kaj de l' *Far-West*, kon-

servas tute en sia naturo, en sia sociemo, en siaj kutimoj, la sigelon de l' germana genio, kiu, en multaj el ĝiaj karakteraj kondiĉoj pli profundaj kaj energiaj, devas esti konsiderata vera antitezo de l' amerika genio. — Aliparte, civilizacio destinita vivadi kaj devastiĝi en la mondo, civilizacio, kiu ne estos perdinta, muniĝante laŭ la maniero de l' aziaj imperioj, la kapablon de l' variebleco, ne povas plilongigi senfine la direkton de siaj energioj kaj de siaj ideoj en unika kaj ekskluziva senco. Ni esperu, ke la spirito de tiu titana socia organismo, kiu ĝis hodiaŭ estis nur *volo* kaj *utileco*, ĝi estos ankaŭ iam inteligento, sentimento, idealeco. Ni esperu, ke el la grandega forĝejo, elŝprucos, lastarezultate, la homa ekzemplero oferdonema, harmonia, selekta, kiun Spencer, en jam citita parolado, kredis povi antaŭdiri, kiel finon de la multekosta proceso de refandado. Sed ni ne serĉu ĝin, nek en la estanta realeco de tiu popolo, nek en la perspektivo de ĝiaj tujaj evoluoj; kaj ni rezignu vidi la tipon de ekzempla civilizacio tie, kie nur ekzistas nepolurita kaj grandega skizo, kiu ankoraŭ necesos pasi tra multaj sinsekvaj korektaĵoj, antaŭ ol ĝi akiros la serenan kaj firman sintenadon, laŭ kiu, la popoloj atingintaj perfektan disvolviĝon de sia genio, tronas la gloran kronadon de sia agado, kiel en la

sonĝo de l' kondoro, kiun Leconte de Lisle priskribis kun sia belega majesteco, finante, en olimpa ripozo, la potencan supreniron, pli supren ol la kulminoj de la Kordiljero!

ANTAŭ la posteularo, antaŭ la historio, ĉiu granda popolo devas aperi, kiel vegetaĵo, kies disvolviĝo celis harmonie produkti frukton, ĉe kiu ĝia purigita suko oferdonas al la estonteco la idealecon de sia parfumo kaj la fekundecon de sia semo. — Sen tiu ĉi daŭra rezultato, *humana*, leviĝinta super la kaduka celo de l' *utileco*, la potenco kaj la grandeco de l' imperioj nur estas sonĝa nokto en la ekzistado de l' homaro; ĉar, kiel la personaj vizioj de l' sonĝo, ili ne meritas esti kalkulataj en la enketeniĝo de l' faktoj, kiuj formas la aktivan plekton de l' vivo.

Granda civilizacio, granda popolo, — en la signifo valoranta por la historio, — estas tiuj, kiuj, malaperinte materie en la tempo, lasas vibranta por ĉiam la melodion kreitan de ilia spirito kaj ili persistigas en la posteularo sian nepereigeblan heredaĵon — kiel

diris Carlyle pri la animo de siaj "herooj": — *kiel novan kaj dian porcion el la sumo de l' objektoj*. Tiel, en la poemo de Goethe, kiam Heleno, elvokita de la nokta regno, denove malsupreniras en la malhelan Orko'n, forlasas al Faŭsto sian kitelon kaj sian vualon. Tiuj ĉi vestaĵoj ne estas la diino mem; sed, tial ke ŝi portis ilin kun si, ili partoprenas en ŝia dia alteco, kaj ili havas la kapablon levi tiun, kiu ilin posedas, super la vulgaraĵoj.

Socio definitive organizita, kiu limigos sian ideon pri la civilizacio al akumulado de abundaj elementoj de prospero, kaj sian ideon pri la justeco, al ilia egala distribuado inter la socianoj, ne faros el la urboj de ĝi loĝataj ion malsaman, esence, ol formikejon aŭ ol abelujon. Ne sufiĉas multpopolaj, tre riĉaj, luksegaj urboj, por pruvi la konstantecon kaj la intensecon de civilizacio. La granda urbo estas, sendube, necesa organismo de la alta kulturo. Ĝi estas la natura medio de la plej altaj manifestiĝoj spiritaj. Prave diris Quinet ke "la animo, kiu iras por trinki fortojn kaj energiojn en la intima komunikado kun la homa speco, tia animo, kia apartenas al la granda homo, ne povas formiĝi kaj pli-grandiĝi meze de l' malgrandaj grupoj de urbeto". — Sed, tiel la kvanta grandeco de l' urbo, kiel la materia grandeco de ĝiaj ins-

trumentoj, de ĝiaj armiloj, de ĝiaj ĉambroj, estas nur *iloj* de la civiliza genio, kaj neniel rezultatoj, en kiuj ĝi povos sin deteni. — El la ŝtonoj apartenintaj al Kartago ne restas eĉ eta parteto transformita en spiriton kaj en lumon. La grandegeco de Babilono kaj Ninivo ne reprezentas en la homara memoro mankaĵon, kompare kun la spaco inter la Akropolo kaj Pireo. — Estas ideala perspektivo, en kiu la urbo aperas granda, ne nur ĉar ĝi ŝajne promesas okupi la grandegan areon, kiu estis konstruita ĉirkaŭ la turo de Nemrod; kaj aperas forta, ne nur ĉar ĝi estas kapabla starigi denove la babilonajn murojn, sur kiuj estis eble pasigi samtempe ses ĉarojn fronte; kaj aperas bela, ne nur, ĉar ĝi, kiel Babilono, ornamas la murojn de siaj palacoj per alabastraj plataĵoj, kaj per girdandoj el ĝardenoj, laŭmaniere de la ĝardenoj de Semiramo.

Granda estas la urbo en tiu perspektivo, kiam la ĉirkaŭaĵoj de ĝia spirito etendiĝas pli malproksimen de la montoj kaj de la maroj, kaj kiam ĝia prononcita nomo, lumiĝas por la posteularo kiel tuta travivaĵo de l' homa historio, tuta tempa horizonto. La urbo estas forta kaj bela, kiam ĝiaj tagoj estas io pli, ol la neŝanĝebla ripetado de sama eĥo reflektiĝanta sendifine de unu cirklo en alian de eterna spiralo; kiam en ĝi estas io,

kio ŝvebas super la homamaso; kiam inter la lumoj, kiuj ekflamiĝas dum ĝiaj noktoj, estas la lampo akompananta la maldorman solecon malkvietigatan de l' penso, kaj ĉe kiu koviĝas la ideo elironta al la suno de l' sek-vonta tago, transformita en la ekkrio kuni-ganta kaj en la forto kondukanta l' animojn.

Nur tiam, la vasteco kaj la materia grandeco de l' urbo povas mezurdoni por kalkuli la intensecon de ĝia civilizacio. — Grandluk-saj urboj, superbelegaj grupigoj de domoj, estas, por la penso, pli neadekvata fluejo, ol la absoluta soleco en la dezerto, kiam la penso ne estas la sinjoro ilin superreganta. — Legante *Maud* de Tennyson, mi trovis pa-ĝon, kiu povus esti la simbolo de tiu ĉi tur-mento de la spirito, tie, kie la homa socio estas por ĝi ia speco de soleco. — Kaptita de angora deliro, la poema heroo songas esti mortinta kaj enterigita malmultajn futojn sub la tero, sub la pavimo de strato en Lon-dono. Malgraŭ lia morto, lia konscienco res-tas aliĝinta al la malvarmaj korpaj restaĵoj. La konfuza kriado ĉe la strato, disvastiĝante per mallauĝta vibrado ĝis la mallarĝa tomba kavaĵo, malpermesas en ĝi ĉian pacan dor-mon. La pezo de la indiferenta homamaso gravitas ĉiuhore sur la funebra karcero de tiu spirito, kaj la hufoj de l' pasantaj ĉeva-loj ŝajnas klopodi por stampi sur ĝi mal-

honoran sigelon. La tagoj sin sekvas senindulge malrapide. La aspiro de Maud konsistus en lia eniĝo pli profunden, multe pli profunden, en la teron. La seninteligenta bruado de l' tumulto nur taŭgas por subteni en lia maldormanta konscienco la penson pri lia kaptiteco.

En nia Latina Ameriko, jam ekzistas urboj, kies materia grandeco kaj kies sumo de ŝajna civilizacio alproksimigas ilin, per akcelaj paŝoj, al partopreno en la monda unuarango. Estas necese timi, ke la serena penso, kiu alproksimiĝos por bati sur la luksaj eksterajoj, kiel sur fermita bronza vazo, sentos la malkonsolan bruon de l' malpleneco. Estas necese timi, ekzemple, ke urboj, kies nomo estis glora simbolo en Ameriko; kiuj havis Moreno'n, Rivadavia'n, Sarmiento'n (1); kiuj portis la iniciaton de senmorta Revolucio; urboj, kiuj, kiel en la harmonia disvolviĝo de l' samcentraj ondoj leviĝantaj per la ŝtonfrapo sur la dormanta akvo, disvastigis tra la tuta vasteco de kontinento, la gloron de siaj herooj kaj la parolon de siaj oratoroj, — povus finiĝi kiel Sidono, Tiro aŭ Kartago.

Al via generacio koncernas tion malpermesi; al la junularo leviĝanta, sango kaj

(1) Famaj argentinaj ŝtatisoj. — R. de la Tr.

muskolo kaj nervo de l' estonteco. Mi volas konsideri ĝin personiĝinta en vi. Mi parolas nun al vi imagante, ke vi estas la destinitoj por gvidi la aliulojn en la luktoj pro la idealo de l' spirito. La persistemo de via klopodado devas sin identigi, en via intimeco, kun la certeco de l' triumfo. Ne ĉesu prediki la Evangelion de l' delikateco al la skitoj, la Evangelion de l' inteligento al la beotianoj, la Evangelion de l' sindonemo al la fenicoj (1).

Sufiĉas, ke la penso insistu *esti* — elmontri, ke ĝi ekzistas, per la elmontro, kiun donis Diogeno pri la movado, — por ke ĝia pligrandiĝo estu neevitebla kaj por ke ĝia triumfo estu certa.

La penso konkeros por si, iom post iom, per sia propra spontaneeco, la tutan spacon, kiun ĝi bezonos por firmigi kaj plifortikigi sian regnon, inter la ceteraj manifestiĝoj de l' vivo. — En la individua organiziĝo, ĝi levas kaj pligrandigas, per sia kontinua aktiveco, la kranian arkaĵon, kiu ĝin enhavas. La pensemaj rasoj elmontras, per la kreskanta enhavo de siaj kranioj, tiun puŝadon de la interna laboristo. — En la socia organizo ĝi scios ankaŭ pligrandigi la enhavon de sia

(1) Skitoj, beotianoj, fenicoj, antikvaj popoloj havantaj kvalitojn tute kontraŭajn al tiuj, kiujn la aŭtoro konsilas prediki. — R. de la Tr.

scenejo, ne bezonante por tio la helpon de ia alia forto krom la sia. — Sed tia persvado, kia devas vin defendi kontraŭ senkuraĝiĝo, kies unika utileco konsistus en forigo de l' mezgraduloj kaj malgranduloj el la lukto, devas vin antaŭgardi ankaŭ de la senpaciencoj vane trudantaj al tempo la modifon de ĝia superrega ritmo.

Ĉiu, kiu sin dediĉos por disvastigi kaj defendi, en nuntempa Ameriko, sindoneman idealon de la spirito, — arton, sciencon, moralon, religian sincerecon, politikon de ideoj, — devas eduki sian volon en la persista kulto de l' estonteco. La estinteco apartenis tute senmanke al la batalanta brako; la estanteco, apartenas, preskaŭ tute ankaŭ, al la forta brako nivelanta kaj konstruanta; la estonteco — estonteco des pli proksima, ju pli energiaj estos la volo kaj la penso de tiuj, kiuj ĝin deziregas, — oferdonos, por la disvolviĝo de superaj potencoj de l' animo, la stabilecon, la scenejon kaj la medion.

Ĉu vi ne vidis la Amerikon revatan de ni: gastaman por la spiritaj aferoj, kaj ne nur por la homamasoj en ĝin rifuĝontaj; penseman, sen malpligo de ĝia kapablo por la agado; serenajn kaj firman, malgraŭ siaj sindonemajn entuziasmojn; brilegantan kun la ĉarmo de frua kaj milda seriozeeco, kiel tia beliganta la esprimon de infana vizaĝo, kiam

en ĝi montriĝas, pere de la senmanka luma gracio, la malkvieta penso vekiganta?... — Pensu pri ĝi almenaŭ; la honoro de via estonta historio dependas de tio, ĉu vi havos konstante antaŭ la animaj okuloj la vizion de tiu Ameriko regeneriĝinta, leviĝanta alten super la estantaj realaĵoj, kiel ĉe la gotika navo la granda rozego, kiu ardas en lumo sur la severaj ombroplenaj muroj. — Eble, vi ne estos ĝiaj fondintoj; vi estos la antaŭuloj tuj ĝin antaŭenirantaj. En la glordonaj sankcioj estontaj, estas ankaŭ palmo-branĉoj por la rememoro de l' antaŭuloj. Edgard Quinet, kiu tiel profunde penetris en la harmoniojn de l' historio kaj de l' Naturo, rimarkigas, ke por prepari la alvenon de nova homa tipo, de nova socia unueco, de nova personiĝo de la civilizacio, ofte antaŭiras de malproksime antaŭtempa disiĝinta grupo, kies rolo estas analoga, en la vivo de l' socioj, je tiu de l' *profetaj specoj*, pri kiu parolas Héer, rilate al la biologia evoluo. La nova tipo komencas signifi, apenaŭ, individuajn kaj izolitajn diferencojn; la individualismoj organiziĝas pli poste je "varieco"; kaj fine, la varieco trovas por disvastiĝi favoran medion, kaj tiam eble ĝi leviĝas al la speco rango: tiam — ni tion diru per la vortoj de Quinet — *la grupo fariĝas homamaso, kaj ĝi reĝas.*

Jen, kial via morala filozofio en la laboro kaj en la batalo devas esti la posta flanko de la *carpe diem* horacia (1); filozofio, kiu nur aliĝu al la estanteco, kiel al la ŝtupo por apogi la piedon, aŭ kiel al la breĉo, tra kie eniri en malamikajn murojn. Vi ne aspiras, tuj, al la efektivigo de l' definitiva venko, sed al la atingo de pli bonaj luktokondiĉoj. Via vira energio havos tiamaniere stimulon pli potencon; ĉar ekzistas la virtualeco de pli granda dramatika intereso pri la plenumo de tiu rolo, esence aktiva, de renovigo kaj de konkero, taŭga por purigi la fortojn de heroe dotita generacio, ol en la serena kaj olimpa sintenado, kiun la oraj temp-aĝoj de l' spirito kutimas trudi al la solenaj ofi-cantoj de sia gloro. — “Ne estas la posedo de riĉaĵoj, — diris profunde Taine, parolante pri la ĝojoj de la Renesanco; — ne estas la posedo de riĉaĵoj, sed ilia akiro, kio donas al la homoj la plezuron kaj la senton de ilia forto”.

Eble estos kuraĝa kaj purnaiva espero kredi pri tiel kontinua kaj feliĉa akcelado de la evoluo, pri tia efiko de via klopodo, ke sufiĉus la daŭro de homa generacio por

(1) *Carpe diem* (de Horacio), latina esprimo, kies signifo estas: profitu la nunan tagon. — R. de la Tr.

porti, en Ameriko, la intelektajn vivkondiĉojn, de la komenco, en kiu ni nun ilin havas, al la kategorio de vera socia intereso kaj al supro, kiu vere superos. — Sed, kie ne decas la tuta transformiĝo, decas la progreso; kaj kvankam vi sciis, ke la unuaj fruktoj de la pene prilaborita grundo, estus neniam servotaj en via tablo, se vi estas sindonemaj, se vi estas fortaj, tio estus nova stimulo en la intimeco de via konscienco. La plej bona agado estas tiu, kiun oni realigas sen la malpaciencaj de tuja sukceso; kaj la plej glora klopodo estas tiu, kiu metas la esperon pli malproksimen de l' videbla horizonto; kaj la abnegacio plej pura estas tiu, kiu forneas al si estantece, ne nur la laŭron kompensas kaj la bruan honoron, sed ankaŭ la moralan volupton, kiu plezurigas dum la atenta meditado pri la ago elfinita kaj pri la sekura celo.

En la antikveco ekzistis altaroj por la “dioj nekonataj”. Dediĉu parton el via animo al la nekonata estonteco. Ju pli la socioj antaŭeniras, des pli la estonteca penso influas grandaparte, kiel unu el la faktoroj de ilia evoluo kaj kiel unu el la inspiroj de iliaj faroj. De la malluma neantaŭvido de l' sovaĝulo, — kiu nur ekvidas el la estonteco tion, kio mankas por fini ĉiun sunan periodon, kaj li ne imagas, kiel la estontaj tagoj

povas esti parte regataj de la estanta tempo, — ĝis nia zorga kaj antaŭvida priokupo pri la posteularo, ekzistas grandega spaco, kiu eble ŝajnos mallonga kaj tre eta iun tagon. Ni estas progreskapablaj, nur kiam ni scipovas adapti niajn agojn al kondiĉoj pli kaj pli malproksimaj de ni space kaj tempe. La certeco pri nia partopreno en faro, kiu postvivos nin, fruktodonante en la estontecaj bonaĵoj, plialtigas nian homan dignecon, igante nin triumfi kontraŭ la limigoj de nia naturo. Se, malfeliĉe, la homaro estus malesperonta definitive pri la senmorteco de l' individua konscienco, la plej religia sentimento per kiu ni povus ĝin anstataŭi, estus tiu, kiu naskiĝas el la penso, ke, eĉ post la disiĝo de nia animo en la sino de l' aĵoj, persistus, en la heredaĵo transdonata de la homaj generacioj, ĉio plej bona el tio, kion ĝi sentis kaj revis, ĝia plej intima kaj pura esenco, same kiel la lumradio de estingiĝinta stelo persistas en la senfineco, kaj ĝi malsupren venas al ni por karesi nin per sia melankolia lumo.

La estonteco estas, en la vivo de l' homaj socioj, plej altgrade, la idealiga penso. El la pia respekto de l' pasinteco, el la kulto de l' tradicio, unuflanke, kaj alie, el la kuraĝa impulso al la estonteco, konsistas la nobla forto, kiu, levante la kolektivian spiri-

ton super la estantaj limigoj, komunikas al la sociaj agitoj kaj sentimentoj idealan sencon. La homoj kaj la popoloj, laŭ la sento de Fouillée, laboras sub la inspiro de l' ideoj, kiel la neraciuloj sub la inspiro de l' instinktoj; kaj la socio, kiu luktas kaj klopodas, kelkafoje sen tion scii, por trudi ideon al la realaĵo, imitas, laŭ la sama pensulo, la instinktan agadon de l' birdo, kiu, konstruante la neston sub la superrego de interna imago ĝin obsedanta, obeas samtempe al senkonscia rememoro de l' estinteco kaj al mistera antaŭsento de l' estonteco.

Forigante el la animoj la sugeston pri la egoista intereso, la penso, inspirata de la priokupo pri sekvontaj destinoj post nia vivo, ĉion purigas kaj serenigas, ĉion nobligas; kaj estas alta honoro de nia jarcento, ke la deviga forto de tiu priokupo pri la estonteco, la sentimento de tiu alta trudo de la digneco de l' racia estulo, estu manifestiĝintaj en ĝi tiel klare, ke eĉ en la sino de l' plej absoluta pesimismo, eĉ en la sino de l' amara filozofio, kiu alportis al la okcidenta civilizacio, interne de la orienta lotuso, la amon al la disiĝo kaj al la nenieco, la voĉo de Hartmann estas predikinta, kun logika ŝajno, la severan devon kontinui la perfektigan agadon, labori por la bono de la estonteco, kun la celo, ke, akceliĝinte la evoluo per la ho-

maj klopodoj, ĝi alvenu per pli rapida impulso al sia lasta fino, kiu estos la fino de ĉia doloro kaj de ĉia vivo.

Sed ne, kiel Hartmann, je nomo de la morto, sed je nomo de l' vivo mem kaj de l' espero, mi petas de vi parton el via animo por la agado de l' estonteco. — Por peti tion al vi, mi volis min inspiri je la dolĉa kaj serena imago de mia Ariel. — La bonamina genio, en kiun Shakespeare, eble kun la dia senkonscio ofta ĉe la geniaj divenoj, trafe enestigis tiel altan simbolon, manifestas klare en la statuo sian idealan signifon, mirinde esprimita de l' arto per linioj kaj konturoj. Ariel estas la racio kaj la supera sentimento. Ariel estas tiu altega instinkto de perfektigebleco, per kies virto grandiĝas kaj fariĝas centro de la estaĵoj la homa argilo, al kiu ĝia lumo vivas alligite, — la *mizera argilo*, pri kiu la genioj de Arimanes parolis al Manfred. Ariel estas, por la Naturo, la altega kronado de ĝia agado, kiu finigas per la spirita flamego, la levigan proceson de la organiziĝintaj formoj. Ariel triumfanta signifas idealecon kaj ordon en la vivo, noblan inspiron en la penso, sindonemon en moralo, bonguston en arto, heroecon en la agado, delikatecon en la kutimoj. — Li estas la heroo nomdonanta en la epopeo de la homspeco; li estas la senmorta protagonisto; de kiam,

per sia ĉeesto, li inspiris la malfortan klopodojn de racieco de l' prahistoria homo, kiam unuafoje li klinis la malhelan frunton por prilabori la silikŝtonon aŭ desegni senartan figuron en la nordocervaj ostoj; de kiam per siaj flugiloj li vivigis la sanktan flambrulaĵon, kiun la primitiva "arya", naskiginto de la civilizigaj popoloj, amiko de la lumo, bruligis en la mistero de la Ganges'aj arbaregoj, por formi per ĝia dia fajro la sceptron de l' homa majesteco, — ĝis kiam, interne jam de la superaj rasoj, li levigas, brileganta, super la animoj, kiuj preterpasis la naturajn kulminojn de l' homaro; same super la herooj de l' penso kaj de l' revo, kiel super tiuj de l' agado kaj de l' sinofero; same super Platono en la promontoro de Sunium, kiel super Sankta Francisko de Asis en la soleco de Monte Albornia. — Lia nekontraŭstarebla forto havas kiel impulson la tutan supreniran movadon de la vivo. Venkita unu kaj eĉ mil fojojn de l' ne dresebla ribeliĝo de Kaliban, forigita de la venkinta barbareco, asfiksiita en la fumo de l' bataloj, kun la travideblaj flugiloj makulitaj pro la ektuŝo de la "eterna sterkejo de Job", Ariel senmorte reaperas, Ariel rehavas sian junecon kaj sian belecon, kaj li alkuras facilmove, kiel je la alvoko de Prospero, je la alvoko de ĉiuj, kiuj amas lin kaj lin alvokas en la realeco. Lia bonfara

superrego atingas, kelkafoje, eĉ al tiuj, kiuj lin neas kaj ne rekonas lin. Li direktas ofte la blindajn fortojn de la malbono kaj la barbareco, por ke ili kunkuru, kiel la aliaj, al la agado por la bono. Li trairos la homan historion kantante, kiel en la dramo de Shakespeare, sian melodian kantaĵon, por animi tiujn, kiuj laboras, kaj tiujn, kiuj luktas, ĝis kiam la plenumo de l' nekonata plano, al kiu ĝi obeas, permesu lin — kiel li sin liberigas, en la dramo, el la servado al Prospero, — rompi siajn materiajn ligilojn, kaj reiri por ĉiam al la centro de sia dia fajro.

Ankoraŭ pli ol por mia parolo, mi trudas al vi dolĉan kaj neforigeblan rememoron por mia statuo de Ariel. Mi volas, ke la delikata kaj gracia figuro de tiu ĉi statuo restu de nun fiksita sur la plej sekura intimeco de via spirito. — Mi memoras, ke iafoje, kiam mi observadis la monerkolekton en muzeo, altiris mian atenton, ĉe la enskribo de malnova monero, la vorto *Espero*, duonkonfuza sur la velka ora paleco. Konsiderante la preskaŭ malaperintan ĉnskribon, mi meditis pri la ebla realeco de ĝia influo. Kiu scias, kian aktivan kaj noblan parton estus juste atribui, pri la formado de l' karaktero kaj pri la vivo de kelkaj homaj generacioj, al tiu simpla devizo aganta sur la volojn, kiel insista sugesto? Kiu scias, kiom da ŝanceligantaj ĝojoj

persistis, kiom da sindonemaj entreprenoj maturiĝis, kiom da fatalaj celaĵoj neniĝis, je la ektuŝo de l' rigardoj kontraŭ la stimula vorto, presita, kiel grafika krio, sur la metala disko cirkulinta de unu mano en alian? . . .

Povu tiu ĉi bronza figuro - - kun viaj koroj reliefigintaj kun ĝi - - ludi en via vivo la saman modestan sed decidigan rolon. Povu ĝi, en la senlumaj horoj de l' malkuraĝigo, revivigi en via konscienco la entuziasmon por la ŝancelanta idealo, redoni al via koro la varmon de l' perdita espero. Firmiĝinte unue en la fortikaĵo de via interna vivo, Ariel ekflugos de tie al la konkero de l' animoj. Mi vidas lin, en la estonto, ridetantan al vi dankeme, de alte, kiam via spirito eniĝos en la ombron. Mi kredas en via volo, en via klopodo: kaj ankoraŭ pli, mi kredas en tiuj de l' estuloj, al kiuj vi donos la vivon kaj transdonos vian laboron. Mi kutimas ebriiĝi per la revo pri la tago, kiam la realaĵoj pensigos, ke la Kordiljero staranta sur la tero de Ameriko estas skulptita por esti la definitiva piedestalo de tiu ĉi statuo, por esti, la netuŝebla altaro de respektigo al ĝi!

TIEL parolis Prospero. — La junaj dis-
 cípuloj sin apartigis de la majstro post kiam
 ili premis filame lian manon. Kun ili iris
 la persista vibrado de lia milda parolo, kva-
 zaŭ daŭra plendosono de la frapita kristalo
 en serena medio. Estis la lasta vespera horo.
 Radio de mortanta suno trairis la ĉambron,
 meze de diskreta duonombro, kaj tuŝante la
 bronzan frunton de la statuo, ŝajnis animi en
 la memfidaj okuloj de Ariel la malkvietan
 fajreron de l' vivo. Plilongigante poste, la
 radio pensigis pri longa rigardado, kiun la
 genio, mallibera en la bronzo, sendus sur la
 junulan grupon forirantan. — Dum longa
 tempo la grupo iradis silente. Ŝirmitaj de
 unuanima menskoncentriĝo, efektivigis en ĉies
 spirito tiu delikata medita destilado, mirigita

de gravegaj aferoj, kiun sankta animo ĉarme komparis kun la malrapida kaj trankvila faldado de l' roso sur la ŝaflanon de ŝafido. — Kiam la malglata kontakto kun la homamaso ilin revenigis al la realaĵo ilin ĉirkaŭanta, jam estis nokto. Varma kaj serena somera nokto. La gracio kaj la trankvileco de ĝia ebona urno dissemataj sur la teron, triumfadis super la flosanta prozo de l' objektoj disemataj de la homaj manoj. Nur malhelpis la ekstazon la ĉeesto de l' popolamaso. Varmeta blovo ekremigis la medion per sopiranta kaj rava sinfordono, kiel la tremetanta pokalo ĉe la mano de orgiano. La ombroj, ne nigrigante la puregan ĉielon, nur donis al ĝia bluo la malhelan tonon, per kiu ŝajnas esprimiĝi pensiga sereneco. Emajlante ilin, la grandaj astroj briladis meze de senfina stelsekvantaro; Aldebaran', kiu brilas kiel luma purpuro; Sirio, kiel kavaĵo de ornamita arĝenta kaliko renversita sur la mondo; la Kruco, kies malfermitaj brakoj etendiĝas sur la amerika tero, kiel por defendi lastan esperon...

Kaj estis tiam, post plidaŭrigita silento, kiam la plej juna el la grupo, kiun oni nomis "Enjolrás" (elparolu: Enliolras') pro lia pripensema ensimemiĝo, diris montrante sin-

sekve la malviglan ondiĝadon de l' hom-
amaso kaj la radiantan belecon de la nokto:

—Dum la popolamaso pasas, mi observas
ke, kvankam ĝi ne rigardas la ĉielon, la ĉielo
rigardas ĝin. Super ĝia amaso indiferenta kaj
malluma, kiel sulka grundo, io malsupren
venas de la alteco. La vibrado de la steloj
similas la movadon de manoj de semisto.

F I N O

ALDONO DE LA TRADUKINTO

KIU KLARIGAS LA ĈAPITRON DEDIĈITAN
AL USONO EN "ARIEL"

POR bone kompreni la paĝojn, kiujn Rodó dediĉis al Usono en tiu ĉi verko, estas necese memori, ke ili estis skribataj en la fino de l' pasinta jarcento, en cirkonstancoj, kiam la kolosa nordamerika nacio, pro ĝia materia progreso kaj pro ĝia granda potenco, prezentigis, por multaj influaj personoj en la sudamerikaj nacioj, kiel la sola imitinda modelo, kaj kiam, sekve de la tiama erara politiko de la usonaj registaroj rilate al la latinamerikaj landoj, ĝi vekis en ties popoloj ankaŭ malkonfidojn kaj suspektojn kontraŭ ĝi.

La ŭrugvaja pensulo opinias, ke troa admiro kaj blinda imitado de la praktikaj kaj pozitivaj kvalitoj de l' usona popolo povas malbone influi la formadon de la respektivaj naciaj karakteroj de l' junaj sudamerikaj respublikoj, kies latinan devenon li pretendas defendi en tio, kion li konsideras iliaj esencaj spiritaj trajtoj, kontraŭ la troaĵoj de

tio, kion li opinias utilisma aŭ materialisma civilizacio de la nordamerikanoj.

Tiuj juĝoj pri Usono havis, do, okazan motivon antaŭ duonjarcento, sed ĝia signifo estas nuntempe tute neaktuala. Tial, unue mi pensis ne traduki tiun ĉapitron de ARIEL. Sed post atenta ripetita tralegado, kaj malgraŭ ĝia neaktualeco kaj ia creareco en tio, kio rilatas la kritikojn, mi alvenis al la konkludo, ke, pro respekto al la fama verkisto, kies serena parolo neniel pretendas ofendi la grandan usonan popolon, pro respekto al la Esperantista internacia publiko, kiu legos la verkon, publiko tre komprenema, kaj pro respekto ankaŭ al la nordamerika popolo mem, kies morala fortikeco kaj sana spirito elstaras super tiaj kritikoj, mi devas nenion forigi el la Esperanta traduko de tiu ĉi verko; sed mi konsideras konvene aldoni tiun ĉi longan noton por klarigi tion, kio estas klarigenda, kaj mi akceptas tiamaniere la sugeston al mi proponitan de mia eminenta samideano kaj amiko S-ro Ismael Gomes Braga, de Rio de Janeiro, kiam mi sciigis al li pri mia traduko de ARIEL.

En tre interesa letero al mi adresita, diras S-ro Gomes Braga defendante Usonon:

“Kiam la genia pensulo verkis sian libron, la misio de Usono estis tro nebula, kaj neniu — nek eĉ li mem — povis kompreni la his-

ALDONO DE LA TRADUKINTO

torian mision de tiu granda popolo. Ankaŭ Eça de Queiroz skribis pri Usono ion tute similan al la pensoj de Rodó en ARIEL.

“Nun, kiam duonjarcento forpasis, la faktoj iomete pli klarigis la mision de Usono, kaj supozeble nun Eça de Queiroz kaj Rodó ne estus skribintaj tiajn paĝojn pri niaj nordaj kuzoj.

“La nuna influo de Usono en ĉiuj landoj de Oriento kaj Okcidento jam permesas al ni ekvidi la gloran mision de tiu popolo en la venontaj jarcentoj. Ĝi instruas al la mondo la manierojn forpeli de si por ĉiam la materian mizeron, kiu dum jarmiloj bestigas la homon per malsato, timo, sklaveco.

“Per labormaŝinoj, uzataj en terkulturo kaj industrio, Usono aliformigas la mondon kaj aperigas novan epokon, en kiu la homo vivos pli spirite, ĉar li jam ne estos sklavo de la stomako. Ĉar pro mizero la homo estas sklavo en tia grado, ke li fariĝas militisto, rabisto, ŝtelisto, malsuperulo.

“La ekonomiaj metodoj de Usono iom post iom universaligaĝas kaj aperigos fine novan mondon de pli liberaj estuloj.

“Post plenumo de tiu misio, la usonanoj ankaŭ spirite maturiĝos kaj fariĝos pli pensemaj, pli artistaj.

“Post la tempo de Rodó, Usono venkis du

mondmilitojn kaj montris superan idealismon kontraŭ la venkitoj..."

Jen reskribitaj la esencaj paragrafoj de la letero de S-ro Gomes Braga.

Por esti justaj, ni diru, ke la rolo forigi la mizeron de la Tero, per la elpensadoj de l' genio, ne apartenas ekskluzive al Usono, kvankam ĝia parto estas ja tre granda; sed estas aliaj popoloj, precipe eŭropaj (Francujo, Anglujo, Germanujo, Italujo, k. t. p.), kiuj ankaŭ multe kontribuis tiusence al la materia progreso de l' homaro.

Sed ni revenu al ARIEL.

Unue oni povas rimarki en tiu ĉapitro pri Usono, ke Rodó daŭrigas pritraktante la samajn motivojn, kiuj inspiris la tutan verkon, t. e. "idealeco kaj ordo en la vivo, nobla inspiro en la penso, sindonemo en moralo, bongusto en arto, heroeco en la agado, delikateco en la kutimoj". Plie, libereco, demokratio, k. t. p.

La laŭdoj dediĉitaj de la urugvaja verkisto al Usono, sendube tre justaj, multe superas liajn kritikojn, kaj ofte li mem ilin kontraŭdiras. Ĉi tiuj lastaj, laŭ mia opinio, naskiĝas plej grandparte el la erara penso, ke la praktikaj kaj pozitivaj kvalitoj de la usona popolo tute malhelpas ĝiajn idealismajn sentojn, kaj ankaŭ povas influi malfavore la idealismon de aliaj popoloj.

Tiu kredo, en la epoko, kiam Rodó verkis *ARIEL* (1898–1900), estis preskaŭ ĝenerale akceptata, sed ĝi tute ne havis seriozan fundamenton. Aliparte, se oni pripensas pri la tiamaj kaj la nunaj statoj de l' mondo, ni alvenos al la konkludo, ke la kritikoj de Rodó pri materialismo tuŝas ne nur Nordamerikon, sed nian tutan civilizacion, pro diversaj kaŭzoj, kiujn ni ne povas analizi tie ĉi.

Cetere, la eminenta verkisto mem, parolante rilate al la racia kaj la utilisma konceptoj pri la vivo, klarigas kaj malgravigas la kritikojn kontraŭ la materialismo de nia epoko, kiam li skribas: “La kulpigo pri mal-larĝa utilismo, kiun oni kutimas direkti al la spirito de nia jarcento, je nomo de la idealo kaj kun anatemiaj rigoroj, baziĝas parte sur la nescio, ke la titanaj klopodoj por la subigo de la naturaj fortoj sub la homan volon kaj por la disvastiĝo de la materia bonstato, estas laboro necesa, kiu preparos, kiel la laboran riĉigon de elĉerpita grundo, la floradon de estontaj idealismoj” (1). Kaj en alia ĉapitro: “Sen la brako nivelanta kaj konstruanta, ne havus pacon la brako sur kiu sin apogas la nobla frunto pensanta. Sen la konkero de kelka materia bonstato, estas neebla, en la homaj socioj, la regado de l’

(1) *Ariel*, paĝo 66.

spirito" (1). Kaj parolante pri la utilisma aktiveco: "La sama pozitiva forto aperas favorante la plej grandajn ideojn de la civilizacio" (2). Kaj poste diras: "La historio montras definitive reciprokan instigon inter la progresoj de la utilisma kaj la ideala aktivecoj. Kaj tiel, kiel la utileco ofte fariĝas forta ŝildo por idealecoj, tiuj ĉi ofte provokas (kondiĉe de nereakta celado al ĝi) la rezultatojn de la utileco" (3). Kaj kompletigante sian esperan penson, li asertas poste: "Tiu ĉi leĝo de harmonio lernigas nin respekti la brakon, kiu plugas la malmolan grundon de la prozo. La agado de la nordamerika pozitivismo servos, fine, al la idealo de Ariel. Tion, kion estas rekte konkerinta tiu ciklopa popolo por la materia bonstato, per sia senco de la utileco kaj per sia admirinda kapablo por la mekanika inventado, tion aliformigos aliaj popoloj, aŭ ĝi mem, estonte, kiel efikajn elementojn de selektado" (4).

En tiu ĉi lasta frazo de Rodó estas vera profetaĵo, kaj ĝi iel antaŭdiras la gravan rolon de Usono en la nuna kaj en la estonta historio de l' homaro.

(1) *Ariel*, paĝo 117.

(2) *Sama*, paĝo 118.

(3) *Sama*, paĝo 118.

(4) *Sama*, paĝo 119.

Tiu misio estas ankaŭ montrita per la jenaj vortoj antaŭe diritaj de la granda beletristo:

“La postsigno de iliaj paŝoj (Rodó parolas pri la usonanoj) neniam malaperos el la historio de la homrajto, ĉar ili estis la unuaj, kiuj aperigis nian modernan koncepton pri la libereco...” (1). Kaj poste juste diras la idealama verkisto: “Al ili apartenas la gloro esti plenmontrintaj — akcentante la plej firman noton de morala beleco de nia civilizacio — la grandecon kaj povon de l’ laboro, tiu ĉi benita forto, kiun la antikva epoko forlasadis al la sklava malnobleco, kaj kiun hodiaŭ ni identigas kun la plej alta esprimo de la homa digneco, bazita sur la konscio kaj sur la aktiveco de l’ propra merito” (2).

La libereco, la homrajtoj, la labordigne-
co, la dignigo de l’ homo per la laborkon-
keroj... Ĉu povus ekzisti pli altaj celoj por
la gloro de iu nacio?

La lastepasintaj jardekoj montras klare,
ke, vole nevole, tiuj nun estas kaj estonte
devos esti la altaj roloj de Usono en la mond-
historio.

(1) *Ariel*, paĝo 96.

(2) *Sama*, paĝoj 96 kaj 97.

Plie, ĝia nuna kolosa potenco, nekompahreble multe pli supera ol tiu de la tempo, kiam aperis ARIEL, trudas al Usono novajn altruistajn devojn: tiun de plena solidareco kun la tuta homaro kaj tiun de ĉefa defendanto de la demokratio, la sola reĝimo kapabla garantii la homrajtojn kaj la homan dignecon.

Kiam Usono pretendas liberigi sin de tiuj devoj, la aliaj landoj kaj Usono mem suferas la konsekvencojn. La nepartopreno de Usono ĉe la estinta Ligo de Nacioj estis ja ĉefa kaŭzo de la malsukceso kaj disiĝo de tiu grava internacia institucio. La gravega konsekvenco estis la dua mondmilito. Ankaŭ la rifuzo de helpo (vendado de armiloj), je nomo de arbitra neŭtraleco, al laŭleĝa registaro de la Hispana Respubliko, tiakaraktere rekonita de ĉiuj nacioj, havis seriozajn internaciajn sekvojn, kiuj ankoraŭ daŭras. En tiu ĉi okazo bedaŭrinde Usono montriĝis kontraŭ sia propra demokrata tradicio.

Malgraŭ ĉio, oni devas rekoni, ke la internacia konduto de Usono en la lastaj jardekoj prezentas tiun ĉi modernan nacion, kiel plej idealistan. La politiko de komprenemo kaj bonvolo inaŭgurita de prezidanto Franklin D. Roosevelt, precipe pri tio, kio koncernas la latinamerikajn landojn, ĝia grandega kontribuo per homoj, armiloj kaj ĉias-

pecaj rimedoj, al la venko de la demokrataj landoj kontraŭ du el la danĝeraj despotismoj (naziismo kaj faŝismo); poste ĝia bonvolema kaj humana sintenado favore al la venkitaj nacioj, kaj fine, ĝia granda kaj oferebla helpo al multaj popoloj, post la milito, por kuraci iliajn vundojn kaj restarigi iliajn naciajn ekonomiojn, bone montras, ke, laŭ profeta esprimo de Rodó, “la agado de nordamerika pozitivismo servos, fine — jam servas —, al la idealo de Ariel”, t. e. servos al la nobla, homama idealismo.

Tiuj ĉi faktoj estas ja nur la realigo de la ideoj de l' nuntempaj regantoj de Usono, kiuj preskaŭ ĉiam fidele interpretis la penson kaj la senton de la nobla nordamerika popolo.

Ni legu la penson de Franklin D. Roosevelt en “Preĝo de la Libera Homo” (1):

“Dio de la liberaj homoj:

“Konsentu al ni venkon kontraŭ la tiranoj, kiuj volas sklavigi ĉiujn liberajn homojn kaj ĉiujn naciojn.

“Konsentu al ni fidon kaj komprenemon por ami ĉiujn batalantojn por la libereco, kvazaŭ ili ĉiuj estus niaj fratoj.

(1) Laŭ Esperanta traduko aperinta ĉe *O Instituto Brasileiro de Geografia e Estadística e o Esperanto*, libro eldonita de ĉi tiu brazila instituto en Rio de Janeiro, 1947-a.

“Donu al ni fratamon en Espero kaj en Unueco ne nur dum la tempo, kiam daŭros tiu ĉi amara milito, sed ankaŭ dum ĉiuj venontaj tagoj, dum kiuj starigōs kaj firme tenigōs por ĉiam la unuiĝo de ĉiuj filoj de la Tero.

“Nia Tero estas nur malgranda astro en la vastega Universo. Tamen ni povas fari el ĝi ion grandan, plancon ne turmentatan de milito, ne skuatan de malsato aŭ timo, ne dividatan de malsaĝaj distingoĵ de raso, koloro aŭ doktrino.

“Konsentu al ni kuraĝon por tio kaj ebliĝu al ni komenci tiun taskon hodiaŭ, por ke niaj infanoĵ kaj la idoj de niaj infanoĵ povu fieri pri sia nomo de Homo.

“La Spirito de la Homo lasis sin malfortigi kaj la animo de la Homo perdiĝis.

“Konsentu al ni Saĝecon kaj Vidokapablon por kompreni la grandecon de la homa spirito suferanta, kaj tiel multe suferanta, por atingi la celon post tiu ĉi nedaŭra restado en tiu ĉi mondo.

“Liveru gloron al niaj mortintoĵ, kiuj pereis en Fido, gloron al la vivantoĵ, kiuj laboras kaj batalas por la Fido, la Savo kaj la Sekureco por ĉiuj sklavigitaj landoj kaj popoloĵ.

“Havigu paciencon al la trompitoĵ kaj kompatu la perfiditoĵn. Kaj donu al ni encer-

gion kaj kuraĝon, por ke ni povu purigi la mondon de la subpremo kaj de la putranta doktrino, laŭ kiu fortulo devas engluti malfortulon, nur kaj sole tial, ke li estas forta.

“Super ĉio, donu al ni la fratecon, ne nur en ĉi tiu tago, sed ankaŭ por ĉiuj jaroj de nia vivo — fratecon ne nur per vortoj, sed ankaŭ per agoj kaj faroj.

“Ni ĉiuj estas filoj de la Tero. Konigu al ni tiun simplan doktrinon: se niaj fratoj suferas subpremon, ni ankaŭ suferas subpremon; se niaj fratoj malsatas, ni ankaŭ malsatas; se la libereco de niaj fratoj malaperas, la nia ankaŭ ne estas sekura.

“Donu al ni la komunan Fidon, por ke la homo posedu panon kaj pacon, por ke la homo konu la Rajton kaj la Justecon, la Liberecon kaj la Sekurecon; por ke li havu egalan saĝon, egalan oportunon por agi ĉiam kiel eble plej bone profite de ĉiuj, ne nur en sia propra lando, sed ankaŭ en kaj por la tuta mondo.

“Kaj per tiu Fido faru, ke ni povu marŝi, feliĉe kaj konfide, celante la mondon pura kaj perfekta, kiun niaj manoj povas konstrui.”

Ĉu ne ŝvebas plene, glorie, la spirito de Ariel en tiu ĉi altega, altruisma preĝo de la granda kondukinto de l' usona popolo?

Sed ni vidu la penson de l' anstataŭanto de Roosevelt, post lia frua kaj bedaŭrinda forpaso; la penson de l' nuna kondukanto, S-ro Harry Truman, kiun la usona popolo libere elektis, konfirmante al li sian konfidon por nova rega periodo. La jenaj frazoj apartenas al la unua parolado, post sia elekto, kiun S-ro Truman faris antaŭ la Usona Kongreso (1):

"...La potencon de nia nacio — diris prezidanto Truman — oni devas daŭre uzi por la bono de nia tuta popolo, anstataŭ por tiu de kelkaj privilegiuloj. Ĝi devas daŭre esti uzata, sen egoismo, en la lukto por la monda paco kaj por la plibonigo de l' homaro en la tuta mondo."

"...Nia daŭrigata eksterlanda politiko estas esprimo de nia demokrata fido. Ni faras ĉion eblan por stimuli ĉiujn liberajn ŝtatojn de la mondo en la helpo al ĉiuj, kiuj suferas en fremdaj landoj, kaj por fortikigi la demokratajn naciojn kontraŭ la atakoj. Ni helpas mondan organizon (UNO) al subteno de la paco, kontribuante, plie, al la monda ekonomia politiko dediĉata al la kreo de l' prospero por la homaro. Ni akceptis tiurilate grandan nacian kompromison; ni kompro-

(1) Laŭ telegrama transsendaĵo de United Press al ĵurnalo *El Día*, de Montevideo, 6-a jan. 1949-a.

mitis niajn monrimedojn kaj nian honoron. Nun devas evidentiĝi al ĉiuj nacioj, ke ni ne pretendas eternigi la nunan staton de P' aferoj. Ni ne havas la intencon subteni la maljustaĵojn de la estinteco. Ni akceptas kun ĝojo la konstruigajn klopodojn faratajn de multaj nacioj por atingi pli bonan vivnivelon por siaj civitanoj. Ni kredas, ke se ni subtenas decide tiun ĉi celon, la principo de internacia kooperado ricevos la aprobon eĉ de tiuj nacioj, kiuj nun pretendas ĝin malfortigi aŭ ĝin ruinigi."

"...Ni kontraŭstaras la teorion jam malprestigiĝintan, ke la riĉaĵoj devas esti en manoj de kelkaj privilegiuloj. Austataŭ tio, nia ekonomia sistemo devas ripozi sur demokrata bazo, kaj la riĉeco devas esti kreata por la bono de ĉiuj. La lastaj voĉdonadoj pravas, ke la nordamerika popolo opinias favore al tia socio kaj ĝi deziras daŭrigi ĝian perfektigon."

Ĉu ne estas la spirito de Ariel en tiuj vortoj de prezidanto Truman?

Fine, jen la penso de P' fama kondukinto de la liberigaj diversnaciaj armeoj en la dua mondmilito, generalo Dwight D. Eisenhower, kiu post la glora venko forlasis la armilojn kaj li fariĝis prezidanto de la Kolumbia Universitato en Novjorko. La sekvantaj paragrafoj estas ĉerpitaj el malferma aŭ publika le-

tero direktita de Eisenhower al siaj geler-
nantoj en la nomita Universitato, sed lia
luma parolo tute taŭgas por la junuloj en
ĉiuj landoj (1):

“...Lojaleco al la principoj, deziro meti
la proprajn talentojn je la servo de l' ko-
muna bono, volo akcepti respondecojn... tiaj
estas la aferoj, kiuj donas la mezuron de
bona civitano, ne via aĝo.”

“Esti bona civitano estas la plej grava tas-
ko, kiun vi havos antaŭ vi en via vivo. Sed,
esence, esti bona civitano ne estas io alia ol
esti bona membro de la socio, al kiu oni
apartenas, helpi al tiuj, kiuj bezonas vian
helpon, klopodi por atingi la amikan kom-
prenon de tiuj, kiuj kontraŭstaras viajn
ideojn, fari la ĉiutagan laboron iomete pli
bone ol la antaŭan tagon, antaŭmeti la komu-
nan bonon antaŭ la persona profito. Via lan-
do (Usono) estis fondata por asecuri la dig-
necon kaj la rajtojn de l' homa individuo.
Se la digneco kaj la rajtoj de viaj samlanda-
noj gvidas vian normon de ĉiutaga vivo, vi
estos bona civitano.”

Ĉu tiuj ĉi saĝaj paroloj de Eisenhower al
la junularo ne estas similaj al la idealismaj
paroloj de Prospero al siaj disĉiploj?

(1) Tradukita laŭ teksto de revuo *Reader's Di-
gest*, jan. 1949 (hispanlingva eldono). — R. de la Tr.

ALDONO DE LA TRADUKINTO

Dank' al lastaj sciencaj eltrovaĵoj, Usono estas nuntempe la plej potenca nacio el ĉiuj tempoj. La civilizita mondo havas plenan konfidon kaj esperon en tiu grandega povo kaj en la honesteco kaj idealismo de Usono, por la defendo de l' homaro kontraŭ ĉiaj despotismoj aŭ totalitarismoj.

Nordameriko ne devas rezigni kaj ĝi, certe, ne rezignos tiun honoran taskon, ĉar la nobla idealista spirito de Ariel estas en la spirito de ĝiaj kondukantoj kaj de ĝia popolo.

Nune jam oni vidas klare, ke la danĝeroj de la bruteco kaj mallerteco de Kaliban prezentiĝas precipe ĉe la nedemokrataj kaj totalitaraj reĝimoj. Kontraŭ la opinio de Renan, kiu diras, ke la demokratio signifas la entronigon de Kaliban kaj la malvenkon de Ariel, oni povas aserti (la historiaj faktoj de la lastaj tridek jaroj tion pruvas evidente), ke estas la totalitarismo, kiu signifas la forpelon de Ariel kaj la regadon de Kaliban; ĉar totalitarismo anstataŭigas la leĝon kaj la justecon per la arbitra decido de l' despoto posedanta la forton; totalitarismo signifas malaperon de l' individua libereco kaj de l' ceteraj homrajtoj; totalitarismo signifas ne-niigon de la homa digneco kaj sklavigon kaj brutigon de l' popolo; totalitarismo signifas

forigon de la moralaj principoj kaj de l' noblaj atributoj de la homo; totalitarismo signifas regadon de perforto, harbareco, malkulturo kaj malamo; sekve, totalitarismo signifas malaperon de la superaj spiritaj valoroj.

Kontraŭe la ekzemplo de Usono kaj de aliaj demokrataj nacioj (inter ili nia nuntempa Urugvajo) pravas, ke nur ĉe *vera* demokratio, sen alia adjektivo, Ariel povas tute libere malfermi siajnflugilojn kaj leviĝi ĝis atingi la plej altajn kulminojn; ĉar ju pli tiu reĝimo perfektigas, des pli efektive kaj efike ĝi realigas sian jesan agadon.

Laŭ Rodó, tiu agado de la demokratio, krom la regado de la homrajtoj, konsistas en la instigo, per efikaj stimuloj, en ĝia sino, al elmontriĝo kaj superrego de la *veraj* homaj superecoj. Por tion atingi, la demokrata ŝtato devas antaŭdisponi la adekvatajn rimedojn, por ke ĉiuj havu egalajn eblecojn, egalajn kondiĉojn por la elmontriĝo de tiaj homaj superecoj: tiuj de la virto, de l' karaktero kaj de la spirito. Kaj al tiaj superuloj la popolo donu libere hierarkion kaj aŭtoritaton. Kompreneble, tiu ĉi honora distingo devas esti motivo, ne por egoisma profitemo, ne por subpremado, sed por pliaj devoj por realigi la bonon del homa socio.

ALDONO DE LA TRADUKINTO

En tiu ĉi celado al elmontriĝo de la homaj superecoj, laŭ Rodó, la demokratio trovos sian gloron.

Tute certe, se Rodó estus nun vivanta kaj se li estus observinta la evoluon de la usona popolo, lia plumo forstrekus la erarajn juĝojn skribitajn en lia verko, antaŭ duonjarcento, pri la nordamerikanoj; kaj lia nobla spirito, tre bonvole kaj malavare, aldonus al la krono de P laŭdoj en la sama libro la laŭrojn kaj palmofoliojn, kiujn Usono glorie meritas, kiel eternan dankon de la homaro al ĝia idealista kaj sinofera agado dum la lasta jardeko.

M. F. M.

Montevideo, 1950.

KOMPOSTITA EN LA LINOTIPEJO
DE DEPONTI & MAÑANA *
PRESITA EN LA "IMPRESA
CENTRAL" * MONTEVIDEO, 1950



